

# EL POPOLO CINIO

中國新道

9

1980





Beijing-a Meteorologia Centrao

# La Beijing-a Meteorologia Centralo

Junaj teknikistoj

La Beijing-a Meteorologia Centralo dissendas al meteaj observatorioj kaj stacioj en aliaj lokoj de la lando meteorologiajn informojn kaj sciigas veter-prognozojn, kaj faras meteorologian esploron, por ke la meteorologiaj laboroj servu pli bone al la nacia ekonomio kaj nacidefendo.

Nun la centralo kaj la Meteorologia Akademio pligrandigas siajn kapablon kaj esplor-sferon, uzante sistemon de komputeroj produktitaj de nia lando kaj importitaj el aliaj landoj.

Fotoj de ZHANG WEI



Komputera sistemo por meteorologiaj komunikoj kaj prognozo





Sinteza analizado pri diversaj meteorologiaj materialoj fotitaj de satelito

Vicesploristino en atmosfera sinteza analizo

Juna cifero programistino





Observado

Scienca studo ofte okazas  
en la Simpozia Halo.





# EL POPOLA ĈINIO

1980

N-ro 9

(264)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

Xia Nai, fame konata ĉina arkeologo, direktoro de la Arkeologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj koresponda akademiano de la Brita Reĝa Akademio, kiu faris eminentan kontribuon al la ĉina arkeologio

## SUR LA DORSKOVRILO:

Sub tegmentorando

## KOLORA SERIO:

La Beijing-a Meteorologia Centralo

Pejzaĝoj de Jiuzhaigou en Sichuan-provinco

Metiartajoj de Shandong-provinco

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj

## NIGRA-BLANKA SERIO:

Mjaŭ-nacieca Kantistino Awang

Hortikultura Inĝeniero Zhou Qinglong

La kvin kvadrataj sarinaj pagodoj en Huhhot

Bredataj ruĝvertaj grupoj

Taj-naciecaj knabinoj (Ŝtonskulptaĵo)

Nova Vilaĝo de Fiŝistoj

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

Pri la socialisma leĝa sistemo de Ĉinio . . . . .	2
En prizono de Ĉinio . . . . .	4
La ĉina sistemo de pledado vidita en unu proceso . . . . .	8
NIA KULTIVEJO: Miaj proponoj . . . . .	9
Rememoro pri Verda Majo, kunbatalantino de la ĉina popolo . . . . .	12
Karmemoro al japana esperantisto Mijake Sihei . . . . .	14
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	15
La nacia ekonomio de Ĉinio en stabila disvolviĝo . . . . .	18
Sciencita esplorado de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo . . . . .	22
Premio "Cent Floroj" . . . . .	25
VIDINDAJ LOKOJ: Jiuzhaigou . . . . .	27
KARIKATURO . . . . .	28
Ŝanĝiĝo de iu kamparana familio en 30 jaroj . . . . .	29
En la Aŭtunmeza Festo (novelo) . . . . .	32
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Kantofesto de la ĝuang-oj . . . . .	35
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Kontraŭrevolucia Puĉo de "la 12-a de Aprilo" . . . . .	37
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	38
Ĉinio rigardata de eŭropano antaŭ 700 jaroj . . . . .	39
Nutrado kaj kancero . . . . .	41
POR INTERKOMPRENIGO . . . . .	43
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	44
KULTURAJ NOTOJ . . . . .	45
TRA LA MONDO . . . . .	46
INTER NI . . . . .	50
PAĜO DE RADIO PEKINO: Raportu la aŭdeblecon al Radio Pekino . . . . .	51

# Pri la socialisma leĝa sistemo de Ĉinio

**K**ARAJ amikoj, per tiu ĉi artikolo mi iom konigos al vi la socialisman leĝan sistemon de Ĉinio, kiu kredeble vin interesas. Eble tio helpos vin en via konado de la socialisma Ĉinio.

## I

En la malnova Ĉinio mi propraokule vidis la putrajn ŝtatorganojn kaj la malluman kaj malordan socion sub la regado de Kuomintango. En la vasta kamparo multaj lokoj fariĝis simple mondo de banditoj kaj en la urboj ŝtelistoj kaj trompisto bandiĝis, friponoj kaj kanajloj tenis lokon respektive en sia mano. Ĉie troviĝis opiofumejoj, hazardludejoj kaj bordeloj. Laŭ statistiko de la pupa policejo de Shanghai (Ŝanhajo) kun evidenta malgrandigo, antaŭvespere de la Liberiĝo okazis ĉiumonate en tiu urbo ĉ. 140 raboj kaj homŝteloj.

En la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio, por firmigi la popolan politikan potencon, konservi la socian ordon, plenumi la taskon de la demokratia revolucio kaj glate konstrui socialismon, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro donis grandan atenton al konstruo de socialisma leĝa sistemo. La popola

registaro abolis ĉiujn leĝojn, dekretojn kaj juĝajn sistemojn de la Kuomintanga registaro subpremantajn la popolon kaj samtempe paŝo-post-paŝe ellaboris leĝojn, dekretojn kaj juĝan sistemon protektantajn la popolon.

En 1954, la Unua Tutlanda Popola Kongreso ellaboris la unuan socialisman konstitucion de la nova Ĉinio. Poste serio da gravaj leĝoj kaj dekretoj estis ellaborita unuj post aliaj. Dank' al praktikado de tiuj leĝoj kaj dekretoj, okazis granda ŝanĝo al la soci-sistemo de Ĉinio. Kvankam la klasbatalo estis komplika kaj akra, tamen la popola politika potenco plifirmiĝis kun ĉiu tago, pro la granda potenco manifestita de la socialisma leĝa sistemo. Tiam la spirita fizionomio, nova moralo kaj bona socia ordo de la ĉina popolo profunde impresis fremdlandajn amikojn, kiuj venis por viziti la novan Ĉinion.

## II

Sed bedaŭrinde, en la kultura revolucio (1966-1976) la ĉina socialisma leĝa sistemo estis serioze damaĝita de Lin Biao kaj la kvarpersona bando.

La socialisma leĝa sistemo estas grava instrumento de la

diktaturo de la proletaro. Por efektiviĝi sian kontraŭrevolucion konspiron uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj turni la diktaturo de la proletaro en tiun de faŝismo, Lin Biao kaj la kvarpersona bando tretis la socialisman leĝan sistemon utiligante tiun parton de la potenco, kiun ili jam kaptis. Por faligi grandan nombron da revoluciaj gvidantaj kadroj, ili persekutis la lastajn per diversaj kontraŭleĝaj rimedoj, kiel traserĉo kaj prirabo de loĝejoj, arestado, kontraŭleĝa juĝado kaj torturo por eldevigi konfesion malveran. Ili inventis multajn maljustajn, falsbazajn kaj erarajn verdiktojn. Ili instigis anarkiisman tendencon en la socio, per tio serioze detruante la ordon de la socio, produktado kaj laboro. Pro persisto en la vero kaj opono al la fiagoj de Lin Biao kaj la kvarpersona bando, multaj kadroj kaj popolanoj estis kondamnitaj kiel kontraŭrevoluciuloj; iuj el ili estis ĵetitaj en malliberejon, aliaj mortis ĉagrene pro maljusta traktado kaj triaj estis mortpunitaj.

Post frakaso de la kvarpersona bando, la popola registaro reordigis la instituciojn de publika sekureco kaj justico kaj restarigis la popolan prokurore-



jon. Por defendi kaj plifortigi la socialisman leĝan sistemon, la diverslokaj popolaj juĝejoj denove kontrolis plejparton de la kriminalaj kazoj deciditaj dum la kultura revolucio kaj ĝustigis grandan nombron da maljustaj, falsbazaj kaj eraraj verdiktoj.

Por perfektigi la socialisman leĝan sistemon, la Dua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso okazinta en junio de 1979 aprobis "Organizan Leĝon de Popola Juĝejo", "Organizan Leĝon de la Popola Prokurorejo", "Kriminalan Kodon", "Leĝon de Kriminala Proceso" kaj aliajn tri gravajn leĝojn. Antaŭ nelonge la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso aprobis "Arbaran Leĝon" kaj "Medioprotektan Leĝon". Iuj el la antaŭaj leĝoj kaj dekretoj estas deklaritaj kiel ankoraŭ validaj kaj aliaj devas esti amenditaj.

La socialisma leĝa sistemo de Ĉinio povas denove sane disvolviĝi, dank' al la ellaborado, amendo kaj praktikado de la supraj leĝoj kaj dekretoj.

### III

Iuj amikoj eble demandus: Kiajn karakterizaĵojn havas la socialisma leĝa sistemo de Ĉinio kaj kiajn rolojn ĝi ludas? Mi opinias ke:

Unue, la ĉina socialisma leĝa sistemo reprezentas la volon de la plejmulto de la popolo kaj praktikas diktaturon super la plejmalmulto por garantii la rajtojn de la popolo pri demokratio kaj la libereco kaj la glatan disvolviĝon de la socialisma moderniga afero.

Ĉinio estas socialisma lando, kiun mastras la laboranta po-

polo. La konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko kondiĉas, ke ĉiuj potencoj de la ŝtato apartenas al la popolo, kaj la popolo ne nur havas la rajtojn administri la ŝtaton kaj la ekonomiajn aferojn kaj kontroli la ŝtatajn instituciojn kaj iliajn laborantojn, sed ankaŭ ĝuas la liberecon de parolo, korespondo, eldonado, kunveno, asociiĝo, manifestacio, striko, religia kredo k.a.

En Ĉinio la socialisma publika posedaĵo estas netuŝebla. La ĉina konstitucio kondiĉas, ke la ŝtato garantias firmigon kaj disvolvcon de la socialisma ekonomio de tutpopola posedsistemo kaj tiu de kolektiva posedsistemo de laborantaj amasoj, kaj samtempe protektas la posedrajtojn de la civitanoj pri leĝa enspezo, deponita mono, domo kaj aliaj vivrimedoj.

Tial, ĉiuj agoj, kiuj endanĝerigas la suverenecon kaj teritorian integrecon de la ŝtato kaj la sistemon de la proleta diktaturo, subfosas la socialismajn revoluciojn kaj konstruadon kaj la socian ordon, atencas la posedaĵon de la tuta popolo aŭ tiun de kolektivo de laborantaj amasoj, la leĝan privatan enspezon de civitano kaj liajn rajtojn de personeco, demokratio k.a. kaj endanĝerigas la socion, estas krimaj kaj devas esti punataj laŭ leĝo.

Tiuj kondiĉoj de la ĉina leĝo enkorpigas la mastrecon de la ĉina popolo kaj vekas ĝian aktivecon defendi la revoluciajn fruktojn kaj konstrui socialismon.

Due, en sia socialisma leĝa sistemo Ĉinio praktikas la politikojn "kombini punon kaj indulgon", "kombini devigan la-

boron kaj ideologian edukon" kaj "doni ŝancon por nova vivo".


Kombini punon kaj indulgon signifas trakti la krimulojn laŭ iliaj malsamaj krimoj kaj sintenoj. Oni punas la plejmalmulton kaj edukas kaj transformas la plejmulton. Konkrete dirate, la ĉefkrimuloj nepre devas esti punitaj. Tiuj, kiuj konfesas siajn krimojn, estos punataj malsevere; tiuj, kiuj obstine rifuzas konfesi siajn krimojn, estos severe punitaj; tiuj, kiuj faras bonojn, povas ĝui mildigon de la puno; kaj tiuj, kiuj faras grandan kontribuon, povas esti premiitaj.

Kombini devigan laboron kaj ideologian edukon signifas devigi krimulojn partopreni en fizika laboro kaj samtempe eduki ilin ideologie, ke ili konu la kaŭzon de siaj krimoj kaj ilian danĝeron por la ŝtato kaj la popolo, ĉesu malbonfari en la estonto, transiru de deviga al konscia transformado kaj fine fariĝu civitanoj vivantaj el sia laboro kaj utilaj al socialismo. (Legu la artikolon "En Prizono de Ĉinio" en tiu ĉi numero.)

Ĉiuj malliberuloj ne kondamnitaj al morto povas ricevi laboron post liberiĝo. Tio estas la politiko "doni ŝancon por nova vivo".

En la lastaj 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la popola registaro sukcese praktikis la suprajn politikojn kontraŭ la krimuloj kaj atingis bonajn rezultojn. Ekzemple, Pu Yi, la lasta imperiestro de la ĉina feŭda dinastio, kiu en la pasinteco dependis de aliaj en vivo, post edukado kaj transformado

(Daŭrigota sur p. 11)



# En prizono de Ĉinio

de CAO BAILONG

**E**N Ĉinio, escepte de krimuloj kondamnitaj al morto, oni aplikas al aliaj krimuloj ideologian edukon kaj devigan laboron por reformi ilin en bonajn homojn. Kaj kiajn metodojn oni aplikas kaj kiel efikas tiuj faroj? Pri tio multaj el niaj legantoj ja havas la intereson informiĝi. Por kontentigi tiujn legantojn antaŭ nelonge mi vizitis la Prizonon de Shandong-provinco.

## ZORGADO KAJ EDUKADO

La prizono situas en antaŭurbo de la provinca ĉefurbo Jinan (Ginan). Ĝi, same kiel eksterlandaj prizonoj, estas ĉirkaŭata de altaj muroj kun elektraj pikildratoj kaj gvatturoj sur la anguloj. Ĝi diferencas de aliaj nur per tio, ke ambaŭflanke de ĝia pordo pendas elpendaĵoj “Prizono de Shandong-provinco” kaj “Shengjian-a Generatora Fabriko de Jinan, Shandong-provinco”.

Post la pordo estas vasta korto, en ĝia antaŭo estas 4-eta-

ĝa oficejo kaj en la malantaŭo fruktarbaro kaj altaj fabrikaj domoj. Tie mi ne vidis armitan provoson nek malliberulon mankatenitan kun taŭzitaj haroj kaj malpura vizaĝo. Tian prizono mi ne imagis antaŭe. Tie regas kvieteco, kaj oni ne sentas etoson de teruro. Eble ĝia estro jam vidis mian miron kaj klarigis al mi: “En la malnova Ĉinio prizonoj estis lokoj por puni kaj turmenti homojn. Sed prizonoj de la nova Ĉinio estas kaj lokoj por puni krimulojn kaj fabrikoj kaj lernejoj por rebonigi ilin. Nia politiko rilate al la krimuloj estas kombini punon kun indulgo kaj kombini devigan laboron kun ideologia eduko. Nia principo estas meti ideologian transformadon en unuan lokon kaj produktan laboron en la duan. Ni donas al la malliberuloj konstantan edukon pri la aktuala situacio, politikoj, leĝo, moralo, kulturo kaj tekniko. Tion ni faras por transformi ilin en civitanojn, kiuj obeas la

leĝon kaj vivas de sia laboro.” Poste li konigis al mi tiun prizono kaj ĝian edukon metodon.

La prizono kun areo de ĉ. 300,000 kvadrataj metroj estis konstruita en 1958. Ĝi akceptas virajn krimulojn, plejparte nepolitikajn. La prizono konsistas el tri partoj: oficejo, loĝejo kaj laborejo. En la deviga laboro la malliberuloj produktas generatorojn, faras tolŝuojn kaj vestojn por si kaj ankaŭ okupiĝas pri agrikulturo kaj aliaj laboroj.

Al la novevenintoj la provosoj donas unumonatan edukon pri pentoj kaj disciplino kaj post tio sendas ilin en fabrikon fari konvenan laboron laŭ sia talento kaj sanstato. Tiuj, kiuj estas malkleraj, devas esti klerigitaj; kaj tiuj, kiuj ne posedas teknikajn sciojn, devas lerni ilin. Tie nun iras 11 teknikaj kursoj de tornado, elektro, stabllaboro, elektra veldado, muldado, arkitekturo, ĝardenistiko k.a. La prizono havas du bibliotekojn,



ordinaran kaj scienco-teknikan, kun pli ol 20,000 libroj. La disciplino por la krimuloj estas tre rigora, sed estas tute malpermesate torturi, insulti, korpe puni kaj turmenti ilin, ilia homa digno estas respektata. Ilian konduton oni ofte kontrolas, kaj faras resumon ĉiumonate kaj ĉiujare. Oni ekzamenas ilian penton, lernadon, observadon de disciplino, sintenon en laboro kaj higienon. Se iu bone kondutas, oni laŭdas kaj premias lin, registras lian bonfaron aŭ petas la tribunalon redukti lian malliberecon aŭ forme liberigi lin. Se iu malbone kondutas, oni avertas lin, registras lian kulpon kaj enfermas lin en izolitan ĉambron, aŭ proponas al tribunalo longigi lian malliberecon. Por bone eduki kaj reformi la krimulojn, oni kelkfoje lasas ilin viziti iujn lokojn. Oni ankaŭ venigas iliajn familianojn al la prizono. La lastaj trankviliĝas, kiam ili vidas ke iliaj familianoj ricevas bonan edu-

kon, vivas kaj laboras en bona ordo.

### VIVO KAJ LABORO

Akompanate de provoso, mi rigardis karcerojn de la prizono kaj informiĝis pri la vivo kaj laboro de malliberuloj. En la korto estas 3 vicoj da 3-etaĝaj domoj por karceroj kaj unu vico da unu-etaĝaj domoj por kuirrejo. Sur ĉiu etaĝo la karceroj sidas ambaŭflanke de koridoro. En ĉiu karceroj kun areo de ĉ. 25 kvadrataj metroj loĝas 7-8 aŭ maksimume 10 malliberuloj. Iliaj litkovriloj, mantukoj, pokaloj, sapujoj k.s bonorde metiĝis. Sur la librobretaro estas "Renmin Ribao" (Popola Ĵurnalo), "Dazhong Ribao" (Popolamasa Ĵurnalo) kaj politikaj kaj sciencaj-teknikaj libroj. La ĉambroj kun granda fenestro garnita per fera krado estas helaj. Ĉe unu ekstremo de la koridoro estas edukejo, kie provoso interparolas kun malliberuloj. En la amuzoĉambro troviĝas zimbalo-

no, dukorda arĉinstrumento, violonĉelo k.a. En la prizono estas ankaŭ manĝilar-tenejoj, lav-ĉambroj kaj aliaj instalaĵoj. La cementaj plankoj de la karceroj estas pure lavitaj per akvo. La malliberuloj havas 2-horan politikan studon, 8-horan laboron kaj 8-horan dormon ĉiutage. Ili ripozas regule en dimanĉo. Mi vizitis karceron ĝuste dimanĉon. Ĵus kiam mi transpaŝis la feran pordon, mi aŭdis muzikon el karceroj. Mi pensis, ke ĝi venas el radioricevilo. Sed fakte ludis kelkaj junuloj en amuzejo, kaj ĉe la pordo kelkaj aŭskultis starante. En karceroj iuj estis ludantaj pokeron aŭ ŝakon sur lito, aliaj legantaj libron, ĵurnalon aŭ gazeton kaj triaj skribantaj leteron. Kaj iu juna malliberulo estis pentranta ion. La provoso diris, ke antaŭe oni okazigis ekspozicion de kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj de malliberuloj.

Mi eliris el la karceraj domoj kaj vidis korbopiladon en la

*Vestofarejo de la prizono*



korto. Kaj la ludantoj kaj la rigardantoj estis malliberuloj. La lastaj orde sidis sur taburetoj ekster la ludkampo. Ĉe la alia ekstremo de la korto troviĝas scenejo. Tie oni projekcias filmojn por la malliberuloj po 3-4 fojoj ĉiumonate. Kaj ili ofte prezentas, dimanĉe kaj festotage, programerojn memverkitajn.

Mi vidis en la kuirejo kuiris-tojn-malliberulojn en blanka kitelo kaj ĉapo. Ili estis preparantaj tagmanĝon. Oni diris al mi, ke monata manĝokosto por ĉiu malliberulo estas 14 juanoj (proksime al tiu por ordinara urbano). En festotagoj ili ricevas monhelpon por plibonigi manĝon. Kaj cetere oni donas porkaĵon, fiŝon, ovojn, sukeron kaj aliajn nutraĵojn al tiuj, kiuj sin okupas pri laboro en alta temperaturo, alte super la tero aŭ en venena medio. Por huj-oj oni speciale starigis kuirejon.

Apud la loĝdomoj estas akceptejo. La malliberuloj povas

intervidiĝi kun siaj familianoj unu fojon ĉiumonate. Ĉar tiu tago estis dimanĉo, la vizitantoj estis pli multaj ol ordinare. Mi vidis, ke iu maljuna malliberulo interparolas kun siaj juna filino kaj bofilino kun lia nepo en brakoj. Lia filino donis al li tri paketojn da kukoj, bombonoj kaj laktopulvoroj kaj demandis pri lia sano.

La malliberuloj ricevas ĉiumonate tri juanojn kiel poŝmonon por cigaredoj kaj teo. Oni donas al la malliberuloj-teknikistoj 5-10 juanojn, kaj ili povas deponi sian superfluan monon en banko aŭ sendi al siaj familianoj.

Oriente de la loĝdomoj estas sanitarejo, en kiu estas la ĉin-medicina sekcio, la interna okcident-medicina sekcio, la ĥirurgia sekcio kaj la denta sekcio, kun pli ol 20 medicinistoj. Ĝi havas 60 malsanulajn litojn. La malsanaj malliberuloj estas aparte zorgataj en manĝo. Ĉe sia en-

karceriĝo la malliberuloj devas esti san-ekzamenataj. Ĝenerala korpa ekzameno okazas en unu aŭ du jaroj. Nemalmultaj malliberuloj, kiuj suferis iajn malsanojn antaŭ la enkarceriĝo, resaniĝis en la prizono. Ekzemple, Ma Lusheng estis malsanulo de osta tuberkulozo. Li longe suferis de tiu malsano. En la prizono li estis kuracata kaj resaniĝis tri jarojn post la malliberiĝo. Li estis jam liberigita kaj trovis okupon. Estas multaj tiaj kazoj.

Poste mi venis al la loko kie la malliberuloj laboras. En ĝia antaŭa parto estas kampoj prizorgataj de malliberuloj. Ili kulturas vinberujojn, pomujojn kaj tomatojn kaj bredas dekojn da porkoj. Kelkaj maljunaj malliberuloj estis sarkantaj kaj akvumantaj. Ĉe la orienta flanko estas laborejoj de lignajistoj, tajloroj kaj ŝuistoj. En la malantaŭo de tiu loko estas fabriko. Tie malliberuloj en



*Malliberuloj vizitas ekspozicion.*



blua laborvesto estis lerte manipulantaj maŝinojn. Se oni ne vidus la vorton "prizono" presitan sur iliaj vestoj, estus malfacile distingi ilin disde ordinaraĵoj laboristoj. La provoso diris al mi, ke ili ĝuas la samajn laborprotektajn kiel ordinaraĵoj laboristoj. La fabrikaj domoj estas ekipitaj per radiatoroj kaj elektrotraj ventumiloj. Somere oni disdonas al ili sodakvon, dolĉacidan prunan trinkaĵon kaj kontraŭsunfrapajn medikamentojn.

Mi demandis la provoson, ĉu okazas sabotado de malliberuloj, ĉu la kvalito de la produktaĵoj povas esti garantiata. Li diris: "Dank' al tio, ke ni traktas ilin humane, edukas ilin per rezonado kaj praktikas la principon de serioza taksado kaj kontrolo de la kvalito de la produktaĵoj, plejparto de ili estas optimismaj pri sia estonteco, volontas lerni teknikon kaj sin montras aktivaj en sia laboro, por ke oni indulgu ilin. Tial iliaj produktaĵoj atingis la normojn difinitajn de la ŝtato, kaj ĉiuj iliaj produktaĵoj estas fariĝintaj laŭ la ŝtata plano".

## VIVI DE LA KOMENCO

Mi demandis la estron de la prizono pri la konduto de malliberuloj kaj ilia stato post liberiĝo. Li diris: "Post eduko plejparto de la malliberuloj volontas akcepti la politikon de transformado en fizika laboro, nur tre malmultaj estas malbonkondutaj."

Liang Hong, grave kriminta fripono, restis malobeema post liberiĝo. Foje li havis ŝancon enŝteliĝi en generatoro-tenejon kaj sin kaŝis en pakokesto de generatoro. Provoso neniel


povis trovi lin. La sekvantan tagon tiu kesto estis forportita el la prizono. Tiel li forkuris nokte. Sed baldaŭ li estis kaptita kaj kondamnita je pli longa mallibereco. Pacienca edukado de provosoj komprenigis lin, ke akcepti transformadon estas unika eliro. Nun li povas manipuli bormaŝinon kaj sin montras tre diligenta en laboro. Laŭ lia pento kaj konduto, oni ŝanĝis lian verdikton de dumviva mallibereco en tiun de tempa mallibereco.

Al la liberigitaj oni donas laboron, por ke ili fariĝu utilaj homoj. Laŭ ilia volo aŭ kondiĉoj, oni laborigis iujn en la socio kaj restigis aliajn kiel laboristojn en la fabriko de la prizono. Antaŭ nelonge la prizona aŭtoritato esploris la liberigitajn: Pli ol 70% el ili agas bone, kaj malpli ol 4% rekrimis.


Juna krimulo Ding Hongzhang estis kondamnita je 7-jara mallibereco. Antaŭe li nenion povis fari, sed li ellernis tajloradon en la prizono. Post liberiĝo li fariĝis lerta tajloro de iu vestofarejo.

Post 13-jara malliberiĝo, Chen Shanxin fariĝis laborema brutobredisto. Krome li ankaŭ kuraĝis denunci malbonulon. Foje iu ŝtelis furagon de la kolektivo. Chen tion raportis al la taĉmentestro. La vilaĝanoj diris: "Antaŭe Chen estis tre impertinenta, sed post transformado li fariĝis homo tre amantasia kolektivon."


Ĉe la fino de mia vizito, la prizona respondeculo diris al mi: "Ni havas ankoraŭ nemalmultajn mankojn, kiujn ni riparas nun. Ekzemple, ni konstruigas novan domon por karceroj. Kaj la areo de instalaĵoj por la



*Malliberuloj en leciono pri tekniko*



*Malliberulo en laboro*



*Malliberuloj ludas ŝakon.*

vivo de la malliberuloj estos pli granda ol la nuna. Ni anstataŭigos la komunajn litojn per unupersonaj litoj kaj pligrandigos la akceptejon. Ni ankaŭ forpermesos hejmeniri al la obeemaj malliberuloj, por ke ili povu aranĝi siajn privatajn aferojn."

# La ĉina sistemo de pledado vidita en unu proceso

**A**NTAŬ nelonge, la Meza Popola Kortumo de la municipo Tianjin (Tiangin) faris publikan juĝadon pri vivatenco kazo, kiu okazis jene:

La krimulo Zhang Jianmin estis 23-jara laboristo de la 2-a taĉmento de la 5-a Sekcio de la Dua Konstrua Kompanio de Tianjin. Foje, lia mano ricevis blazojn pro frotado en laboro je la fino de junio, 1978, kaj post pikrompo de la veziketoj ili estis infektitaj. Pro tio li ricevis operacion kaj ripozis dudek kelkajn tagojn poste. Li petis gvidanton de la sekcio, ke lia kazo estu traktata kiel lezo pro laboro, sed la lasta ne faris enketon pri tio kaj rifuzis lian peton. Krome, li eĉ faris kritikon pri lia kazo en amaskunveno sen mencio de lia nomo. Zhang konsultis kuraciston en la Sanprotekta Stacio kaj la lasta skribis por li ateston pri bezono de evito de peza laboro pro la lezo. Reveninte al la konstruejo, Zhang donis la ateston al sia grupestro, sed la lasta diris post lego de la noto, ke ĉe ili ne estas malpeza laboro, kaj la plej facila el la taskoj estas transportado per puŝĉaro. Zhang diris, ke li ne povas puŝadi ĉareton pro doloro en la mano. La grupestro diris, ke li estos traktata kiel laborevitanto se li tion ne faros. Zhang indig-

ne forlasis la konstruejon kaj reiris hejmen. Posttagmeze, li revenis al la konstruejo kun hakilo kaj du boteletoj da DDV-insekticido. Li surprizis la grupestron kaj hakvundis al li la kapon, vizaĝon kaj manradikon. Dank' al urĝa helpo, la grupestro estis savita, tamen fariĝis kriplulo. Zhang trinkis la kunportitan DDV-insekticidon, sed estis savita el morto.

Post la akcidento, multaj oficistoj kaj laboristoj de la Dua Konstrua Kompanio postulis, ke Zhang Jianmin estu severe punita. La Meza Popola Kortumo de Tianjin, kiu pritraktis tiun kazon, okazigis kunsidon por kolekti opiniojn de koncernaj personoj, en kiu multaj diris, ke Zhang estu kondamnita al 20-jara mallibereco.

La respondeca juĝisto de la kortumo kaj du kadroj de la konstrua kompanio agantaj kiel asesoroj esploris la kazon kaj opiniis, ke la krimo de Zhang Jianmin estas vere serioza kaj apartenas al la kategorio de vivatenco, tamen lia plenumo de la krimago ja havis certan indignigan faktoron. Tial ili venis unuapaŝe al la decido mal-severe kondamni lin al 10-jara mallibereco.

Antaŭ la publika juĝado, la kortumo sciigis al Zhang, ke li

povas havigi al si unu pledanton. Zhang postulis, ke lia fratino Zhang Xiumin pledu por li. La kortumo donis sian konsenton.

Kiam la kortumo sciigis tion al Zhang Xiumin, ŝia familio dronis en zorgoj. Ŝia patro diris: "La filo krimis kaj nun filino devas pledi por li — gardu nin de implikiĝo." Laboranto de la kortumo klarigis al ili, ke pledado de sanga parenco por krimulo estas permesata de la socialisma demokratia sistemo, kaj ĉiu civitano devas trezorigi kaj praktiki tiun rajton. Post tiu admono, Zhang Xiumin konsentis agi kiel pledanto por la frato.

Dum la publika juĝado en la kortumo, Zhang Xiumin stariĝis por pledado, kiam venis ŝia vico paroli. Ŝi plene konfirmis la krimon de la akuzito kaj poste diris, ke la socia malordo dum la tiranado de Lin Biao kaj la kvarpersona bando venenis multajn geknabojn kaj gejunulojn kun seriozaj malbonaj sekvaĵoj. La kaŭzo de la krimfaro de Zhang Jianmin kuŝas unuflanke en tio, ke li malatentis pri la leĝaro, aliflanke en tio ke li estis influita de la anarkiisma tajdo levita de Lin Biao kaj la kvarpersona bando. Ri-



gardate el tiu vidpunkto, li estas kaj atencinto kaj atencito. Ŝi diris, ke la krimfaro radikas ankaŭ en la nebona edukado de la familio al li, kaj la parencoj sentas bedaŭregon pro tio. Kaj cetere, ŝi opiniis, ke la gvidantoj de la organizo, al kiu apartenis Zhang Jianmin, ne sufiĉe bone prizorgis kaj edukis lin. Kiam Zhang ricevis lezon en la mano, la gvidanto ne faris zorgan enketon, traktis lin senpripense kaj krude kaj tiel akriĝis la kontraŭdiron. Kvankam la vivatenco krimo estis plenumita de Zhang kaj li mem devis respondecigi pri sia misfaro, tamen ankaŭ la nekonvena agmaniero de la kadro estis faktoro kaŭzanta la krimfaron. Ŝi aldonis, ke Zhang estas tro juna por antaŭvidi la sekvaĵojn de sia ago, post la krimfaro li multe pentis pri tio, kaj konfesis siajn misfarojn relative honeste. Tial ŝi esperis, ke la kortumo traktos lin malsevere, por ke li rapide

transformiĝu en homon utilan al la konstruado de la patrolando. Ŝi ankaŭ rimarkigis, ke la krimfaro de la frato kripligis la atenciton, kio tre maltrankviligis ŝin kaj ŝiajn familianojn, tamen dank' al prizorgo kaj bona kuracado de la organizo kaj la kuracistoj, ne okazis morto de la atencito, kaj ŝi petis ke la juĝisto kaj asesoroj atentu pri tio en la decido pri kondamno. Fine Zhang Xiumin diris, ke la Konferenco pri Popola Juĝado de Tianjin, kiu okazis antaŭ nelonge, montris, ke "en traktado de krimaj kazoj de geknaĵoj kaj gejunuloj, oni devas persisti en la principo vastigi laŭeble la amplekson de edukado kaj redukti la amplekson de puno por savi la miskondukinetojn". Ŝi esperis, ke la kortumo faros laŭ tiu principo kaj malsevere traktos la misfarinton Zhang Jianmin.

Post la pledado de Zhang Xiumin, parolis denove la pro-

kuroro. Poste Zhang Xiumin refoje kontraŭargumentis. Post trifoja debato de la du flankoj, ili ne plu volis fari plian parolon, kaj tiam la juĝisto proklamis paŭzon.

La paroloj de Zhang Xiumin havigis al la juĝisto kaj asesoroj plenan konon pri la okazado de la krimago. Por ĝuste aljuĝi konvenan kondamnon, ili petis opiniojn de la ĉeestanta publiko. Multaj el la ĉeestantoj opiniis, ke la vortoj de la pledanto estas raciaj kaj solide bazitaj kaj la akuzito devas esti malsevere traktata. Finfine, post la interkonsiliĝo de la juĝisto kaj asesoroj, la kortumo decidis kondamni Zhang Jianmin al 8-jara mallibereco laŭ liaj krimo kaj sinteno de konfeso de lia kulpo.


Kiam la juĝisto deklaris tiun decidon, centoj da ĉeestantaj popolanoj en la juĝejo varme manklakadis por esprimi sian aprobon.

## NIA KULTIVEJO



de d-ro RUDOLF FISCHER,  
FR Germanujo

# Miaj proponoj



**P**OST longa tempo mi trastudis denove kelkajn numerojn de "El Popola Ĉinio". Kun precipe granda intereso mi legis la paroladon de s-ro Hujucz en la decembra eldono lastjara. Mi ĝojas, ke la situacio por Esperanto estas tiom bona en via lando. Tial mi hodiaŭ sendas

kelkajn informojn, sugestojn kaj proponojn al vi.

### I. La Ne-Eŭropaj Landoj: decida batal-kampo por Esperanto

Kelkaj ŝtatoj en okcidenta Eŭropo nuntempe klopodas krei politikan unuigon. La lingva

bariero inter la divers-popolanoj estas forte rimarkebla. Ĉar la ŝtatoj de Eŭropo estas nur malgrandaj kompare al multaj aliaj ŝtatoj de aliaj kontinentoj, vi ofte post kelk-cent kilometroj renkontas novan lingvon kun maljuna tradicio kaj kulturo. Milionoj da fremdaj laboristoj

laboras en la grandaj industriaj ŝtatoj kaj vivas izolaj inter la enlandanoj aŭ perdas la propran kulturon. Malgraŭ Esperanto kiel neŭtrala lingvo, kiu estas lernebla ankaŭ de la popolamasoj, devus esti la racia solvo de la lingva problemo, la politikistoj de la eŭropaj ŝtatoj plimalpli kaŝe sekvas la ŝovinisman vojon de lingva kaj tial ankaŭ kultura imperiismo. Publike oni deklaras, ke ĉiuj eŭropaj lingvoj estas samrajtaj, sed praktike oni devigas ekzemple en F.R. Germanujo ĉiujn infanojn eklerni la anglan, kaj neglektas preskaŭ ĉiujn aliajn lingvojn. Krome oni malagnoskis Esperanton kiel oficialan lernejan fakon. Germanaj sciencistoj devas publikigi en la angla kaj uzi tiun lingvon ekskluzive, ankaŭ dum enlandaj kongresoj. Tiel la germana pli kaj pli perdas la rolon kiel scienca lingvo kaj forvelkas al nura lingvo por nekleruloj. La sama sorto minacas la aliajn kulturojn de Eŭropo, eĉ la kulturojn de la tuta mondo, se ni ne ĝustatempe komune kontraŭstaras.

La Eŭropa Komunumo estas nun en historia situacio. Pro la aliĝo de tri novaj ŝtatoj Hispanujo, Grekujo kaj Portugalujo, la lingva demando ne plu povas esti praktike solvata kiel ĝis nun; oni ne povos dum komuna konferenco traduki el ĉiu lingvo en ĉiun kaj produkti samnombran kopiaron de la dokumentoj. Baldaŭ venos la decido, kiu aŭ kiuj lingvoj iĝos la oficialaj en Eŭropo, kaj tio estos la kondamna juĝo por ĉiuj aliaj naci-lingvoj, se oni ne elektas neŭtralan solvon kiel Esperanton.

La ne-eŭropaj landoj scias tre bone, kion signifas lingva

imperiismo. Multaj ŝtatoj ankoraŭ uzas eks-kolonian lingvon vole-nevole, ĉar ili ankoraŭ ne trovis solvon, kiu konservas kaj montras sian identecon. Tre grava demando por ili estas la ekonomia: la komercistoj de la industriaj landoj ne pretas eklerni afrikajn aŭ aziajn lingvojn, sed altrudas la proprajn lingvojn al la komercemaj ne-eŭropaj ŝtatoj. Tio tute ne konformas kun la homaj rajtoj. Sed mia opinio estas, ke la ne-eŭropaj ŝtatoj povas mem ŝanĝi tion. Jam nun neniu parto de la mondo povas ekzisti sen la alia. Se ne-eŭropaj ŝtatoj decidus, ekskluzive ekuzi Esperanton por internaciaj kontaktoj (eble kun kelkaj jaroj de iompost-ioma ŝanĝiĝo), certe la komercistoj de la industriaj landoj lernus Esperanton. Por eŭropano ja estas tute facile eklerni Esperanton. Krome por eŭropaj eldonejoj nur gravas, kiom da libroj ili povas vendi; se ili povus vendi grandan kvanton en Esperanto al ne-eŭropaj landoj, tiam ili tuj presus ĉion en Esperanto, des pli, ĉar ne estas teknikaj problemoj.

## II. La Reputacio de Ĉinio en Eŭropo

Inter la ne-eŭropaj ŝtatoj Ĉinio estas verŝajne la lando, kiu trovas la plej grandan interreson en Eŭropo. Mi ne volas paroli pri la intereso de la homoj, ekhavi individuajn kontaktojn al viaj samlandanoj. Politika premo venas de la komerca situacio, ne de la privata. Oni ne miru, ke ĉiam germanaj esperantistoj aŭdas de la politikistoj: "Kial Esperanto? Se ni volas komerci kun ekzemple la ĉinoj, ni bezonas la anglan." Do, se la ĉinoj iam dirus,

ke ili ekde nun nur volas komerci pere de Esperanto, antaŭe la komercistoj komencus eklerni Esperanton, kaj poste Esperanto ekhavis tiom da reputacio en nia lando, ke ĝi certe venkus ankaŭ sur aliaj terenoj. Krome baldaŭ aliaj ŝtatoj ne-eŭropaj certe sekvus la ĉinan ekzemplon.

Ĉiu eŭropano konscias, ke Ĉinio estas la lando kun la plej granda homamaso de la mondo, ke Ĉinio estas la fonto de nenombreblaj kulturajoj, ke la problemoj, kiujn Ĉinio devas solvi nun, same sin prezentas al la cetera mondo. Tial, se eŭropanoj parolas komparante pri "la aliaj homoj", tiam ili plej ofte imagas kaj nomas la ĉinojn. Do, se "la aliaj homoj", nome la ĉinoj, ekuzas Esperanton por internaciaj kontaktoj grandskale, subite la eŭropanoj ankaŭ rimarkas, ke Esperanto povas esti ankaŭ la taŭga interkomprenilo por ili.

## III. Kial Esperanto por la Internaciaj Kontaktoj de Ĉinio?

Por Ĉinio la decido, enkonduki Esperanton kiel interkomprenilon dum internaciaj kontaktoj, estus politike tre avantaĝa. La persisto, abortigi la ekskoloniajn lingvojn kiel nuraj interkompreniloj, igas la ne-eŭropajn ŝtatojn samrajtaj partneroj, almenaŭ lingve. Tio plifortigos la memfidon kaj donos al Ĉinio multajn laŭdojn de la aliaj ne-eŭropaj ŝtatoj. Ankaŭ la cetera mondo ne povas protesti, ĉar Ĉinio ja ne altrudas la propran lingvon sed neŭtralan, kio verŝajne estos unika en la tuta mondhistorio. La decido por Esperanto do alportos grandan honoron al Ĉinio inter la ŝtatoj de la mondo.

En nia socio la homoj loĝas tre izolaj. Ni esperantistoj kontraŭe ŝatas kontaktojn, precipe al eksterlandanoj. Ankaŭ tio estas bona argumento al viaj ŝtataj instancoj, ĉar preskaŭ nur helpe de esperantistoj viaj samlandanoj trovas tuj amikojn ĉi tie.

## Pli da tradukistoj ol delegitoj

Nun la Eŭropa Ekonomia Komunumo uzas ses laborlin-

gvojn, nome la anglan, francan, germanan, danlandan, nederlandan kaj italan lingvojn. La traduka personaro estas kolosa. Ĝi konsistas el 400 interpretistoj kaj 520 tradukistoj. La nombro multe superas tiun de UN kun 103 interpretistoj kaj 85 tradukistoj.

En servo al la diversaj konferencoj de la Komunumo okazantaj en ĉiu jaro kun partopreno de pli ol 9,000 delegitoj, oni bezonas sume 80,000 okho-

rajn tradukajn labortagojn kaj pretigas dokumentojn kaj informojn kun 450,000 paĝoj. La elspezo por traduka laboro atingas 20,000,000 dolarojn ĉiujare.

Se la Komunumo akceptos Portugalujon, Hispanujon kaj Grekujon kiel siajn membrojn, tiam ĝi uzos naŭ laborlingvojn. Laŭ statistiko, en multaj kazoj la nombro de tradukistoj superas tiun de delegitoj.

(Citaĵo el *Monda Kulturo*)

(Daŭrigo de p. 3)

fariĝis nova homo vivanta el sia laboro. Krome, oni edukis kaj transformis ankaŭ la Kuomintangajn militajn krimulojn, por ke ili ĉesu malbonfari. Post la amnestio, nemalmultaj el ili fariĝis patriotoj. Iuj havantaj labor-kapablon ricevis laboron, aliaj aktive partoprenas en diversaj sociaj aktivecoj.

Trie, la ĉina leĝa sistemo ne nur garantias la rajton de la civitanoj pri vasta demokratio, sed ankaŭ plene enkorpiĝas la socialisman demokratian principon en praktikado de la leĝa sistemo.

La ĉina konstitucio kondiĉas, ke la popola juĝejo praktikas la sistemon de popola asesoro. En traktado de grava kontraŭevolucia aŭ kriminala kazo, necesas diskuto de la amasoj kaj iliaj opinioj pri ĝi. Escepte de specialaj okazoj pritraktitaj de la leĝo, la juĝado estas farata publike kaj la akuzito rajtas fari pledon.

La popolaj asesoroj de Ĉinio radikale diferencas de tiuj de la kapitalismaj landoj en la asesora sistemo. La statuso de la an-

taŭaj ne estas limigita de posedado, loĝ-tempo kaj raso. En traktado de la kazoj ili estas membroj de la juĝistaro kaj havas egalajn rajtojn kiel aliaj juĝistoj. Kiam ili malsamopiniis kun aliaj juĝistoj, ili kune voĉdonas laŭ la principo "la malplimulto devas submetiĝi al la plimulto".

Laŭ la kondiĉo de la ĉina leĝo, la pledantoj kaj la pledrajtoj povas esti tre diversaj. La "Organiza Leĝo de la Popola Juĝejo" kondiĉas, ke laŭ la naturo de la kazo kaj la peto de la akuzito, pledanto povas esti advokato komisiita de la akuzito, aŭ civitano rekomendita de la popola organizaĵo kaj konsentita de la juĝejo, aŭ parenco de la akuzito aŭ ties protektanto. La popola juĝejo, se necese, ankaŭ povas proponi pledanton por akuzito. Kvankam Ĉinio ne havas privatan advokaton, tamen en diversaj lokoj estas jura konsilantaro kun profesiaj aŭ kumulaj advokatoj. Ili skribas por akuzito jurajn notojn, respondas jurajn demandojn kaj laboras kiel pledantoj de kriminalaj kazoj kaj agentoj de civilaj kazoj. En Beijing (Pekino), akuzito devas pagi nur 20-30

juanojn al advokato por unu kazo ĝenerale.

Nun regule okazas la publika juĝado. La juĝkunvenon de iuj gravaj kazoj ĉeestas eĉ 600-700 homoj. Laboristoj kaj oficistoj de mia institucio plurfoje partoprenis en diskutado pri gravaj kriminalaj kazoj. En la diskutado ili donis siajn opiniojn pri kondamno de krimuloj. Tia demokratia leĝa sistemo ne nur ĝuigis al la popolo la rajton de mastro, sed ankaŭ donis al ĝi edukon pri leĝa sistemo.

Dum praktikado de leĝa sistemo la juraj organoj devas garanti la homajn rajtojn, persisti ĉe la principo ke ĉiuj estas egalrajtaj antaŭ la leĝo, kaj puni tiujn, kiuj atencas la leĝon.

Por konstrui sin en modernan, alte demokratian kaj civilizitan socialisman landon, Ĉinio devas pluapase plifortigi la socialisman leĝan sistemon. En la pasintaj 30 jaroj, la konstruo de la leĝa sistemo de la nova Ĉinio estis fruktodona, tamen la sistemo ankoraŭ ne perfektigis. Iuj leĝoj, kiel "Civila Leĝo" kaj "Leĝo de Civila Proceso", estas en preparado, kaj aliaj, kiel "Leĝo de Geedzeco" bezonas amendon laŭ la nova situacio.





GE BAOQUAN\*:

## Rememoro pri Verda Majo, kunbatalantino de la ĉina popolo

Mi amas Japanion, ĉar ĝi estas mia patrio, kie vivas miaj gepatroj, gefratoj, geparencoj kaj geamikoj — kun multe da karmemoroj.

Mi amas Ĉinion, ĉar ĝi estas mia nova hejmlando, kie min ĉirkaŭas multaj bonkoraj kaj laboremaj kamaradoj.

Mi malamas, per mia tuto malamegas la hommurdon inter la du popoloj. . .

Kiel esperantisto, kiel internacia kulturamanto, mi deziras defendon de la ĉina civilizo for de la rabista ungego. Kiel virino, kiel homo, mi instinkte sopiras pacon.

Sed nun mi volonte aliĝus la ĉinan armeon, se eble, ĉar ĝi batalas por la liberigo de l' nacio, ne kontraŭ la japana popolo, sed kontraŭ la japanaj imperiistoj, kaj plie ĝia venko destinos ankaŭ la helan estonton de la Oriento.

En julio la aŭtorino de la artikolo "Amo kaj Malamo" venis al la centro de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Wuhan. Tiutempe ŝi partoprenis en literatura kaj arta kunveno okazigita de la Ĉina Tutlanda Kontraŭjapana Asocio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj kaj parolis Esperante en ĝi, kaj verkis artikolon "Pri Intervjuo de Mal-

**K**IAM sakuroj en la parko Ueno de Tokio kaj en la parko Tiantan de Beijing estis pompe florantaj kaj kiam la ĉarma kaj verda majo venis, mi ofte pensis pri la japana esperantistino kaj brava internaciisma batalantino Verda Majo. Ŝia japana nomo estis Hasegaŭa Teru, sed ni esperantistoj pli ŝatis ŝian nomon uzatan en Ĉinio Verda Majo kaj ĉiam tiel ŝin nomis. Kiel bela kaj poezia nomo ĝi estis! Ĝi simbolas junecon, vigecon kaj ĝojon kaj samtempe ankaŭ senliman varmon, lumon kaj esperon!

Tio okazis en Wuhan antaŭ 42 jaroj. En majo de 1938 mi partoprenis en laboro de la redakcio de la tagjurnalo Xinhua sub la gvido de estimata kamarado Zhou Enlai. En la ĵurnalo de la 8-a de junio publikiĝis artikolo kun titolo "Amo kaj Malamo". La redaktoro diris en la noto de la artikolo: "Tiu ĉi artikolo estas verkita de japana

esperantistino, kiu vivas en la batalanta Ĉinio. En ĝi ŝi esprimis sian fortan malamon kontraŭ la japana imperiismo." La aŭtorino faris indignan akuzon kontraŭ la kanonado kaj bombardo fare de la japanaj militaristoj al Shanghai je la 13-a de aŭgusto 1937. Ŝi skribis:

La urbon internacian (Shanghai) kovras fajro kaj fumo, leviĝas krioj de teruro kaj timo.

Ektondris kanono, surprizante la terure kvietan aeron de tagmezo. Nun tie, certe falis kelkcent homoj. . .

Nokte. Min vekis bruo de pafado. La okuloj plu ne volas sin fermi, kaj mi suriris la balkonon. Nordokcidenta ĉielo ruĝas en tremiga beleco. . .

Ne, ne! mi neniam povas forgesi, . . .

Mia koro krias: — For la militon por ambaŭ popoloj!

*Verda Majo*

juna Sinjorino Zhao”, patrino de gerilanoj de nordorienta Ĉinio. La maljunulino diris al ŝi: “Via gepatra lando estas Japanio kaj via edza lando estas Ĉinio. Niaj du landoj nun bezonas personon kiel vin. Mi tre konsentas tion, ke vi venas al nia Ĉinio por helpi nin, dankon!” Je la 20-a de aŭgusto la tagjurnalo Xinhua aperigis “Konsolan leteron de japana amikino” en la nomo de Verda Majo. En ĝi ŝi unue “sincere salutas la heroojn defendantajn la ĉinan nacion per la vivo”, poste ŝi daŭrigis:

Se mi havus cent korpojn, mi irus al japana armeo en la fronto kaj interparolus kun ili, por ke ili ne masakru ĉinajn fratojn; se mi havus mil manojn, mi irus al ĉiuj frontoj por bandaĝi la vundojn de ĉinaj soldatoj kaj lavi por vi la vestojn. Sed, bedaŭrinde, mi havas nur unu korpon kaj paron da manoj, mi devas resti en Hankou por fari postfrontan servon. Sed mi pene daŭrigos tion, ĉar la afero estas necesa.

Karaj frontaj fratoj!

La japana armeo dependas nur de bonaj armiloj, tamen tiaj armiloj efikas malpli ol via kuraĝo kaj

malpli ol via unuiĝo. Ĉar ili ne havas justecon en la milito. . . Vi senkompate kaj obstine batalu! Ankaŭ mi ĉiamaniere subtenos vian reziston en la postfronto.

En tiu tempo, mi unuafoje vidiĝis kun Verda Majo kaj ŝia ĉina edzo Liu Ren. Sed pli da kontaktiĝoj inter ni okazis post la retiriĝo de Wuhan al Chongqing. Tiam ili loĝis en Datianwan de Chongqing, kiu estis frekventata de esperantistoj. Ĉiufoje, kiam mi vizitis Verdajn Majon kaj Liu Ren, mi ricevis ilian intiman akcepton. Ni interparolis en la lingvoj ĉina, japana kaj Esperanto. Sendube, kiam ŝi ne komprenis min, Liu Ren nature fariĝis interpretisto. En mia memoro, Liu Ren estis senĝena, dum Verda Majo estis kvietaj kaj bonkora. Verda Majo ĉiam portis modestajn vestojn kaj traktis aliulojn ĉiam intime, tra ŝiaj miopaj okulvitroj ĉiam montriĝis afableco. Ŝi havis ne altan staturon, sed firman volon! Se ne, kiel ŝi povis forlasi siajn patrolandon kaj karulojn, veni al Ĉinio, kaj fariĝi brava kunbatalantino de la ĉina popolo en la malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Ekde tiam Verda Majo aktive partoprenis en kontraŭjapana aktivado de la progresaj kulturaj rondoj kaj ofte verkis artikolojn por la tagjurnalo Xinhua. Je la 15-a de decembro 1938 — la 79-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, ŝi skribis por la speciala memoriga suplemento redaktata de la tagjurnalo Xinhua leteron “Al la Tutmonda Esperantistaro”, en kiu ŝi akuzis la japanajn militaristojn pri iliaj kruelecaĵoj en la agresiva milito kontraŭ Ĉinio kaj alvokis la tutmondajn esperantistojn unuiĝi por faligi la faŝistajn agresantojn:


Nia Esperanto estas lingvo por konstrui la pacon de la homaro. Nia Esperanto jam fariĝis lingvo de Romain Rolland, lingvo de Gorkij, kaj lingvo de Marks. K-doĵ, ĉu ni povus doni al la agentoj de faŝistoj, al tiuj ekzekutistoj? K-doĵ, ni devas unuiĝi, ni devas ataki ilin, kaj forŝiri ilian maskon.

Niaj k-doĵ estas ĉie en la mondo, kaj nia voĉo povas atingi ajnan anguleton de l’ terĝlobo. Krom tio, ni esperantistoj estas esence avangardo por paco, sekve ni havas devon pligrandigi ĉirkaŭ ni nian unuecfronton.

Post la dufoja bombardo fare de japanaj aviadiloj je la 3-a kaj 4-a de majo, nemalmultaj lokoj de la monturbo Chongqing estis ruinigitaj, ni urĝe forfuĝis al la ĉirkaŭurbo. Verda Majo transloĝiĝis, kune kun la Komitato de Kultura Laboro sub la gvido de kamarado Guo Moruo, en ĝian najbaran vilaĝon Jingang. Iun someran tagon, mi iris viziti ŝin. Tiam ŝi jam havis unu bebon Xingxing kaj suferis de ftizo, sed ŝi ankoraŭ persone preparis abundan tagmanĝon por min regali. Tiu sceno ĝis nun klare restas en mia memoro.

\* La aŭtoro Ge Baoquan estas fama esploristo pri fremdlanda literaturo, tradukisto kaj membro de la Konsilantaro de ĈEL.

### Verda Majo al la nova vivo



# Karmemore al japana esperantisto Mijake Ŝihej



*S-ro Mijake Ŝihej*

**A**NTAŬ nelonge mia japana amiko esperantisto Muramacu Jukijoŝi letere informis min, ke Mijake Ŝihej, ekssekretario de la Japana Esperanto-Instituto, forpasis la 29-an de majo de la kuranta jaro. Tio ne skuis min nek doloris min ĝis larmoj. Mi nur sentis, ke mia kapo ĉesis labori. Post longe mi rekonsciiĝis iom post iom. "Ho, li forlasis tiun ĉi mondon!" Mi povis eldiri nur tiun solan frazon. Tuj poste, lia figuro ekaperis en mia memoro.

Li havis mezan staturon kaj portis miopajn okulvitrojn. Kiam mi unuafoje vidis lin, li aspektis tre malgrasa. Li ĉiam laboris ĉe sia tablo kun klinita kapo (Ĉiufoje, kiam mi venis en la Japanan Esperanto-Instituton, mi vidis lin tiel labori). En lia absorbiĝo oni povis imagi, ke li havas multajn aferojn farendajn kaj tre serioze traktas ĉiun el ili. Efektive tiel estis. Kiel sekretario de la Japana Esperanto-Instituto, li devis plenumi ĉiujn aferojn grandajn kaj malgrandajn.

Li, tamen, ne estis apatia. Min impresis liaj intimeco kaj afableco. Ĉiufoje, kiam li vidis min alveninta, li tuj vigliĝis, kvazaŭ renkontiĝante kun malnova amiko kaj volante eldiri al mi multajn aferojn. Li ja vere havis iujn aferojn por diri. Kaj lia parolo estis tre interesa kaj de tempo al tempo vekis ridojn akompanatajn de lia serioza humuro.

Mi konatiĝis kun li en Tokio en 1936. Tiam li estis ankoraŭ juna kaj iom pli aĝa ol mi. Pere de li, mi konatiĝis kun aliaj du junaj japanaj esperantistoj Nakagaki Toraĝiro kaj Oŝima Joŝio alinomata Takagi Hiroŝi (Alta Arbo). Nelonge post nia interkonatiĝo, ili kune invitis min al festeno por montri bonvenon kaj amikecon al mi. Tiam la japanaj militaristoj jam invadis Ĉinion. Ilia amikeco komprenigis min, ke oni devas distingi la japanan popolon de la japanaj militaristoj.

Tiel mi fariĝis ilia bona amiko. Ni ofte interbabilis kaj promenis. Precipe Nakagaki

Toraĝiro havis pli multe da libera tempo pro senlaboreco. Ili ĉiuj estis ordinaraj homoj kun multaj scioj kaj alta idealo, ke la homoj en la mondo fariĝos egalrajtaj, liberaj kaj feliĉaj, vivos harmonie kaj ne ekspluatos kaj subpremos unu alian. Por efektivi tiun idealon, ili faris siajn klopodojn. Tio montriĝis en ilia energia laborado por Esperanto. En tiu flanko Nakagaki Toraĝiro pli multe dediĉis siajn fortojn. Krom esperantigi multajn japanajn progremajn literaturajn verkojn, li ankaŭ partoprenis en iuj politikaj aktivecoj por popoldemokratiaj rajtoj. Pro tio li estis senrajtigita havi profesion. Li malfacile sin vivtenis kaj ofte ne kapablis pagi la luprezon, por ne paroli pri fondo de familio.

La kondiĉoj de Mijake Ŝihej estis iom pli bonaj. Almenaŭ lia vivo havis garantion, ĉar li povis ricevi sumon da salajro de la Japana Esperanto-Instituto. En la tempo, kiam la japanaj militaristoj furiozis kaj poste invadis Ĉinion, kaj en la tempo



de la Dua Mondmilito, la Japana Esperanto-Instituto ne estis porfermita kiel en la Hitlera Germanio. Ke ne tute ĉesis la japana Esperanta movado, tion oni devas atribui, mi pensas, ankaŭ al li.

Sub ilia influo mi aliĝis al JEI. Tamen mi ne multe laboris por ĝi. Mi nur faris raportojn pri lernado de Esperanto kaj instruis tiun lingvon al ĉinaj studentoj. Ili ofte uzis la sidejon de JEI por okazigi studrondojn en dimanĉo, en kiuj mi kompreneble partoprenis. Post tio ni ĝoje kantis ĉinajn popularajn kantojn, kiel "La Vojo". Ĉar tiam ni estis tre junaj kaj mankis al ni vivsperto, ni ne atendis, ke japanaj sekretaj policanoj eĉ nin atentis kaj kaŝobservis. Iun tagon Mijake Ŝihej informis min, ke la japana ĝendarma taĉmento iam venis en la instituton por demandi pri ni. Pro manko de ĝustatempa singardemo, mi falis en danĝeron. Tio okazis unu monaton antaŭ la Incidento de Lugouqiao. En la 4-a horo en iu mateno, japanaj sekretaj policanoj subite frapis mian pordon, vekis min kaj traserĉis mian loĝejon. Fine ili kondukis min al la policejo de Kanda-distrikto de Tokio kaj ĵetfermis min en la kelon.

Mi forlasis la kelon nur fruaŭtune de 1937. La pli-malpli longa enkarcerigo multe malgrasigis min kaj kaŭzis al mi neŭrastenion. Kelkfoje sendormeco atakis min tutnokte. Sed la japanaj policanoj ankoraŭ rigardis min kiel danĝeran homon kaj ne permesis al mi resti en Japanio. Tiu loko, mi devas diri, ne estis sopirinda por mi. Tamen mi tenis en mia memoro tiujn japanajn amikojn. Ĉu mia afero implikis ilin? Kun tiu

demando mi forlasis Japanion, tamen mi esperis revidi ilin.

Vere venis la ŝanco. Kiel membro de la Ĉina Verkista Delegacio mi flugis al Tokio en la printempo de 1961 por ĉeesti la Urĝan Konferencon de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj. Tiam la diplomataj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio ankoraŭ ne restariĝis. La japanaj aŭtoritatoj ankoraŭ sin gardis kontraŭ ni, venintaj de la socialisma lando. Ĉie, kien ni atingis, sekreta policano en civila vesto nin sekvis kiel ombro. Ankaŭ en nia hotelo nin akompanis kelkaj sekretaj policanoj. Malgraŭ tio, Nakagaki Toraĝiro, Oŝima Joŝio kaj Takasugi Iĝiro kuraĝe venis al la hotelo por min viziti. Nur Mijake Ŝihej ne venis. Antaŭ kelka tempo li skribis al mi leteron, ankaŭ mi respondis lin kun tiaj entuziasmo kaj intimo, kiajn mi havis en mia juneco. Tamen mi informiĝis, ke li malsaniĝis. Mi volis lin viziti, sed mi tuj retiris mian deziron, ĉar mi timis, ke la kaŝobservado de sekreta policano pligravigus lian malsanon. Tamen mi esperis revidi lin en favora situacio.

Kvankam Mijake Ŝihej forlasis nin, tamen lia figuro ankoraŭ freŝe restas en mia memoro. La kontribuo de li kaj aliaj japanaj esperantistoj por la interkompreno inter la homoj kaj por nia komuna afero de Esperanto ĉiam inspiris min. Nun la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kunlaboras kun senprecedenca entuziasmo por antaŭenigi la laboron de tiu internacia lingvo. Tiel statas ne nur en Ĉinio kaj Japanio, sed ankaŭ en la tuta mondo. Tia disvolviĝo estas ankaŭ daŭrigo de la spirito de Mijake Ŝihej kaj neniam ĉesos.



## NOVA ESP-ENTREPRENO EN USONO

Antaŭ nelonge naskiĝis la Sudorienta Esperanto-Centro en Usono, ĝi celas prezenti Esperanton kaj Esp-aktivecojn al la sudorienta regiono de Usono. Ĝi volas ne nur eldoni verkojn de usonaj aŭtoroj kaj tradukantoj, sed ankaŭ agi por ŝtopi kelkajn truojn troveblajn en la esperantista mondo, precipe en la sciencfikcia kampo. Adr.: SEC, Poŝtkesto 1042, Indian Rocks Beach, FL 33535, Usono.

## EPĈ EN ESPERANTA EKSPOZICIO

Lastatempe nia itala amiko Sandro Venturini okazigis Esp-ekspoziciojn ĉe la Biblioteko Komunala de Scorze kaj la Foiro de Padova. En ili montriĝis ĉinaj eldonaĵoj inkluzive EPĈ, kun aparta klarigo: "El Popola Ĉinio. Ĉinio en nia domo ne per nia interpreto, sed el ilia originala ekspozicio!" Ni esprimas nian koran dankon al s-ro Sandro Venturini pro lia afableco.

## AKTIVADO DE LA JUNULARA KULTURDOMO

La Junulara Kulturdomo, Warszawa, Pollando, fondis por gejunuloj kaj geknaboj la Internacian Esperanto-Klubon de Amikeco, kun la celo fari korespondan aktivadon. Kiu nur minimume kvarfoje en la jaro skribas al la klubo leterojn, tiu povas membriĝi al la klubo. Ankaŭ plenkreskuloj povas fariĝi amikoj de la klubo.

Nun aliĝis al ĝi geknaboj kaj plenkreskuloj el 21 landoj. Adr.: Internacia Esperanto-Klubo de Amikeco, Junulara Kulturdomo, ul. Deotymy 37, 01-441 Warszawa, Pollando.

---

**ESP-KUNVENO EN SHANGHAI**


---

Je la 21-a de junio la Shanghai-a Sociologia Federacio kunvokis la urban Esperantan labor-kunvenon. Ĝin ĉeestis Luo Zhufeng, vicprezidanto de la nomita federacio, Cai Beihua, vicprezidanto de la Shanghai-a Sociologia Akademio, Liu Huozi kaj Xian Xijia, ĈEL-komitatoj en Shanghai, kaj aliaj 40 esperantistoj el diversaj frontoj. K-do Luo Zhufeng donis paroladon pri disvolvo de Esp-laboro. Rememorante pri la historio de la Ĉina Esp-movado, li diris, ke dank' al sia multa klopodado la Sanhaja Esperantista Ligo turnis la urbon en centron de la ĉina Esp-movado en la 30-aj jaroj. Li esperis, ke la ĉeestantoj heredos tiun gloran tradicion, aktive disvolvos Esp-laboron en la nova historia periodo kaj faros kontribuon por akceli la modernigan konstruadon de la lando. En la kunveno oni raportis pri Esp-movado de la lando kaj de la urbo, kaj la ĉeestantoj unuanime aprobis la decidon pri starigo de la prepara grupo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio. La prepara grupo konsistas el Wang Yapu, Liu Huozi, Xian Xijia, Wei Yuanshu kaj aliaj tri personoj. La prepara grupo ellaboris la ĉi-jaran labor-planon.

*K-do Luo Zhufeng parolas en la Shanghai-a Esperanta Labor-kunveno.*




---

**NASKIĜIS WUHAN-A ESP-ASOCIO**


---

Je la 8-a de junio la Wuhan-a Esp-grupo okazigis la urban Esperantan labor-kunvenon kun 250 partoprenantoj. La kunveno deklaris la fondiĝon de la Wuhan-a Esperanto-Asocio. Sun Zhen'ou estis elektita kiel ĝia prezidanto kaj Kang Taizhang, Zhang Bingnan kaj Liu Hanlin kiel ĝiaj vicprezidantoj. Zhou Juguang, vicedestro de la Wuhan-a Kultura Buroo, kaj Xia Bangxin, vicprezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio, ĉeestis la kunvenon por gratuli. La kunvenon atingis ankaŭ gratulaj leteroj kaj telegramoj el diversaj partoj de la lando. La kunvenantoj pridiskutis la statuton de la asocio kaj la raporton pri Esp-laboro. Ili montris volon fervore propagandi, disvastigi kaj studi Esperanton, kulturi novajn esperantistojn, pliigi kulturan kaj akademian interfluron kun esp-istoj kaj Esp-organizoj de amikaj landoj kaj kontribui al la

moderniga konstruado de Ĉinio kaj defendo de la mondpaco. Post la kunveno oni vizitis Esp-ekspozicion. La ĵurnaloj, radiostacioj kaj televiziaj stacioj raportis pri tiu kunveno.

---

**RENKONTIĜO KUN DANLANDA ESPERANTISTO**


---

De la 7-a ĝis la 22-a de julio, Prof. Paul Neergaard, fame konata danlanda sempatologo kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, vizitis Ĉinion laŭ invito de la Agrikultura Ministerio de Ĉinio. Li vizitis la urbon Shanghai kaj la provincojn Shaanxi (Ŝenhi) kaj Jiangsu kaj havis fakajn kunsidojn kun tieaj koncernaj sciencistoj. En Beijing, li kunsidis, krom kun botanikopatologiaj esploristoj de la Agrikultura Ministerio kaj la Beijing-a Agrikultura Universitato, ankaŭ kun esperantistoj. Respondecoj de la Ĉina Esperanto-Ligo invitis lin al vespermanĝo.



*La ĉeestantoj de la Labor-kunveno de la Wuhan-a Esperanto - Asocio*



# Mjaŭ-nacieca Kantistino Awang

Awang estas fama kantistino de Mjaŭ-nacieco de Ĉinio. Ŝi naskiĝis en Guizhou-provinco.

La mjaŭ-oj estas lertaj en kantado kaj dancado, kaj Awang amas kanti jam de sia infaneco por esprimi siajn sentojn, akuzi la malnovan socion kaj aspiri la belan futuron.

En 1952 Awang fariĝis solistino de la Guizhou-a Nacieca Ensemblo. Ekde 1962 ŝi lernis en la Shanghai-a Konservatorio. Dank' al tio Awang multe rafinis sian arton kaj fariĝis fama kantistino. Ŝia voĉo estas sonora, modesta, dolĉa kaj delikata en sento-esprimo kaj spiras fortan spiron de ŝia hejmloko. En la pasintaj jaroj ŝi kantis multajn mjaŭ-ajn kantojn kolektitajn kaj modifitajn de ŝi, inter kiuj iuj estis surdiskigitaj kaj ĉirkulas tra Ĉinio.

Fotoj de REN REN



Awang en kantado

Inter junaj kantistinoj





Ankaŭ ŝia unua filino Lang-ou estas kantistino de la ensemblo.



Awang kaj komponisto kunlaboras por modifi popolan kanton.

La familio de Awang





# Hortikultura Inĝeniero Zhou Qinglong

Zhou Qinglong fariĝis hortikultura inĝeniero antaŭ 25 jaroj. Nun li estas vicestro de la Hortikultura Buroo de Guiyang kaj vicprezidanto de la Guizhou-provinca Arbara Asocio. Li partoprenis en la projektado de la parkoj Huaxi, Nanjiao, Qianling k.a. fame konataj en Guizhou-provinco. En la lastaj jaroj, la semo-kulturado de kolombo-arbo (*Davidia involuerata*) kaj kolektado kaj kulturado de orki-deaj specioj sub lia direktado rikoltis relative bonan rezulton.

Fotoj de YAN JIN



Zhou Qinglong esploras greltadon.

Por hortikultura plano

Direktado en forcejo





Jen ruĝvertaj grupoj bredataj. Ili estas raraj kaj migrantaj birdoj de Ĉinio, altas je pli ol 1.2 metroj kaj havas blankajn plumojn kaj ruĝan ver-ton. Ili povas fari longdistan-can flugadon kaj kvakas laŭte. Nia popolo kutime rigardas ilin kiel simbolon de feliĉo kaj longa vivo.



La kvin kvadrataj sarin-aj pagodoj sur vajra soklo kun arka pordo en Huhhot de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio konstruitaj el glazuritaj brikoj en la erao Yongzheng (1723-1735) de Qing-dinastio




## D-RO PAUL NEERGAARD EN LA NORDOKCIDENTA AGRONOMIA INSTITUTO

De la 10-a ĝis la 12-a de julio 1980, D-ro Paul Neergaard vizitis la Nordokcidentan Agronomian Instituton laŭ invito de Prof. Chou Io, komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo, ĉefredaktoro de la gazeto "Entomotaxonomia" (Insekta Klasifiko) kaj fame konata entomologo. Li kunsidis kun esperantistoj de la redakcio de "Entomotaxonomia" kaj la Nordokcidenta Agronomia Instituto kaj faris raporton pri sia Esperanta aktivado de 56 jaroj kaj pri la Esperanta movado en diversaj landoj de Eŭropo kaj varme diskutis la problemon pri servado de Esperanto al sciencoj. La kunsidantoj ĉiuj opiniis, ke kombino de Esperanto kun scienco estas laŭdinda granda afero. Antaŭ sia aŭdiaŭo D-ro Paul Neergaard ĝoje diris, ke li esperas ke li povos fari sciencajn esplorojn en la instituto kaj starigos Esperantan kurson kune kun tieaj esperantistoj. En Wugong li havis fakan kunsidon kun tieaj sciencaj laborantoj kaj en Xi'an vizitis historiajn vidindaĵojn kiaj elfositaj militistaj kaj ĉevalaj statuoj de la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj Huaqing-baseno.

### ESP-ISTOJ KUNVENIS EN GUIYANG KAJ XI'AN

Antaŭ nelonge esp-istoj de Guiyang-regiono kunsidis pri la



*D-ro Paul Neergaard, Chou Io, Lu Jinsheng kaj Li Kexi en la Nordokcidenta Agrikultura Kolegio*



*Parto de la esperantistoj de Xi'an*

disvolviĝo de Esp-movado en Guizhou-provinco kaj interŝanĝo de spertoj en lernado de la lingvo. Respondeculo de la Propaganda Departamento de la Guizhou-a Komitato de KPĈ kaj de la Guizhou-a Laborista Sindikato ĉeestis la kunsidon laŭ invito. En la kunsido Mao Guoqi, profesoro de Guizhou-universitato, faris parolon pri Esperanto. La kunsido plupaŝe akcelos Esp-movadon en tiu regiono.

Antaŭ nelonge esp-istoj de Xi'an, la ĉefurbo de Shaanxi-provinco, kunvenis en Xingqing-parko de la urbo por interŝanĝi opiniojn pri disvolvo de Esp-laboro kaj fondo de la urba Esp-asocio.

### ESP-RAPORTO EN XINJIANG

En la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de nordokcidenta Ĉinio loĝas pli ol dek naciecoj, kiel la ujuguroj, kazahoj, hujoj, mongoloj kaj taĝikoj. Por konigi Esperanton

al la popolo, la Xinjiang-a Lingva Asocio okazigis raportan kunvenon en la 6-a de junio en la Xinjiang-a Pedagogia Instituto. En la kunveno Liu Zhiqiang faris raporton "Esperanto en Marŝo" pri naskiĝo kaj evoluo de Esperanto, ĝia historio en Ĉinio, ĝia literaturo kaj perspektivo. La raporto vekis intereson de multaj naciminoritataj kadroj. Kaj post la kunveno oni petis de la raportinto lernomaterialon.

### INFORMO EL IRLANDO

Nia leganto s-ro Kristofero Fettes informis nin pri la jeno: "Internacia klaso en irlanda lernejo uzas EPĈ-n kiel lernolibron. La dek du knaboj en la bildo venas el Aŭstrio, Britio, Grekio, Japanio, Malajzio kaj Niĝerio; inter ili troviĝas la filo de la nova irlanda ambasadoro en Pekino: li esperas renkonti ĉinajn esperantistojn dum sia vizito al Ĉinio ĉi-somere."







# La nacia ekonomio de Ĉinio en stabila disvolviĝo

*Bonkvalitaj lan-tapiŝoj produktitaj de la Shijiazhuang-a Lan-teksa Fabriko*

de XIAO DONG

**E**KDE 1979 Ĉinio alprenis principon por reguligi la nacian ekonomion, bone trakti la proporciajn rilatojn inter ĉiuj branĉoj de nacia ekonomio, konforme al la bezono de la modernigo de agrikulturo, industrio, sciencoj kaj teknikoj kaj nacidefendo de la lando. La unujara praktiko montris, ke la socialisma konstruado de Ĉinio komencis disvolviĝi normale kaj ricevis rimarkindajn sukcesojn.

## **KARAKTERIZAJOJ DE LA EKONOMIA DISVOLVIĜO**

Laŭorde de agrikulturo, malpeza industrio kaj peza industrio, la karakterizaĵoj de la ekonomia disvolviĝo en la pasinta jaro estas:

Kompare rapida estas la kreskado de la agrikultura produktado. La totala produktovaloro de agrikulturo en 1979 estis 108.6% de tiu en 1978. Ankaŭ forstumado, brutobredado kaj flankokupo kompare multe kreskis. En 1979, la produktokvanto de greno pliiĝis je 27,350,000 tunoj, dum la pliiĝo de greno en 1978 estis 22,000,000 tunoj, nome en la lastaj du jaroj la meznombra kreskado estis 8.3%. Tia amplekso de kreskado estis tre malofta en la historio. Pro pliiĝo de produktokvanto de greno, la kvanto de la greno aĉetita de la ŝtato kreskis je 10.9% kompare kun tiu de 1978. Kaj la grenporcio por kamparanoj pliiĝis meznombro je 5.2%. Nun tre vigla estas la

kampara ekonomio kaj la kamparanoj estas kontentaj.

La kreskado de la malpeza industrio superis tiun de la peza industrio. En 1979 la produktovaloro de la malpeza industrio de la tuta lando kreskis je 9.6% kompare kun 1978, dum la kreskado de la peza industrio estis 7.7%; en la unua trimestro de la kuranta jaro, la kreskado de la malpeza industrio estis 24.2%. 23 specoj de produktaĵoj de la malpeza kaj tekstila industrioj, ekzemple, kotona fade-no, ŝtofo, kemifibro, lanfadeno, biciklo, stebilo kaj brakhorloĝo, kreskis je 16-40% kompare kun tiuj en la sama periodo de 1979. La produktokvanto de magnetofonoj, televidiloj kaj radiorice-

viloj kreskis pluroble. La pli rapida disvolviĝo de la malpeza industrio kreis favorajn kondiĉojn por plibonigi la popolan vivon, stabiligi la merkaton kaj pliiĝi la financan enspezon de la ŝtato.

La pliboniĝo de la vivo de la popolo en la urboj kaj la kamparo superis en rapideco la investon al la fundamenta konstruado. Pro tio ke en la pasintaj multaj jaroj la procentoj de la akumulo estis tro grandaj, kio malhelpis la pliboniĝon de la popola vivo, la popola registaro alprenis serion da gravaj rimedoj por laŭeble altigi la nivelon de la popola vivo. En 1979 la totala sumo de la salajro en la tuta lando kreskis je 13.7% kompare kun tiu en 1978, kaj la kreskado de la fakta salajro de la salajratoj en la ŝtataj entreprenoj estis 7.6%. La meznombra enspezo de ĉiu kamparano

en la kolektivo kreskis je 12.7%. Kaj ili ĉiuj superis la pliiĝon (4.4%) de la investaĵoj al la fundamenta konstruado. En 1979 la ŝtato enoficigis en la urboj kaj urbetoj 9,026,000 senlaborajn gejunulojn, diplomitojn de superaj kaj mezgradaj lernejoj kaj aliajn personojn. La totala sumo de podetale venditaj varoj en la urboj kaj la kamparo kreskis je 14.7% kompare kun tiu de 1978, kaj la kvanto de venditaj ĉefaj konsumaĵoj kreskis grandpocente. La kvanto de porkaĵoj venditaj en la urboj kreskis je 25% kompare kun 1978, tiu de ovo — 54.5%, tiu de kotona ŝtofo — 3.6%. En 1979 la ŝtato konstruigis loĝdomojn kun plankareo de 62,560,000 kvadrataj metroj, kiuj superis tiujn en 1978 je 66%, kaj tiu jaro estis ankaŭ la jaro, en kiu oni konstruis loĝdomojn plejmulte post la fondiĝo de la respubliko.

Altigiĝis la ekonomia efiko. En 1979 la tuta labora produktiveco de ŝtataj industriaj entreprenoj kreskis je 6.4% kompare kun tiu en 1978, 62 procentoj de la nove pliiĝita produktovaloro de la industrio estis kreitaj de altigo de labora produktiveco, kaj ŝanĝiĝis la ŝtato, ke oni altigis produktadon ĉefe per pliiĝo de laboristoj. La kvalito de multaj industriaĵoj estis altigita. La statistiko pri la 30 kvalitaj normoj de la 7 industria branĉoj de metalurgio, karbo, petrolo, kemio, konstrua materialo, malpeza industrio kaj tekstilo montris, ke en 1976 nur unu normo tenis la plej bonan rekordon de la historio, dum en la unua trimestro de 1980, 20 normoj atingis aŭ superis la plej bonan nivelon en la historio. Reduktiĝis ankaŭ la konsumitaj materialoj, la norma hejtajo por industria produktovaloro de ĉiu dekmilo da juanoj malpliiĝis je

*Brakhorloĝoj "Juvelfloro" fabrikitaj de Shanghai*



5% kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro.

## EFEKTIVIGO DE PRINCIPOJ KAJ POLITIKOJ

La granda sukceso en la disvolvo de la nacia ekonomio en la lasta jaro estis akirita ĉefe pro efektivigo de serio da ĝustaj principoj kaj politikoj ellaboritaj de la Kompartio.

1. La partiaj organizoj kaj la popolaj registaroj de diversaj niveloj donis pli grandan prizorgon al ekonomio. Ekde 1979, en la tuta lando aperis la politika situacio de stabileco kaj unuiĝo. Escepte de malmultaj entreprenoj, la gvidantoj de diversaj niveloj povas koncentri sian energion sur ĝustatempan konsideron kaj solvon de multaj gravaj problemoj en la ekonomia konstruado. Tio multe akcelis la disvolvon de la nacia ekonomio.

2. La ekonomiaj politikoj estis efektivigitaj kaj la objektiva ekonomia leĝo atentata. En 1979, la du agrikulturaj dokumentoj ellaboritaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estis praktikataj en la kamparo, diversaj agrikulturaj politikoj estis serioze plenumitaj, tiel ke la produktaj taĉmentoj havas plimultan sendependecon kaj respondecon en produktado; samtempe kun tio la ŝtato multe altigis la aĉetan prezon de ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj, kio multe stimulis la aktivecon de kamparanoj en produktado. En la industria kaj

komercaj entreprenoj la ŝtato praktikis la distribuan principon "Ĉiu laboru laŭ sia kapablo kaj al ĉiu donu laŭ lia laboro", donis sian atenton al la intereso de la ŝtato, la kolektivoj kaj individuoj, kaj per tio levis la aktivecon de la oficistoj kaj laboristoj.

3. Unuapaŝa provo pri reformo de la administra strukturo de la ekonomio. En 1979 3,300 malsam-specaj entreprenoj faris eksperimentadon por grandigi sendependecon en administrado. Kaj la rezultatoj montris, ke plejparto de tiuj entreprenoj plibonigis sian administradon, disvolvis la produktadon kaj pliigis la akumulon.

4. Sciencoj kaj teknikoj estis akcentataj kaj la eduka afero estis disvolvita. En 1979 2,790 temoj de scienca esplorado ricevis fruktojn en la tuta lando, el ili 42 ricevis sankcion de la ŝtato kiel eltrovaĵoj kaj inventaĵoj. La superaĵ lernejoj kaj teknikaj kolegioj elkulturis grandan nombron da fakuloj, kaj samtempe multaj entreprenoj faris edukadon al siaj oficistoj kaj laboristoj, kio ludis gravan rolon en la akcelo de ekonomia disvolviĝo.

5. Surbaze de memstareco kaj apogo sur siaj propraj fortoj, nia lando disvolvis internacian kunlaboron kaj plivastigis interŝanĝon de ekonomio kaj tekniko inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La totala sumo de importoj kaj eksportoj de Ĉinio en 1979 pliigis je 28% kompare kun 1978, kaj samtempe estis faritaj rekompenca negoco, prilaborado de fremdlandaj krudmaterialoj kaj

muntado, fonditaj entreprenoj kune investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj enkondukitaj kelkaj novaj teknikoj de fremdaj landoj.

## ALFRONTATAJ PROBLEMOJ

La malbeninda subfosado fare de Lin Biao kaj la kvarpersona bando preskaŭ pereigis la nacian ekonomion, tial oni ne povas reguligi en unu aŭ du jaroj la proporciajn malordigitajn de ili kaj solvi ĉiujn malfacilajn problemojn. Nun Ĉinio alfrontas jenajn malfacilojn:

La agrikulturo restas ankoraŭ malforta branĉo en la nacia ekonomio de Ĉinio, la malpeza kaj tekstila industrioj ne povas plenumi la bezonon de la popolo, la liveritaj hejtajoj kaj movoforto montriĝas nesufiĉaj, kaj la transportado kaj trafikado troviĝas en streĉiteco. Por ripari tiujn mankojn oni devas daŭre efektiviĝi ĉiujn politikojn de la Partio pri la agrikulturo, laŭ konkretaj cirkonstancoj disvolvi pluapaŝe la agrikulturon, forstumadon, brutobredadon, flankokupon kaj fiŝkaptadon, doni pli da favoroj al la malpeza kaj tekstila industrioj kaj garantii kompare grandan pligon de iliaj produktaĵoj; pliigi kaj ŝpari energion, rekonstrui kaj kompletigi malfortajn sekciojn de la fervojoj kaj rapidigi konstruadon de havenoj.


Oni devas fari grandan klopodon por altigi ekonomian efikon. Nun en la industria produktado ankoraŭ ne radikale



ŝanĝiĝis la stato de multa konsumiĝo, alta kosto de produktado, malalta kvalito, granda defcito kaj malmulta akumulo. En 1979 ĉiu centoj da juanoj de industria produktovaloro liveris nur 16.5 juanojn da intereso kaj imposto, kio estas malpli alta ol tiu en 1966. Ĉiuj entreprenoj devas alpreni pli efikajn paŝojn, gajni maksimuman ekonomian rezulton per minimumaj homfortoj, monsumoj kaj materialoj kaj aranĝi produktadon laŭ la bezono de la socio.

Ankoraŭ tro multaj estas la objektoj de fundamenta konstruado. En 1979 la ŝtato finkonstruis nombron da grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, kaj ĉesiĝis aŭ prokrastis fundamentan konstruadon de nombro da grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, sed ankoraŭ daŭris la konstruado de 1,187 objektoj, al kiuj la ŝtato ne povis doni sufiĉajn monsumojn kaj materialojn. Nun estas necese ŝanĝi tian staton.


Cetere, kompare malfacila estas la vivo de parto de la kamparanoj kaj laboristoj. En 1979 tre malalta estis la enspezo de kamparanoj de nemalmultaj produktaĵoj taĉmentoj en foraj kaj montaj regionoj de la tuta lando, kaj plie, la hejma flankokupo ne estis sufiĉe disvolvita. Ankaŭ la vivo de nombro da scienco-esplorantoj, instruistoj, medicinistoj kaj ŝtatoficistoj estas kompare malfacila. Tiuj problemoj estiĝis en la pasintaj multaj jaroj kaj devas esti paŝon post paŝo solvitaj surbaze de disvolvo de produktado.




*Lavmaŝinoj produktitaj de la Guangzhou-a Fabriko de Hejmaj Elektraĵoj*



*Kamparanoj de Shandong-provinco ricevas sian distribuendan monon post jarfina kalkulado.*





*Sciencaj esploristoj mezuras la profundecon kaj temperaturon de Bangong-lago en Tibeto.*

# Scienca esplorado de la Qinghai- Tibeta Altebenajo

de KE JIAO

*La glaci-rivero Azha*



## DAŬRE LEVIĜAS LA “MONDA FIRSTO”

La nomita altebenajo etendiĝas norden ĝis la montaroj Karakorum kaj Qilian, orienten ĝis la montaro Hengduan kaj okcidenten ĝis la landlimoj de Hindio kaj Nepalo. Ĝi okupas ĉ. kvaronon de la totala kontinenta areo de Ĉinio.

Ĝi estas famkonata kiel la “monda firsto”. Tamen ĝi estas la plej juna altebenajo en la mondo. La sciencaj atestaĵoj montris, ke tiu loko estis maro antaŭ 40,000,000 jaroj kaj poste fariĝis tero. Rezulte de longtempa movado de la terkrusto ĝi komencis leviĝi kaj ĝis nun ankoraŭ ne ĉesis leviĝi. Sciencistoj trovis, ke ĉiujare ĝi leviĝis meznombro je pli ol 10 milimetroj dum ĉ. 100,000 jaroj ekde la plejstoceno.

Altaj montpintoj kontinuas sur la altebenajo kun klimato malvarma, tamen pejzaĝo bela. Mi prenu la 8,848-metran Qomolangma-n kiel ekzemplon. Se vi grimpas de ĝia piedo ĝis ĝia supro, vi povas vidi diversajn naturajn zonojn kvazaŭ de la ekvatoro ĝis la norda aŭ la suda poluso. Tie vivas multaj animaloj kaj vegetaĵoj en malsamaj klimatoj.

Regulan ŝanĝiĝon montras klare rimarkeblaj naturaj zonoj sur la suda deklivo de Qomolangma, kiu havas altan temperaturon kaj multan precipitaĵon pro la influo de mara klimato. La montpinto estas kovrita de neĝo kaj glacio, ĉe la talio pompas floroj kaj sin trovas primitivaj arbaroj kun moskuloj, malgrandaj pandoj kaj aliaj raraj animaloj, kaj sube ĉe la monto verdas bambuoj kaj ridas floroj kvazaŭ sur la ebenaĵo de Changjiang (Jangzi)-rivero. Sciencis-



toj dividis la sudan deklivon en ok naturajn zonojn, kiel la altmonta neĝglacia zono kaj la malaltmonta arbara zono de tropika sezonpluvo. Ĉar la monto baras la humidan aeron fluantan de la maro al la pli alta norda parto, la norda deklivo havas kontinentan sekan klimaton kaj ĝiaj naturaj zonoj estas pli simplaj ol tiuj sur la suda deklivo.

Kompreneble, sur la altebenajo troviĝas ankaŭ multaj sekretoj nemalkaŝitaj. Tie la topografio estas komplika kaj la klimato ŝanĝiĝema. Nun sciencistoj faras esploron pri ĝiaj formiĝo, evoluo kaj influo al la natura medio kaj homaj aktivecoj.

### MIRAKLA MOVADO DE GLACI-RIVEROJ


Por sisteme esplori geologion, geomorfologion, klimaton, biologion, hidrologion, agrikulturon, forstokulturon kaj brutobredadon, la Ĉina Akademio de Sciencoj plurfoje sendis sintezajn sciencajn esplorajn taĉmentojn al la Qinghai-Tibeta Altebenajo. La glaci-riveroj estas unu el iliaj esplortemoj.

La glaci-riveroj en la mondo konsistas el du specoj de la kontinentaj kaj montaraj glaci-riveroj. Tiuj de Ĉinio apartenas al la lasta speco, kaj kvankam ili ne estas tiel grandaj kiel la kontinentaj, tamen ili formas pompan pejzaĝon per miloj da glaci-riveroj serpentumantaj en ravinoj sub la neĝkovritaj montpintoj.

La klimato sur la altebenajo estas frosta, kaj la neĝo tutjare ne degelas. Tie ja estas hejmloko de glaci-riveroj.

En la serenaj someraj tagoj oni povas klare vidi, ke neĝlinio iras ĉirkaŭ monto ĉe ĝia talio. Supre de ĝi sin trovas akumula

*Sciencaj esploristoj faras geologian kaj geomorfologian esploron pri la altebenajo Ali.*



zono de glaci-riveroj, kaj sub ĝi degela zono. La movado de glaci-riveroj estas tre malrapida, eĉ nerimarkebla por homoj. Sed la forto produktita de ilia movado estas mirinde granda. Laŭ kalkulado, ĉiukubmetra glacio pezas 900 kilogramojn, kaj la dikeco de glaci-rivero estas ĉ. 100 metroj, do ĉiukvadratmetra glacio de la malsupra bazo ricevas 90-tunan premon. Estas imageble, kiom da premo kaŭzas al la tersurfaco la movado de glaciaj riveroj kaj korpoj.

La glaci-riveroj dislokiĝas vaste sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo. La fama Himalaya-montaro, kiu estas la plej alta en la mondo, etendiĝas 2,400 km., kun 10 montpintoj altaj je pli ol 8,000 metroj, el kiuj 5 staras en Ĉinio kaj ĉe ĝiaj landlimoj. Tiuj altaj montpintoj estas centro de la montaraj glaci-riveroj. Sole sur la norda deklivo de Qomolangma kuŝas pli ol 200 glaci-riveroj, kaj multaj el ili longas je pli ol 20 km. Sur la glaci-riveroj staras alte kreskintaj glaci-turoj, kio prezentas specialan formon de la glaci-riveroj en Himalaya-montaro. Ekzemple,

sur la 6-kilometra glaci-rivero Rongbuk sur la norda deklivo de Qomolangma staras kristale brilantaj glaci-turoj. Nyanqentanglha-montaro en suda Tibeto estas abunda je pluvo pro forta influo de la musono el la Hindia Oceano kaj vigle aktivadas tie la glaci-riveroj. Iuj glaci-riveroj etendiĝas eĉ en arbarojn. Verdaj arbaroj en brakumo de blankaj glaci-riveroj formas maloftan pejzaĝon. La glaci-riveroj kiel giganta akvo-rezervejo estas valorega fonto de dolĉa akvo sur la terglobo. Eble oni pensas, ke ne ekzistas vivaĵoj en la glaci-riveroj. Fakte, tie vivas neĝ-puloj kaj glaci-lumbrikoj.

### TERMOKAMPOJ

En suda Qinghai-Tibeta Altebenajo troviĝas aktiva geotermozono 1,000 kilometrojn longa en la direkto orienta-okcidenta, nome la Himalaya Geotermozono. Yangbajan, kiu distancas je 90 km. nordokcidente de Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, estas unu el la termokampoj.

Tiu kampo ĉe la suda piedo de Nyanqentanglha-montaro, je pli



*Tagejia-a Intermita Fonto en Ngamring - gubernio*



ol 4,200 metroj super la marnivelo kaj kun areo de 15 kvadrataj kilometroj estas la unua malseka vapora kampo ekspluatata sur la kontinento de Ĉinio kaj ankaŭ unu el la grandaj termokampoj de la mondo. La baseno ĉirkaŭata de neĝglaciaj montoj ĉiam vaporas. Tie sin trovas bolantaj, varmegaj kaj varmetaj fontoj, varmaj lagoj, lagetoj kaj marĉoj, varmaj kavoj, truoj kaj putoj kaj varma vaporanta tersurfaco. Precipe la okcidenta parto de la kampo estas forta geotermozono. La temperaturo de iuj bolantaj fontoj atingas 92°C; la bolanta akvo de aliaj fontoj estas nevideblaj, tamen plaŭdas sub la tero. Krome, iuj tersurfacoj ne eligas vaporon, sed la sablo kaj ŝtonoj sur ili estas varmegaj; se oni enpikas

ŝtalan pinglon en la teron je kelkdek centimetroj, tuj eljetiĝas 1-metra vapora kolono kun koto kaj sablo.

Nun oni jam komencis bori tiun kampon. Dum borado oni plurfoje rimarkis induktan intermitan akvovarman aktivadon. La puto n-ro 7 estas tipa intermita akvovarma puto. En junio, 1979, membroj de la esplora taĉmento faris observadon de pli ol 80 fojoj da ŝprucado de tiu puto. Ĝi ŝprucas je ĉiu kvinona horo. Post ŝprucado la akvo malleviĝas ĝis la aperturo de la puto kaj faras du-minutan superfludon, kaj post tio ĝi rekomencas ŝpruci kaj baldaŭ atingas sian kulminon. La ŝprucado tiel ripetiĝas periode. La akva kaj vapora

kolono ofte povas atingi la altecon de 30 metroj. Tio donas tre belan vidon.

En la 4-a de decembro, 1977, tie okazis varmoeksplodo. En la komenco la cementita teraso de tiu puto kreviĝis supren kaj elŝprucis vaporo, kaj poste kun granda bruo eljetiĝis en aeron dika kaj nigra fumkolono kun alteco de 50 metroj. Tiam ekaperis varma lago kun areo de 100 kvadrataj metroj. Krome estas menciinda ankaŭ la varma lago Yangbajan en la nordorienta parto de la termokampo kaj en formo de ovalo. Ĝi havas areon de pli ol 7,350 kvadrataj metroj kaj maksimuman profundon de 16.1 metroj. Ĝia temperaturo estas ĉ. 50° C kaj ĝia akvo blua kaj kovrita de nebulo. Iafoje, la blanka vaporkolono leviĝas ĝis 50 metroj. La vido estas tre ĉarma. Tiu lago situas sur alta tereno, tial ĝia surfaco estas pli alta kaj ĝia fundo pli malalta je kelkaj metroj kompare kun la rivero Zangbu, kiu fluas tra la termokampo. Ĝi formiĝis eble pro varmoeksplodo.


La termokampo Yangbajan havas grandan valoron ne nur sciencan sed ankaŭ ekonomian. Fakte ĝi servas kiel reprodukta energia fonto. Laŭ mezurado de niaj sciencistoj, ĝia ĉiusekunda natura varmoellasa kvanto egalas la varmokvanton de 16.5 kilogramoj da karbo, kaj ĝia tutjara varmoellasa kvanto signifas konsumon de 470,000 tunoj da norma karbo. En la jaro 1975, la tibeta popola registaro decidis prospektori kaj ekspluati tiun termokampon. Ĝis nun oni jam plenumis boradon de 17 prospektoraj kaj produktaj putoj kaj konstruon de unu eksperimenta elektrejo kun kapacito de 1,000 kilovattoj.

Sceno el la filmo  
"Ji Hongchang"




LAO BAI:

# Premio "Cent Floroj"



Sceno el la filmo "Larmomakulo"



Sceno el la filmo "Xiaohua"

EN la lasta tagdeko de majo ĉinaj filmorigardantoj balote elektis la plej bonajn filmojn, scenariston, reĝisoron, aktorojn, muzikan verkon kaj belartan projekton aperintajn en la lastaj jaroj. En la elektado Xie Tian gajnis la premion de la plej bona reĝisoro, Li Rentang kaj Chen Chong gajnis respektive premiojn de la plej bonaj aktoro kaj aktorino, kaj la filmoj "Ji Hongchang", "Larmomakulo" kaj "Xiaohua" gajnis la premiojn de la plej bona rakonta filmo.

En la 60-aj jaroj la Redakcio de "Popola Filmo" dufoje okazigis la aktivadon de premio "Cent Floroj". Kaj poste ĝi ĉesis en la kultura revolucio. La ĉijara tria premiado estis funkciigita ankaŭ de la redakcio. Ĝi disdonis 1,500,000 balotilojn en la tuta lando.

La filmo "Ji Hongchang" priskribas iun generalon. Li forlasis la malnovan armeon post kono de ĝia esenco kaj aliĝis al la revolucia armeo, brave batalis kaj oferis sian vivon por la nacio. Ankaŭ la scenaristo de la filmo ricevis premion. La filmo "Larmomakulo" rakontas, ke iu nova sekretario de gubernia partia komitato renversis, post enketaĵo kaj esplorado, la malĝustan verdikton pri la antaŭa sekretario. La filmo "Xiaohua" prezentas al ni, kiel disiĝis kaj rekuniĝis tri gefratoj de iu familio dum la periodo de la Liberiga Milito. Ĝiaj bildoj estas lirikaj kaj ĉarmaj.

La 67-jara Xie Tian havas pli ol-40-jaran sperton de filma arto, Li estas fama aktoro kaj komedia reĝisoro ĝuanta bonan famon en la filma rondo. Liaj

verkoj kiel lia karaktero estas saturitaj de vigeleco, freŝeco kaj plezuro. Parolante pri la influo, kiun Chaplin donis al li, li diris, ke li ŝatis rigardi jam en sia infaneco la filmojn luditajn de li kaj ŝatis imiti liajn troigajn movojn. Sed nur post kiam li eniris la socion, li vere komprenis la valoron de Chaplin. Lin inspiris liaj akra vida kono kaj klaraj sentoj de amo kaj malamo pri la socia vivo, lia serioza sinteno al kreado. Xie Tian opinias, ke nur la inspira kaj pensiga rido estas vere komedia arto.

La 50-jara Li Rentang estis aktoro de moderna teatro en iu loko. En aktora vivo de pli ol 30 jaroj li ludis la rolojn de laboristo, generalo kaj intelektulo. En 1973, en la unua filmo kun li kiel la ĉefa rolulo, li kreis figuron de la maljuna





*Xie Tian*

kampano firma, simpla kaj amanta la kolektivon. Sed lin famigis en la filma rondo la filmo "Pioniro", en kiu li ludis la rolon de kompetenta kaj rapiddecida gvidanto de industrio, kiu direktis milojn da laboristoj por ekspluati petrolkampoj. En la filmo "Larmomakulo" li sukcese kreis figuron de la estimata sekretario de gubernia partia komitato, kaj pro tio li gajnis la premion de la plej bona aktoro. Li longtempe laboris en baza unuo kaj ofte vivis kaj prezentis en la kamparo. Antaŭ filmado de la "Larmomakulo" li vizitis sep guberniojn kaj amikiĝis kun nemalmultaj kamparanaj kadroj

kaj sekretarioj de guberniaj partiaj komitatoj. Li atente observis, kiel vivas kaj laboras la komunumanoj, kaj kiel kadroj laboras kaj traktas malakordojn inter popolamasoj. Li emociite diris, ke la popolo estas la patrino de artistoj kaj la vivosperado kaj diligenta studado estas ŝlosilo por bone prezenti.

Chen Chong estas 19-jara studentino. Ŝi ludis la rolojn de la heroino Xiaohua en la filmo "Xiaohua". Per zigzaga intrigo, ke Xiaohua sopiras kaj serĉas sian fraton, ŝi vivece kaj delikate prezentis naivecon kaj insistemon de kampara knabino, tiel ke la filmo havas kompare fortan ĉarmon de arto.

Kiam ŝi estis 16-jara, ŝi ludis la rolon de la muta heroino kaj ekmontris sian artan talenton en filmo pri akupunktura kuracado de mutuloj. En la sekvanta jaro ŝi estis akceptita en la Shanghai-an Fremdlingvan Instituton pere de enira ekzameno. Kiam ŝi lernis en la instituto, ŝi estis invitita ludi la rolon de la heroino Xiaohua. Ĉifoje, kiam ŝi transprenis la premian pokalon de la plej bona aktorino, ŝi diris en tremanta voĉo al la rigardantoj: "Dankemo kaj hontemo okupas mian koron, mi ne scias kiel esprimi mian senton. Sub la kultivado de la Partio kaj diligenta edukado de multaj instruistoj, mi kreskas feliĉe kvaŝaŝ juna plantido." Kiam ĵurnalisto demandis, ĉu ŝi preferas studon en instituto aŭ filmadon ŝi palpebrumis per grandaj saĝaj okuloj kaj respondis: "Ankaŭ mi konfuziĝas pri tio. La reĝisoro diris, ke mi devas multe filmudi en mia nuna aĝo, sed instruistoj de la instituto diris, ke mi devas diligente lerni." Ŝi ridete daŭrigis: "Mi opinias, ke filmado kaj lernado ne estas kontraŭdiraj. Lernado celas pli bone labori en la estonteco, mi decidis ne forlasi la lernadon pro filmado." Ŝi esprimis, ke ŝi plezure akceptos la taskon, se

*(Daŭrigota sur p. 47)*

*Li Rentang*



*Chen Chong*



*Liu Xiaoqing*





Fotoj de REN SHIYIN

# Pejzaĝoj de Jiuzhaigou en Sichuan- provinco


Primitiva arbaro




Neĝaj montoj

Verda lago ▶












Rojo en arbaro



Falakvo




Falakvo de verda lago



CHAI  
ZHONGWEN:



J  
i  
u  
z  
h  
a  
i  
g  
o  
u



VIDINDAJ LOKOJ

ĉ. 500 kvadrataj kilometroj, kies du kvinonoj estas arbaroj. La trunka valo longas 30 km., kaj sur ĝia fundo kaj la ambaŭflankaj deklivoj kreskas densaj primitivaj arbaroj kaj vivas diversspecaj raraj animaloj. Krome, dissemiĝas ankaŭ multaj lagoj kaj akvofaloj.

Jiuzhaigou havas 108 grandajn kaj malgrandajn lagojn. Ili estas interligitaj de torentoj kaj akvofaloj kaj formis pitoreskan pejzaĝon. La plej malgranda lago havas areon de nur 1/30 hektaro, dum la plej granda longas 7 km., larĝas maksimume je 200 metroj kaj profundas 90 metrojn. Tiuj lagoj formiĝis pro faŭltoj en la pratempo. Ilia akvo estas blua kaj klara kvazaŭ neniam poluciita. Rigardate de malproksime, la kvietaj lagoj similas al speguloj, kaj la arbobranĉoj reflektitaj en ili estas klare videblaj.

La plej ĉarma el tiuj lagoj estas la Bunta Lago. Ĝin ĉirkaŭas densaj arboj kaj ĝian fundon plene kovras algoj kaj diverskoloraj sedimentoj. Sub la suno la lago brilas flave, verde, lazure kaj grize. Ĝuste pro tio ĝi ricevis tian nomon. Oni povas vidi antaŭlonge falintajn dikajn arbojn flosantajn sur la lago. Kaj sur la arboj kreskas arbidoj kaj herboj. Tio prezentas belan pejzaĝon de arboinsuletoj.

La akvofaloj en la valo estas ne nur multaj, sed ankaŭ distingiĝaj. La falakvoj en aliaj famaj lokoj falas, ĝenerale, de sur krutajoj altaj je dekelkaj aŭ kelkdekaj metroj, sed la tieaj falakvoj torentas el arbaroj, ĉar inter la malsamnivelaj lagoj troviĝas vicoj kaj vicoj da longaj barajoj nature formitaj el kalciaj sedimentoj kun prosperaj arboj. En malsamaj sezonoj, pro malsamaj akvokvantoj varias la grandeco kaj formo de la akvofaloj.

La plej malgranda falakvo estas nur 1-2 metrojn longa, dum la plej granda 20 metrojn longa. Kiam leviĝas la suno, formiĝas ĉielarko sur la nebula falakvo. Rigardante tian pejzaĝon, oni sentas sin kvazaŭ en fabela mondo.

La naturo prezentas kalejdoskopajn vidajojn. Ĉe la matenkrepuskiĝo nebulaj gazoj kovras ĉiujn neĝajn montpintojn, kiuj jen aperas jen malaperas kun mistera aspekto. Kiam la suno malrapide leviĝas, nebuloj disiĝas en vento, la ora suno brilas super la verdaj arbaroj kaj la kvietaj lagoj. Tiam la pejzaĝo aspektas kiel olepentraĵo. Ĉe la tagmezo blankaj nuboj ŝvebas en la lazura ĉielo, kvazaŭ velŝipoj naĝus en oceano.

La primitivaj arbaroj en Jiuzhaigou estas allogaj. Pro relative kompleksaj naturaj kondiĉoj kaj grandaj klimataj diferencoj, la arbaroj havas sian vertikalan dislokiĝon. En la lokoj 2,000-2,400 metrojn super la marnivelo, la jara pluvokvanto estas granda kaj la klimato humida, tial tie kreskas plejparte altaj arboj. Pli supre de la loko la klimato estas pli frosta kaj kreskas pinglarboj, kiel piceo, abio kaj purpura piceo (*Picea purpurea*). La miljaraj arboj estas ĉie videblaj. Iuj el ili havas diametron de ĉ. 1.5 metroj. Interalie, purpura piceo estas arbospecio propra al Ĉinio. Nun ĝi estas trovebla nur en la baseno de Taoherivero en suda Gansu kaj en Jiuzhaigou kaj aliaj lokoj de la Aba-Tibetana Aŭtonoma Subprovinco en Sichuan. Ĝenerale, ĝi kreskas sur la sensuna deklivo 3,000-3,600 metrojn super la marnivelo aŭ sur la suna humida deklivo 4,000 metrojn super la marnivelo. Ĝia ligno havas malmolecon, delikatajn vejnojn kaj elastecon kaj taŭgas por la aviada industrio.

En Jiuzhaigou kreskas ankaŭ multspecaj kuracaj plantoj kaj primitiva stelfolia herbo, kiu ne ekzistas en la aliaj lokoj de la mondo. Precipe en la lokoj je pli ol

**E**N la gubernio Nanping de Sichuan-provinco troviĝas pitoreskejo Jiuzhaigou, kiu altiras al si pli kaj pli multajn homojn. Tie estas naŭ antikvaj tibetanaj vilaĝoj, kiujn oni nomas Jiuzhaigou (Valo de Naŭ Vilaĝoj).

Jiuzhaigou, kiu situas en la montaro Minshan je 2.600-3.000 metroj super la marnivelo, havas areon de

2.400 metroj super la marnivelo kreskas grandaree antikvaj plantoj kiel sagobambuo (*Sinarundinaria nitida*). Ĝi servas kiel bona nutraĵo de la pandoj, tre valoraj bestoj de Ĉinio. Ili, mildaj, ofte descendas montojn kaj iam eĉ venas en la korton de kampuloj. La lokanoj ne vundas ilin. Kiam la lastaj envenas, la antaŭaj regalas ilin per manĝaĵoj

kaj poste akompanas ilin ĝis montoj. Jiuzhaigou situas tuj ĉe la natura rezervejo de or-simioj apud Beihe-rivero. Ankaŭ ili ofte gastas ĉe kampuloj, transirinte montojn. Sed ili forkuras tuj je aŭdo de homa voĉo. Ili povas kuri pli ol 40 kilometrojn en unu horo. Kaj krome, tie vivas ankaŭ malgrandaj pandoj, nebulaj leopardoj (*Neofelis nebu-*

losa), brunaj cervoj (*Elaphodus cephalophus*) k.a. Jiuzhaigou povas esti nomata natura rezervejo de pejzaĝoj kaj pandoj. Nun oni faras aranĝon por pli rapide konstrui tiun naturan rezervejon en ĝardenon de pandoj kaj aliaj valoraj bestoj, en bazlokon de scienca esplorado kaj lerneja instruado kaj en sanatorian kaj turisman lokon.


## KARIKATURO

Komence du portas unu, poste unu — du.

Pentrita de ZHOU ZHONGHUA

Legado en nokto

Pentrita de PAN SHUNQI



Ĝi ja neniĝis!


Pentrita de XU JINGXIANG

— Mi donas al vi ion manĝeblan!

— Divenu, kio ĝi estas.

— Vi plej ŝatas ĝin!

— ...





# *Ŝanĝiĝo de iu kamparana familio en 30 jaroj*



*La familio de Ye Gentu en la komenca periodo post la Liberigo, 1950: Ye Gentu (dekstre malantaŭe), lia edzino (maldekstre malantaŭe), ilia plej juna filo Xingyou (meze malantaŭe), ilia unua filo Xingfu (dekstre fronte) kaj ilia filino Gui Feng (maldekstre fronte)*

**T**IO okazis antaŭ 30 jaroj. Malpli ol duonjaron post la liberigo de la provinco Zhejiang (Ĝegiang) la laboruloj ĉu en urboj aŭ en kamparo ekhavis sian novan vivon, kaj ĉiuj sen distingo de sekso kaj aĝo dronis en ĝojo. Kaj el tio la plej mal-facile forgesbla por mi estas kantado de iu naiva knabineto.


En 1950 mi estis raportisto-fotografisto de la Zhejiang-a Ĵurnalo. Foje mi oficvojaĝis al la kamparo de la gubernio Jiaxing, 100 km. norde de la provinca ĉefurbo Hangzhou (Hangĝoŭ). Subite kiam mi estis preterpasanta la vilaĝon Sep Steloj, mi aŭdis kantadon de infano: “Serenas la ĉielo en la regiono liberigita, ĝojegas la popolo de la regiono liberigita . . .”

La voĉo estis naiva, tamen sincera kaj bela. Mi eniris en la vilaĝon por serĉi la kantanton. Mi trovis, ke la kantanto estas 7-8-jara knabineto. Ŝi ludis kantante sur la draŝejo kune kun

knabeto ĉifonvestita. Sia senzorga gajeco infektis min. Mi pretervole ekkantis en mi kaj intencis foti la du amindajn infanojn. En tiu momento venis iliaj gepatroj. Mi montris al ili mian volon foti ilian tutan familion. Ili lasis min tion fari. Poste ni komencis interparoli. Kaj tiam mi sciigis, ke la patro estas nomata Ye Gentu. Li devenis el familio de dungita kamparano en la gubernio Huangyan. Kiam li estis 12-jara, lia patro mortis kaj la tuta familio ne povis sin vivteni. Post du jaroj li migris aliloken kaj fariĝis dungito de bienulo. Foje li laboris en rizkampo kaj estis mordita de vipuro. La vundo putris, sangis kaj pusis. Neniu

prizorgis lin kaj fine li estis maldungita de la bienulo. Li revenis al sia patrino kaj resaniĝis. Sed la mizera vivo devigis lin formigri denove, kaj li venis al la vilaĝo Sep Steloj. Tie li denove fariĝis dungito de bienulo.

Li ŝvitlaboregis tutan jaron por la bienulo Zhang Daxing kaj akiris 50 kg. da rizo. Poste li prunteprenis monon ĉe uzuristo. Kaj li edziĝis al orfino Gao A-er kun tiuj greno kaj mono kiel edziĝkosto. Post nelonge ili havis unu filinon kaj unu filon (kiujn mi vidis sur la draŝejo). Ye Gentu esperis bonan vivon kaj farmis de la bienulo 10 muojn (1 muo = 1/15 hektaro) da kampo. Sed li havis nek bovon,



*Ye Gentu riparas agrikulturilon por sia produkta taĉmento.*

nek agrikulturilojn, nek monon. Li ĉiam estis maltrankvila pri eventuala katastrofo kaj sin streĉegis en kamplaboro. Tamen post unujara klopodado li rikoltis nur tiom, kiom li apenaŭ povis pagi por terrento. Pro manko de nutraĵo, li kaj liaj familianoj estis magraj kiel skeletoj, kaj en vintro la tuta familio havis nur unu mizeran litkovrilon. Post la Agrara Reformo Ye Gentu akiris dek muojn da rizkampo, domon kun du ĉambroj kaj kelkajn agrikulturilojn . . . Jen temis pri la unua foto, kiun mi faris en mia unua intervjuo.

Pasis pluraj jaroj, tamen mi ofte pensis pri la familio de Ye. Kiel ili vivis poste? Ŝajnis al mi, ke mi devas denove intervjui ilin. Kaj en aŭtuno de 1954 mi duafoje venis al la vilaĝo Sep Steloj. Sed Ye jam transloĝiĝis. Dank' al la bona rikolto en sinsekvaj jaroj post la Liberiĝo, Ye Gentu akumulis iom da mono kaj transloĝiĝis al Huangyan por kunvivi kun sia patrino. Infor-

miĝinte pri tio, mi ekĝojis kaj tuj veturis al Huangyan, sed mi ne trovis lin tie.

Julion de 1958, iu aŭtobusa konduktoro diris al mi: "Eble tiu adreso estas erara. En Huangyan ne estas la loko Yangpengling, sed okcidente de la gubernia urbo troviĝas Liangpengling." Tion aŭdinte, mi ĝoje rapidis al Liangpengling. Estro de la produkta taĉmento Chen Guanhai kondukis min en la hejmon de Ye. Je la unua vido mi trovis la geedzojn multe pli fortaj kaj serenmienaj. Tute malaperis ĉe ili melankolia mieno. Ili ŝajnis pli junaj ol antaŭe. Sed ili ne tuj rekonis min. Kiam mi montris al la edzino de Ye la foton, kiun mi faris en 1950, ŝi eĉ ne povis rekoni sin mem en la foto. Je tio ŝia edzo rekonis en mi la raportiston-fotografiston. La taĉmentestro Chen Guanhai diris al mi, ke Ye Gentu kun alta politika konscio amas la patrolandon kaj la kolektivon. En bona vetero li kamplaboris kaj en pluvaj tagoj

li riparis agrikulturilojn por la kolektivo. Al mi plaĉis tiu honesta kamparano. Ĉiuj familianoj estis en la hejmo kaj mi refoje fotis ilin ĉi-kune.

Reveninte al la redakcio, mi raportis la intervjuon al la ĉefredaktoro. Li ĝoje titolis la foton per "La Familio post Dek Jaroj" kaj publikigis ĝin kune kun mallonga poemo en la Zhejiang-a Ĵurnalo antaŭvespere de la Nacia Festo de 1959.

Post tio mi gastis ĉe Ye Gentu preskaŭ ĉiujare. Li rigardis min kiel sian familianon kaj ofte verŝis al mi la koron. En septembro de 1962, Ye Gentu skribis al mi, ke baldaŭ edziniĝos lia filino Guifeng, kaj invitis min al la nupto. Mi akceptis la inviton kaj venis al lia hejmo kunportante la fotoserion "La Familio post Dek Jaroj" kiel donacon al li. Li akceptis ĝin kaj diris kun emocio: "Tiuj fotoj estas tre valoraj por nia familio." La fotoj plene montris la ĝojon de la familio de Ye, kiu multe suferis en la malnova socio.

En la geedziĝa tago de Guifeng, Gentu ŝanĝis malnovajn morojn en la kamparo. Li ne venigis palankenon por la filino, donis al ŝi neniun alian doton krom la fotoserio kaj diris al ŝi, ke ŝi ne forgesu la Kompartion kaj vivu modestan vivon. Lia ago tre emociis min, ke mi faris fotojn pri tiu sceno kaj skribis raportajn pri la geedziĝo, kiu aperis en la Zhejiang-a Ĵurnalo de la 12-a de oktobro, 1962. La raporto faris sensacion en la kamparo de la provinco, kaj Ye Gentu fariĝis avangardo en ŝanĝo de malnovaj moroj. Poste la fotoserio estis elpetita de la Ĉina Revolucia Muzeo.


El la pluraj intervjuoj mi sciiĝis, ke sub la gvido de la

Kompartio kaj la popola registaro, tiu malriĉa kamparano, kune kun siaj kamaradoj, turnis la kalvajn montojn en belajn kaj fekundajn kampojn.

Kvankam la fotoj montris nur la ŝanĝiĝon de unu sola familio, tamen ili prezentis miniaturon de milionoj kaj milionoj da kamparanaj familioj de Ĉinio. Nun jam fariĝis plenkreskuloj la gefiloj de Ye Gentu kaj laboras kaj vivas bone. Guifeng funkcias nun kiel kadro de virinaj aferoj de la produkta brigado. Ŝi estas lerta en kamplaboro, kaj en la hejmo ŝi estas diligenta kaj ŝparema mastrino. Xingfu, la unua filo de Ye Gentu, malmobilizite venis al iu ŝtata farmejo kaj tie edziĝis. Nun li estas vicsekretario de la partia filio de la farmejo. La dua filo Xingyou laboras kiel estro de produkta taĉmento. Li edziĝis en januaro de 1979. Mi ĉeestis lian edziĝan ceremonion. En tiu tago la novedzino Dongqing estis bele vestita kaj havis ruĝan floron sur la brusto. La ĉambro estis nove kalkita kaj simple meblita. Sur la lito kuŝis 4 silkaj litkovriloj, kaj krome ankaŭ estis termosoj, palisandraj kestoj k.a. Grupo da gejunuloj gajplene enpuŝiĝis en la ĉambron por gratuli la geedzojn. En tiu tago denove kuniĝis la tuta familio. Mi proponis foti la tutan familion. Sed ĝuste en tiu momento min ekdoloris mia memoro pri la forpasinta honesta maljunulo Ye Gentu.

Forpasis 30 jaroj, tamen miaj interparoloj kun la familio de Ye Gentu restas freŝaj en mia memoro. Antaŭ 30 jaroj la familio travivis multajn suferojn, kaj post 30 jaroj la familio dro-nis en senfina ĝojo. La edzino de Gentu vivas nun kun sia dua filo. En la lastaj jaroj ili havis

sufiĉajn grenon kaj vestojn kaj kaj la vivo fariĝis pli kaj pli cetere akumulis 1,200 kilogramojn da greno. Ili bredas 3 por- bona. La melankolia vizaĝo de laj maljunulino fariĝis ĝojplena. Ŝi ĝuas feliĉajn jarojn.




*La familio de Ye Gentu en 1958*

*La familio de Ye Gentu en 1979 (Ye Gentu jam forpasis): La edzino de Ye Gentu (meze fronte), Xingfu kaj lia edzino, bofilo, Guifeng, la edzino de Xingyou kaj Xingyou (de maldekstre malantaŭe)*







JIA DASHAN:

# En la Aŭtunmeza Festo (novelo)

**K**VAZAŬ granda ĉiellampo, la luno lante leviĝas el la arbaro oriente de la vilaĝo. Ĝi altiras al si atenton de la infanoj sur stratoj.

En la nokto, en ĉiu korto de kampuloj staras manĝtablo, la familioj ĉirkaŭsidante manĝas lunkukojn kaj fruktojn kaj parolas pri la rikolto. Viroj eĉ trinkas vinon kun aparte preparitaj pladoj. En la kamparo la 15-a de la oka monato laŭ la luna kalendaro estas festo plej granda post la Printempa Festo.

Kurinte hejmen, Dongdong kaptis la baskon de sia patrino kaj diris saltante: “Panjo, jam aperas la luno . . .”

“Jen por ci, frandemuleto.” Kun rideto Shuzhen prenis plenmanon da ruĝaj jujuboj el kuveto sur la manĝtablo kaj unu granaton kaj enŝovis ilin en la manojn de Dongdong. “Panjo, mi volas lunkukon!” diris Dongdong malkontente.

Sur la vizaĝo de Shuzhen malaperis la rideto kaj vidiĝis embarrasiĝo. Ilia produkta taĉmento ne

estas riĉa. La ŝparema familio devas kalkuli ĉiun elspezon laŭ la rikolto. Kiam kotonujoj ekfruktis, pluvis 20 tagojn, pro kio ne abundis someraj fruktoj. Oni klare komprenis, ke la postaŭtuna distribuo de la taĉmenta enspezo estos certe influata de tio. Tial Shuzhen aĉetis nur 0.5 kilogramon da lunkukoj por sia bopatrino loĝanta en alia korto. Tamen Dongdong insistis en sia peto. Timante, ke najbaroj aŭdos tion, ŝi rapide prenis plian granaton kaj diris mallaŭte: “Kareto mia, lunkuko estas tro dolĉa. Se infanoj ĝin manĝis, iliaj dentoj putriĝus.”

“Kio, ĉu vi ne aĉetis lunkukojn?”

Ŝi ne rimarkis kiam revenis la edzo, kiu jam silente staris malantaŭ ŝi. Li estas nomata Chunsheng kaj havas kvadratan vizaĝon kaj grandajn okulojn. Sur lia vizaĝo ankoraŭ legiĝas mildeco de lernanto. Antaŭ ok jaroj li diplomitiĝis el mezlernejo kaj revenis al la kamparo. Nun li estas estro de la produkta taĉmento.

“Mi ne aĉetis,” ekridetis ŝi. “En nia infaneco, ĉu ni ne pasigis la feston per bovlo da kuiritaj faboj kun guŝoj?”

“Vi estas tro ŝparema,” kuntirinte la brovojn, li diris kun riproĉa tono. “Ĉu nia taĉmento estas tiel malriĉa? Ĉu estas dece, ke la infano povas ricevi eĉ nenium lunkukon en la Aŭtunmeza Festo, kiu okazas nur unufoje en ĉiu jaro?”

“Lasu tion. Mi tuj iros al la vendejo por aĉeti.” Dirante, ŝi elpaŝis kondukante Dongdong per la mano. Ŝi estas virino honesta kaj neniam volas malplezurigi sian edzon.

Kiam ŝi revenis de la vendejo, ŝi trovis, ke la okcidenta najbaro la maljunulo Yan la Kvara parolas kun Chunsheng kaŭrante en la korto. Yan estas operoamanto, babilema, kantema kaj gaja. Hodiaŭ li tamen diris kun malhela vizaĝo: “Chunsheng, mia dua filo edziĝos

en la venonta jaro. Sed domon mi . . .”

“Ĉu estas ne decidite, ke ni konstruos ĝin tuj post semado de tritiko?”

“Ej! La homo faras cent kalkulojn, sed la ĉielo unu nuran. Por konstrui la domon kaj prepari la geedziĝon, mi esperas ricevi distribuan profiton, tamen la kotonujoj . . .”

“Ne gravas,” diris Chunsheng kun rideto. “Ili kreskas malpli bone ol tiuj en la pasinta jaro. Sed niaj flankokupoj estas multaj. Ni povas plimultiigi la enspezon per transportado de sablo kaj aliaj materialoj, per ŝarĝo aŭ malŝarĝo de vagonoj. Kaj plie, la kotonujoj de iuj kampoj kreskas sufiĉe bone. Ekzemple, ĉiu kotonplanto sur 40 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) da kampoj sude de la vilaĝo havas meznombro 6.5 fruktojn.”

Shuzhen komprenis sian edzon kaj diris: “Jes, ankoraŭ restas du kaj duona monatoj ĝis la jarfina distribua kalkulo. Se nur ni kondukos la flankokupojn al plia prospero, la enspezo ne estos malpli ol tiu de la pasinta jaro.”

“Do, la distribua profito estos dezirata?”

“Jes.”

“Kaj la domon mi . . .”

“Konstrui certe! Ni konstruos tuj post la semado de tritiko!” serioze diris Chunsheng.

“Jen viaj vortoj! Mi dungos lignajistojn!” La maljunulo stariĝis kaj foriris gaje, kantetante: “Brilas la luno en la aŭtunmezo.”

Shuzhen metis la lunkukojn sur la tablon kaj diris al Chunsheng: “Jam estas festo. Ankaŭ vi iom manĝu.”

“Mi jam manĝis. Ne zorgu min, bofratino.”

Shuzhen ekleviis la okulojn kaj trovis, ke alvenas Layue, estro de la kamplabora grupo, kiu plej emas

ŝerci kun ŝi. Ŝi ŝerce insultis: “Kiu zorgas vin, knabaĉo!”

“Frato Chunsheng, mi neniel taŭgas por esti estro!”

“Diru, kio okazis al vi!” koncize diris Chunsheng, kvazaŭ pli urĝa afero atendas lin.

“Mi ne kapablas gvidi la maljunulon Yan la Oka,” Layue ekplendis. “Hodiaŭ li plugis 4.5 muojn da agro, kaj ankaŭ Han Yulin plugis la saman kvanton. Mi notis por ili ambaŭ la samajn poentojn, sed Yan malkonsentis pri tio. Li insultis min kaj ankaŭ vin . . .”

“Chunsheng!” interrompis laŭte porkobredistino bofratino Erxi, kiu jus eniris fulmorapide. “Chunsheng! Mi kunportis novan sperton: Porkoj rapide grasiĝas post nutrado per verdaj herboj. Tial la supera instanco alvokas nin rezervi verdajn herbojn kaj postulas, ke ĉiu taĉmento fosu tri kavojn por konservo . . .”

“Per kio li insultis min?” Chunsheng ankoraŭ meditis pri la problemo parolita de Layue.

“Li insultis vin sentaŭgulo!”

Chunsheng rigardis la leviĝantan lunon kaj meditis. Tiam malrapide envenis vicedstro de la taĉmento Shuangsoo. Portante ŝovelilon sur la ŝultro li diris kun griza humoro: “Chunsheng, ĉu ni akvumos la kampon de kotonujoj okcidente de la vilaĝo?”

Shuangsoo laboris ofte kun kaprica humoro. La malbona kresko de kotonujoj forte deprimis lin.

“Kiel vi opinias?” kontraŭdemandis Chunsheng.

“Laŭ mi, tute egale, ĉu akvumi aŭ ne.”

“Sensencaĵo!” Li elprenis el la poŝo notlibron kaj malfermis ĝin dirante: “Kiel tute egale?”

Transpreninte la notlibron, Shuangsoo ŝaltis pošlampon kaj vidis kelkajn liniojn da fontoplumaj ideografiaĵoj sur la paĝo pri eksperimentado pri akvumo de kotonujoj

ĉe la malfrua periodo de ilia kreskado.

Li tralegis la liniojn, iom meditis kaj ridklukis: “Vi refoje venkis min. Do mi transportu tien pum-pilojn?”

“Laŭ via bontrovo.”

Shuangsoo foriris, kaj bofratino Erxi tuj daŭrigis: “Chunsheng, mi kunportis novan sperton. La porkoj . . .”

“Mi sciiĝis.” Chunsheng ekleviis la rigardon kaj vidis Layue: “Ĉu vi kverelis kun Onklo la Oka?”

“Kverelis, sed mi ne insultis.”

“O, estas ne senkaŭze insulti nin sentaŭguloj,” Chunsheng tamen ridklukis anstataŭ koleri. “Hodiaŭ Onklo Yulin faris la unuan plugadon, pli facilan ol la dua plugado kiun Onklo la Oka faris kun ordigo de kampeĝoj. Estas neracie registri la samajn poentojn por ili ambaŭ. El tio videblas, ke nia normo por aljuĝo de laborpoentoj devas esti refoje konsiderata.”

“Kiam ni interkonsiliĝos pri tio?”

“Morgaŭ nokte,” tion dirante, Chunsheng subite kaptis Layue je la brako. “Layue, ĉu vi manĝis?”

“Ne.”

“Ne foriru, prenu manĝon ĉi tie. Ĉi-nokte nin atendas grasa laboro.”

Tiam Shuzhen alportis du bovlojn da vermiĉeloj. Chunsheng kaj Layue ekmanĝis ĉiu per unu manĝ-vergeto. Shuzhen diris: “Iom atendu.” Kaj ŝi tuj reiris al la kuirejo. Antaŭ ol Shuzhen alportis manĝvergetojn, ili jam forglutis la vermiĉelojn. Viŝinte sian buŝon, Chunsheng diris al Shuzhen: “Ĉinokte ne ŝlosu la pordon de la korto.” Li ektiris Layue por foriri.

“Chunsheng, mi kunportis novan sperton . . .”

“Ni detale interparolu pri tio morgaŭ.”

Bofratino Erxi piedbatis la teron kaj diris paŭte: “Hm! Vi neniom zorgas nian laboron.”

Rigardante la dorson de la bofratino, Shuzhen ekridis pretervole. Ŝajnis al ŝi, ke Erxi, Layue kaj la maljunulo Yan intence trudis al Chunsheng ĝenojn kaj komplikajojn. Kaj samtempe ŝi sentis, ke ĝuste pro tiel multaj ĝenoj, komplikajoj kaj plendoj Chunsheng vivas tiel vikle, agrable kaj gustoriĉe.

La luno leviĝis super la jujubarbo. Sate manĝinte lunkukojn Dongdong jam endormiĝis. Kvieto regis en la korto. La bruado de trajnoj oriente galopantaj preter la vilaĝo ŝajne pliproksimiĝis kaj plifortiĝis en la kvieta nokto. En la okcidenta korto la maljunulo Yan la Kvara kantetis Pekin-operon gaje kaj senzorge.

Apenaŭ Shuzhen metis la restajn du lunkukojn en la korbon, Chunsheng revenis. Vidante lin, ŝi surpriziĝis. Li, kun vizaĝo plena de polvo, iris ŝanceliĝe, kvazaŭ li irus sur kotona amaso. Li apogis sin al la jujubarbo, la korpo glitis malrapide laŭ la trunko kaj kaŭriĝis. Shuzhen alproksimiĝis kaj trovis, ke lia dorso estas tre malseka kaj odoras je ŝvito. Ŝi haste demandis: “Ĉu vi denove ŝarĝis vagonon?”

Chunsheng kapjesis kun fermitaj okuloj kaj ekridetis: “Divenu, per kiom da sakoj ni ŝarĝis la vagonon?”

“Mi ne povas.”

“Ni malŝarĝis per 70 sakoj da salo kaj ŝarĝis per 70 sakoj da greno, kaj per tio ni enspezis 56 juanojn por la taĉmento . . .”

Kuntirinte siajn brovojn, Shuzhen gape rigardis lian malgrasan vizaĝon. La ŝarĝo kaj malŝarĝo pezas je 14,000 kg! Ŝi diris forte lin domaĝante: “Manĝu lunkukon, vespere vi manĝis malmulte.”

“Mi ne volas manĝi pro la dormemo.”

“Gustumu, la ĉijaraj kukoj estas bonaj.”

“Kie estas Dongdong?”

“Li dormas.”

“Ĉu li jam manĝis?”

“Jes.”

“Kaj vi?”

“Ankaŭ.”

Nur tiam Chunsheng prenis unu pecon el la korbo kaj malrapide ekmanĝis.

“Ĉu ĝi estas bongusta?” demandis Shuzhen.

“Jes.”

“Ĉu dolĉa?”

“Sufiĉe.”

“Ĉu ĝi havas osmantan odoron?”

“Jes.”

“En ĝi troviĝas ankaŭ nuksa karno kaj kanderroj”

“Jes, vere.”

Manĝinte, Chunsheng ŝanceliĝe iris en la ĉambron. Purigante la manĝtablon, Shuzhen pretervole jetis rigardon en la korbon kaj tro-

vis, ke en ĝi troviĝas ankoraŭ du lunkukoj. Kaj post pririgardo ŝi trovis, ke en la korbo mankas maizkuko bakita en la lasta tago. Ŝi hastis en la ĉambron kaj vidis, ke Chunsheng kuŝas oblikve sur la terlito kaj estas en profunda dormo. Ŝi metis sian manon sur lian ŝultron kaj skuis por veki lin. Li turnis sin aliflanken kaj subite diris: “Konstrui tuj post la semado de tritiko! Dividendon ni certe havos kaj disdonos. . .” Dirinte tion li brue ridis kaj ree dronis en dolĉa dormado.

Shuzhen ne volis ĝeni lin, senbrue eliris kaj sidiĝis sur la tigo-plektita sidilo en la korto. En la korto estis malvarmete kaj kviete. La lunlumo estis arĝente brila. Kaj en la okcidenta korto la maljunulo Yan la Kvara ankoraŭ ne endormiĝis. Lia gaja kanto sonis iom ebrice:

“Bri—la—s la luno en la aŭ—tun—me—zo—”







EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

*Jen broditan bulon al vi!*



## KANTOFESTO DE LA ĜŬANG-OJ

*Alnaĝas fiŝ', pro akvofavoro,  
alflugas papili' pro floroj.*

*La trian de la tria monato, sur la  
aŭtovojoj torentas longaj fluoj en  
koloroj.*

*Se baras fluoj, ilin ni travadas,  
se baras montoj, ilin ni transgrim-  
padas.*

*Aŭdiĝas kantoj katenitaj dek-  
dujare,*

*sinceraj amo-kantoj sonas klare.*

La supra versaĵo titolita per "Kantofesto" estas improvizaĵo de poeto en la Kantofesto ĉijara en la Guangxi (Guanghi)-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝi vive prezentas tiun vicleplenan amasan feston.

La tria de la tria monato lunkalendaro (t.e. aprilo) estas la tradicia Kantofesto de la ĝuang-oj. Ĉijare, ĉirkaŭ tiu festotago, poetoj

kaj literaturaj esploristoj el 17 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kunvenis en Yongcheng de Guangxi por diskuti pri la moderna poezio, kaj mi havis honoron ĝin ĉeesti. En la kunveno mi informiĝis de literaturistoj de Guangxi, ke ĉijare la senprecedenca Kantofesto daŭros tri tagojn en la gubernio Du'an kaj en ĝi partoprenos dek mil personoj. La kunvenantoj estis forte interesitaj de la novaĵo, kaj je la festotago mi kaj dekoj da kolegoj veturis rekte al la loko kun ĝojo kaj scivolemo.

Kiam mia aŭto proksimiĝis al la produkta brigado Mianshan, kie okazis la festaj aktivadoj, mi vidis, ke bluj kaj blankaj tendoj staras sub aleŭritoj kaj sur herbotapiŝoj ĉe la bordoj de rivereto. Ili prezentis bildon plaĉan al la okuloj de rigardantoj en malproksimo. La kama-

rado min akompananta diris al mi, ke cirkulas en la regiono de ĝuang-oj legendo pri lerta popolkantistino nomata Tria Franjo Liu, kiu ofte kantis sur montoj, falis de sur monto persekutate de bienulo kaj mortis. Por rememorigi pri ŝi, la popoloj starigas tendojn inter montoj por kantadi je la tria de la tria monato en ĉiu jaro. Montrante al la tendoj, li diris al mi, ke la blankaj kaj bluj tendoj sur la tendoj estas alportitaj de diverslokaj popoloj kiuj alvenis kanti por esprimi sian karmemoron pri Tria Franjo Liu.

Komenciĝis la Kantofesto. Gejunuloj kaj gemaljunuloj en festaj kostumoj tri- aŭ kvarope torentis de ĉiuj direktoj al la kolektejo. Iuj gejunuloj en aĝo de ĉ. 15 jaroj haltis de tempo al tempo por ĝoje ludi broditajn bulojn kaj kunfrapadi ruĝajn kuiritajn kokovojn. Rimarkinte mian miron kaj nekomprenon pri la gaja aktivado, la akompananto diris al mi: La Kantofesto ankaŭ prezentas ŝancon de amindumado por la gejunuloj. En la pasinteco, dum la Kantofesto, amemaj junulinoj ofte ĵetis, al sia amata junulo, broditan bulon propramane faritan kiel simbolon de amo; kaj enamiĝintaj gejunuloj kunfrapis ruĝigitajn kuiritajn kokovojn por signi enamiĝon. Hodiaŭ tiuj moroj fariĝis plezuraj ludoj por la gejunuloj, kaj buntaj broditaj buloj kaj ruĝaj kuiritaj kokovoj estas uzataj por esprimi bondezirojn pri sano, longa vivo, riĉa rikolto kaj abundo de dombrutoj.

Elaŭtiĝinte ni tuj involviĝis en la homtorenton kaj ekdrivis al la kolektejo. Kiom da popolkantistoj svarmis tie! Iuj kantis sonore kaj aliaj kantadis responde unu al alia. Ili varme kantis pri la patrolando kaj pri fidela amo. Sennombraj kaj ĉarmaj estis la amokantoj. Unu el ili tekstis jene:

*Mi sidas ĉe fenestro en vespero  
(geĉjuĉelju, ĉjuĉelju),*

*kaj rigardadas al la lun' kaj steloj  
(geljuljuĉe, ljuljuĉe, ŝejilo, doĵilo,  
karulino);*



*Ili kantas amkanton al sia amato.*

*en ventoblovo flirtas floroj belaj  
(geĉjuĉelju, ĉjuĉelju),  
mi pensas pri vi, karulin' fidela  
(geljuljuĉe, ljuljuĉe, ŝejilo, doĵilo,  
karulino).*

*Nur kiam jam radikos akriĝŝtono  
(geĉjuĉelju, ĉjuĉelju),*

*la rizpistujo iĝos multfolia  
(geljuljuĉe, ljuljuĉe, ŝejilo, doĵilo,  
karulino),*

*kaj la ĉevaloj iĝos korn-stalonoj  
(geĉjuĉelju, ĉjuĉelju),*

*ni rompos tiam unu kun l' alia  
(geljuljuĉe, ljuljuĉe, ŝejilo, doĵilo,  
karulino)!*

Per tiaj amokantoj la gejunuloj senĝene komunikas sian korinklinon unu al alia kaj esprimas sian fidelecon al amo, kaj tiuj sinceraĵ amo-



*Ha, via ruĝigita kokovo frap-rompiĝis!*

kantoj montris iliajn noblajn sentojn de la koro. En la krepusko mi aŭdis jenan kanto-dialogon de enamiginta paro:

Junulino: *Rivero fluas antaŭ nia pordo.*

Junulo: *Mi faros ponton el arĝent' kaj oro.*

Junulino: *Or-mont' kaj arĝent-marŝo al mi ne plaĉas, sed nur ligiĝo kun vi kor' kun koro.*

En Nanning mi interkonatiĝis kun fama ĝuang-a kantisto Huang Yongsha, kiu riĉas je popolkantoj kaj poemoj. Li estas nevenkebla ĉampiono en kantokonkurso. Laŭ ĝuang-a kutimo, venkitoj en kantonkonkurso devas regali la venkintojn per pladoj de hundviando. Tial mi

diris al li ŝerce: "Dum vizitado al la kantokonkurso mi akompanados vin kaj tiamaniere mi estos regalata ne nur per belaj kantoj, sed ankaŭ per bongusta hundviando!" Sed bedaŭrinde, li ial ne povis iri kune kun mi. Por min konsoli, li improvizis poemon je la adiaŭo. Li kantis el la koro:

*Adiaŭ, tamen certe vi revenos.*

*La amikeco, kiel florradiko*

*post la florado, dum jarmilo  
restos*

*kaj floros ree l' sento de amiko!*

Jes ja. Kvankam mi jam forlasis la ĝuang-an regionon kaj Huang Yongsha, tamen la ĉarmaj kantoj ankoraŭ ŝvebadas en miaj oreloj.

de **SHAO YAN**

## HELPU PER HELENAJ VORTAROJ

Lu Jianbo, profesoro de la helena kaj romania historio de la Sichuan-a Universitato urĝe bezonas vortarojn de la antikva helena lingvo kun tradukaĵo en la germana, franca, itala, hispana kaj rusa lingvoj por kompili vortaron de la antikva helena lingvo kun tradukaĵo en dek

aliaj lingvoj inkluzive de Esperanto, kaj petas helpon de alilandaj samideanoj per alsendo de bezonata materialo. Li certe rekompencos la helpantojn per egalvaloraj ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto aŭ en angla, franca kaj germana lingvoj. Bonvolu sendi la presajaĵojn rekomendite. Adreso: Lu Jianbo, Sichuan-a Universitato, Chengdu, Ĉinio.



Taj-naciecaj knabinoj

Ŝtonskulptaĵo de WANG DUFANG





## *Nova Vilaĝo de Fiŝistoj*



Post navigado de 3 horoj ekde Hangzhou de Zhejiang-provinco al nordo, mi venis al la fiŝista brigado de Leidian-komunumo en Deqing-gubernio. Antaŭ la okuloj prezentiĝas vicoj da duetaĝaj domoj. En tiu loko interkruciĝas riveroj, kiuj multe favoras al navigado, fiŝado kaj perlokulturado.

La brigado konsistas el 110 familioj kun pli ol 500 loĝantoj kaj havas akvan areon de 273.3 hektaroj kaj kampojn de 2.4 hektaroj. Ĝi okupiĝas ĉefe pri fiŝado kaj perlokulturado. La brigado posedas pli ol 20 motorojn kaj aliajn maŝinojn kaj pli ol 120 motorajn kaj senmotorajn ŝipojn. Iom post iom boniĝas la vivo de la fiŝistoj.



Fiŝistaj domoj



Konko-bredado



Perlokulturado




Plektado de fiŝreto




En infanĝardeno



Al parencoj



Iu familio



## EL ĈINA MODERNA HISTORIO

# Kontraŭrevolucia Puĉo de “la 12-a de Aprilo”

de SHI XUAN

**E**N la jaro 1926, la rapida progresado de la Norden-Ekspedicia Milito (pri ĝi EPC jam raportis en sia n-ro 7 de 1980) kaj venka disvolviĝo de la ĉina laborista kaj kamparana movado skuis la regadon de ĉiuj imperiistoj en Ĉinio. Komence la imperiistoj ĉiamaniere subtenis militaristojn Wu Peifu, Sun Chuanfang kaj Zhang Zuolin, kiuj regis la ĉefajn regionojn de Ĉinio, kaj subinstigis ilin al unuiĝo por bari la Norden-Ekspedicion per iliaj armeoj. Sed la malvenko de la trupoj de Wu Peifu kaj Sun Chuanfang en la batalo vanigis ilian planon. En tiu situacio la imperiistoj intensigis sian malhelpon al la ĉina revolucio. Unuflanke ili ekspedis armeojn por ĝin subpremi kaj aliflanke ĉiamaniere splitis la revolucion vicaron por trovi sian novan agenton en ĝi.

En aŭgusto de 1926, brita ŝipo kolizie dronigis pli ol 10 ĉinajn lignajn boatojn en la supra parto de Changjiang (Jangzi)-rivero ĉe Wanxian-gubernio de Sichuan (Siĉuan)-provinco kaj la indignantaj armeanoj kaj popolanoj de la gubernio detenis ĝin. En la komenco de septembro, je tiu preteksto la brita imperiismo sendis plurajn militŝipojn kaj bombardis la urbon Wanxian, kio kaŭzis vundiĝon kaj morton de miloj da homoj kaj grandan perdon de posedaĵoj. Pro la fiago de la brita imperiismo, la ĉina popolo levis movadon kontraŭ imperiismo kaj la brita imperiismo estis riproĉita de la internacia progresema publika opinio. En tiu situacio la brita imperiismo konsciis, ke ne tiel efikas ĝia perforta politiko rilate al la ĉina revolucio. Ĝi do hipokrite

deklaris “novan politikon” kontraŭ Ĉinio en la jarfino de 1926, dirante, ke ĝi prenos indulgemon al la ĉina revolucio. Per tio ĝi intencis moderigi senton de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo, spliti revolucion tendaron kaj allogi la ĉinan burĝaron al kompromiso. Samtempe ankaŭ la usona kaj japana imperiismoj komencis malhelpi la ĉinan revolucion. Komence de 1927 ili, kune kun la brita imperiismo, ekspedis grandan nombron da militŝipoj al Shanghai (Ŝanhajo), Usono eĉ sendis tien unu brigadon da terarmeo, dirante ke ĝi “protektos” Shanghai per ĉiuj fortoj, ĉar tie estis koncesioj de la imperiistoj, kiuj estis rigardataj kiel iliaj influferoj. Je la 24-a de marto, kiam Nanjing (Nankino) estis okupita de la revolucia armeo, usonaj, japanaj, britaj kaj francaj militŝipoj sur Changjiang-rivero senbride bombardis la urbon Nanjing kaj mortigis kaj vundis 2,000 homojn. Aliflanke la ŝtata sekretario de Usono hipokrite deklaris, ke Usono kun plej granda indulgemo traktos kun Ĉinio por subskribi novan traktaton, kaj la malnova neegalrajta traktato, subskribita kun Ĉinio, povos esti reviziita. Per tiu duvizaĝa manovro Usono intencis kaj minaci kaj allogi la ĉinan burĝaron. La japana imperiismo prenis la saman taktikon kiel Usono, kaj krome plurfoje ekspedis siajn senditojn por koluzii kun Jiang Jieshi (Ĉiang Kajšek).

Tiam la imperiistoj jam rimarkis krizon aperintan en la ĉina revolucia tendaro kaj plifortigis sian aktivadon por ĝin spliti. Ili diris, ke interne de la revolucia tendaro oka-

zis batalo inter “ekstremuloj” kaj “moderuloj”. La de ili nomataj “ekstremuloj” estis popola revolucia forto kun la Komunista Partio de Ĉinio kiel reprezentanto, kiu insistis pri ĝisfunda revolucio kaj la “moderuloj” estis burĝaj dekstruloj kun Jiang Jieshi kiel reprezentanto, kiuj estis pretaj kapitulaci al imperiismo kaj feŭdismo.

Jiang Jieshi estis makleristo en Shanghai-a borso. En 1922, pro malsukceso en spekulado, li veturis al Guangzhou (Kantono) kaj enŝteliĝis en la revolucion vicaron. Li ŝajnis sin revolucia kaj trompis konfidon de Sun Zhongshan (Sun Jatsen). En 1924 li fariĝis direktoro de la Huangpu-a Oficira Lernejo kaj poste li funkciis kiel estro de la Unua Armeo de la Nacia Revolucia Armeo. Dank’ al brava batalo de la komunistoj kaj helpo de la laboristoj kaj kamparanoj, tiu armeo gajnis multajn venkojn en la milito por elimini la militaristojn de Guangdong kaj Guangxi, kaj per tio Jiang Jieshi akiris por si iom da renomo. Kiam li kaptis sufiĉe da povoj, li plifortigis sian intrigan aktivadon por uzurpi revolucion gvidantecon, forpuŝis kaj eĉ kaŝmurdis ĉinajn komunistojn kaj maldekstrulojn de Kuomintango. Post komenco de la Norden-Ekspedicio, profitante sian oficon de ĉefkomandanto de la Nacia Revolucia Armeo li energie pligrandigis siajn fortojn. En regionoj regataj de liaj fortoj, la interesoj de imperiistoj, bienuloj kaj tiranaj riĉuloj estis protektataj, dum la komunistoj, revoluciuloj de Kuomintango, laboristoj kaj kamparanoj estis subpremataj kaj masakrataj.



En marto de 1927 Jiang Jieshi atingis Shanghai kaj finplenumis sian koluzion kun imperiistoj kaj ĉinaj reaciaj fortoj. Post tio li komencis masakradon de komunistoj, laboristaj kaj kamparanaj amasoj je la 12-a de aprilo. Tutage, armitaj kanajloj organizitaj de Jiang Jieshi ekiris de la imperiistaj koncesioj kaj atakis la armitajn laboristajn pikedojn fonditajn post la leviĝo de la Shanghai-aj laboristoj. Lia reacia armeo kunagis kun la kanajloj en la batalo. La Shanghai-aj revoluciaj amasoj ne estis tre singardaj al la intrigo de Jiang Jieshi kaj haste leviĝis por kontraŭbatali. Pro malforteco la laboristoj estis senarmigitaj kaj pli ol 300 pikedanoj estis mortigitaj aŭ vunditaj. En la sekvanta tago pli ol 200.000 laboristoj okazigis strikon por protesto kaj 60.000 urbanoj faris demonstracion. La reacia armeo de Jiang Jieshi pafis senarmilajn amasojn per mitraloj kaj mortigis pli ol cent kaj vundis sen-

nombrajn laboristojn. Tuj sekve ĉiuj sindikatoj estis sigelitaj de la reaciaj militistoj kaj policanoj, kaj en la urbo intensiĝis rigora gardo, traserĉado, arestado kaj publika kaj sekreta masakrado. En tiu kontraŭ-revolucia puĉo pli ol 2.100 komunistoj kaj laboristaj aktivuloj estis mortigitaj. En la 18-a de aprilo Jiang Jieshi fondis, en la sango de la popolo, sian reĝimon en Nanjing, kiu tuj ricevis subtenon de la imperiismaj landoj.

Post la masakro en Shanghai, Kuomintangaj dekstruloj faris saman kontraŭ-revolucian puĉon en Guangdong, Zhejiang (Ĝegiang) kaj Fujian (Fugian). Alia gvidanto de Kuomintang Wang Jingwei, kiu poste kapitulacis al la japana imperiismo, publike deklaris sian apartiĝon disde la Kompartio en Wuhan (Vuhan) je la 15-a de julio kaj faris kruelan subpremado kaj masakradon al komunistoj kaj revoluciaj amasoj.

Estis bedaŭrinde, ke en la kriza momento de la revolucio, Chen Duxiu, gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio, praktikis dekstran oportunisman linion. Li neglektis la leviĝantan movadon de la laboristaj kaj kamparanaj revoluciaj amasoj, forlasis gvidadon al la revolucio, limigis laboristan kaj kamparan movadon kaj malmobilizis armitajn fortojn de la laboristoj kaj kamparanoj, sekvante la Kuomintangajn dekstrulojn. Mao Zedong plurfoje kritikis la eraron de Chen Duxiu kaj proponis rapide plifortigi la agraran revolucion, plenforte armi kamparanojn, disvolvi armitan batalon kaj fondi revolucionan reĝimon en la kamparo. Sed lia ĝusta propono ne estis akceptita. Tiamaniere la flamanta Granda Revolucio de 1924-1927 fiaskis kaj Ĉinio refoje dronis en malluma regado de duonfeŭdismo kaj duonkoloniismo.



\* Ladislao Pohl, kun ĉinaj geesp-istoj, adr.: 4800 Baia Mare, Str. Caragiale Nr. 5/21, R.S. Rumanio.

\* Suzuki Mituhiko, 28-jara riparisto de aŭto, fraŭlo, kun ĉina s-ano pri kutimo de lando, muziko, popola vesto, naturo, sporto, edukado k. interŝ. bk. pm., adr.: Yanagisawa-93, Nakayama-machi Yamamagata-ken Japanio 990-04.

\* Grzegorz Giczewski, kun ĉinaj amikoj, adr.: Ul. Wojska-Polskiego 50/59, 19-300 ELK, Pollando.

\* S-ro Roger Derdeyn, kun ĉin(in)o, adr.: Verbondenelaan, 10, B-8401 Bredene, Belgio.

\* Inés Pérez Leal, medicina studento, kun s-anoj el la mondo pri

diversaj aferoj kaj akupunkturo en Esperanto, adr.: C/. Luis Montoto, 46, 3º, Sevilla, Hispanio.

\* Bogdan Poznanski, 43-jara instruisto de muziko, kun tutmondaj s-anoj, precipe el Ĉinio, Japanio pri politiko, muziko, arto kaj a.t., adr.: Str. Adam Mickieviĉ, 36/1 vojevodio Ĉenstohova, PL 42-700 Lubliniec, Pollando.

\* S-ro Lloys J. Byars 70-jara pensiulo, kun ĉina s-ano, adr.: 2210 Lambourne Ave. Salt Lake City, Utah 84109, Usono.

\* Lutfio Kelmendi, 20-jara ekonomia studento, kun tutmondaj amikoj, precipe el Ĉinio, Usono, Sovetunio, Anglio, Italio pri muziko, filmo, sporto kaj ĉiutaga vivo, adr.: Rr. Tavnik 17/9, 38220 Mitrovicë Kosovës, Jugoslavio.

\* Peter Radig, 28-jara instruisto, kun ĉinaj gejunuloj pri moroj de

ĉina popolo, ard.: Clara-Zelkin-Platz 21, 8028 Dresden GDR.

\* Andrzej Pacholski, 17-jara gimnaziano, kun samaĝaj geesp-istoj, precipe el sudorienta Azio, pri E-o, ĝenerala lingvistiko, biologio, kemio, lingvoj de orienta Azio, adr.: Ul. Corczyczewskiego 1a/5, PL-60-554 Poznań, Pollando.

\* S-ro Daniel Luez, lingvo-instruisto, kun ĉinaj geesp-istoj pri ĉiutaga vivo kaj a.t., sed ne pri politiko, prefere kun gejunuloj, adr.: 1, rue Victor-faglain F-02000 Laon, Francio.

\* K-do Piet van Waveren, mezaĝa oficisto, kun ĉinaj Esp-istoj, adr.: Montessoristraat 69, 2037 GH Haarlem, Nederlando.

\* K-do Rotert A. Jeltema, mezaĝa teknikisto, kun ĉinoj pri ĉinaj temoj, adr.: Beetslaan 49, 4707 JP Roosendaal, Nederlando.



Portreto de Marko Polo



La plej malnova portreto de Kublaj-ĥano

## Ĉinio rigardata de eŭropano antaŭ 700 jaroj

de MARINKO ĜIVOJE  
(Jugoslavio)


LA libro de Marko Polo pri regionoj kaj mirakloj de la Oriento, konata sub la nomo “*Il milione*”, estas la unua atesto de eŭropa komercisto pri la landoj de mistera Azio. Estas rekomendinde prove-trove trafoliumi tiun verkon kiun liaj samtempuloj konsideris frukto de fantazio, sed postaj esploroj faritaj en la 19-a kaj 20-a jarcentoj de Aurel Stein, Ellsworth Huntington, Sven Hedin k. a. pruvis, ke la priskriboj de Marko Polo estis realaj.

La patro de Marko Polo, Nikolao, kaj la onklo Mateo estis entreprenemaj veneciaj ko-

mercistoj. En la jaroj 1261-1269 ili vojaĝis de Konstantinopolo orienten. Kiam ili ĝisiris Bukhara, grandan persian urbon, senditoj de tartara ĥano tie preterpasantaj al Ĉinio, invitis ilin kuniri por peti favoron de mongola granda ĥano Kublaj, kiu havis tiam sian metropolon en Khanbalik (nun Pekino). El Ĉinio ili revenis kiel senditoj de Kublaj-ĥano al la papo, kun letero de la ĥano, kiu petis, ke estu al li senditaj erudiciuloj kiel instruantoj en lia regno.

Reveninte al Venecio, Nikolao ne trovis sian edzinon kiu mortis intertempe, kaj la filo,

Marko 6-jara, kiam li lin adiaŭis, tiam fariĝis 15-jara knabo. Du jarojn poste, en la jaro 1271, ili entreprenis sian duan vojaĝon al Ĉinio akompanante du dominikanojn, kun mesaĝo de papo Gregorio la X-a, tiam aliĝis al ili ankaŭ la juna Marko. Ili vojaĝis per mara vojo ĝis siria marbordo. En iu haveno ili eksciis, ke sur teritorio de Irako furiozas milito. Timigite la dominikanoj revenis, sed la tri kuraĝaj komercistoj daŭrigis la vojaĝon surtere, trapasante regionojn, kie ĝis tiam neniu eŭropano postlasis siajn piedosignojn. Ili iris tra Ormuzo,



Unu el la geografiaj mapoj montranta la vojaĝon de Marko Polo

Kermano, Balka kaj poste laŭ la rivero Amuro ĝis Pamira altebenaĵo, de tie ili daŭrigis la vojaĝon inter Tibeto kaj Lop Nora kaj transiris centraazian Gobian dezerton.

Komence de la jaro 1275, ili alproksimiĝis al Karakorum, transiris la ĉinan limon kaj . . . iun tagon aperis antaŭ ili rajdtaĉmento. Fine ili aperis antaŭ la trono de ĉefĥano Kublaj en Khanbalik, la ĉefurbo de la grandega imperio.

Marko fariĝis konfidato de Kublaj-ĥano kaj restis en lia servo 17 jarojn, travojaĝinte multajn vastajn regionojn de la Malproksima Oriento, ĝis Birmo kaj Vjetnamio, konatiĝante kun lingvoj kaj moroj de diversaj popoloj.

En la jaro 1292, prezentigis al la triopo ebleco por reveno al la hejmlando, kiam la senditoj akompanis la mongolan principon kiel junedzinon de persa ĥano Arĥuno. La triopo elektis la maran vojon laŭ la bordo de Hinduĉinujo, Sumatro, Nikobaro, Cejlono kaj Hindujo ĝis Ormuzo, kaj tiam, akompaninte la principon ĝis Tabrizo, tra Tabrizo kaj Konstantinopolo, ili fine de la jaro 1295 atingis Venecion. Marko Polo estis tiam

41-jara. Dum longa foresto ili perdis ĉion kaj liaj patro kaj onklo aĉetis tie komunan familian domon, kiu ne longe ekzistis (post ĝia forbrulo sur ĝia loko estis konstruita teatro Malibrano).

En la jaro 1298, Marko Polo partoprenis en la marbatalo inter venecia kaj ĝenova ŝiparoj apud Dalmata urbo Korĉula, kie li estis militkaptita. En ĝenova karceron dum preskaŭ unu jaro li havis tempon por rakonti kaj poste dikti siajn travivaĵojn dum longaj vojaĝoj al sia skribema kunulo Rusticiano el urbo Pisa. Rusticiano notis la rakonton en la franca lingvo kaj tiel en 1299 ekestis la manuskripto de la konata verko *Livre des merveilles du monde*, pli poste nomita *Il Millione*, kiu vekis grandan intereson en tiam Eŭropo. Ĉar tiam ne estis ankoraŭ inventitaj presmaŝinoj, ĝi disvastiĝis per transskribado (estas konataj ĉ. 150 diversaj manuskriptoj en la 14-a kaj 15-a jarcentoj), kaj jam en la jaro 1320 ĝi estis tradukita en la italan kaj latinan lingvojn. Post invento de presarto, en 1477 estis en Nŭrnberg presita la germana traduko de la verko, kaj en 1485 en Amsterdamo la latina.

Ekde la 14-a jarcento, la vojaĝpriskribo de M. Polo servis kiel bazo por geografiaj karto de Azio (Laurentina portolano el 1375, mondmapo de geografo Cresques por la franca reĝo Karolo la V-a), kaj la riĉaĵoj kaj ekzotikeco de priskribita mondo instigis aventuristojn de apudmaraj landoj kaj urboj (Portugalia, Hispanio, Ĝenovo) serĉi marvojojn en la landoj de la Ekstrema Oriento, kio rezultis malkovron de novaj kontinentoj. Surbaze de la libro de M. Polo ankaŭ Kolombo fantaziis kaj planis sian vojaĝon al Ĉinio kaj Hindujo per okcidenta vojo.

Eŭropo estis tiam ankoraŭ obskura kaj konservativa, kaj liajn rakontojn pri brilaj landoj de fora Azio neniu kapablis kompreni kaj kredi. Li rakontas en sia libro pri grandega kaj vigla komerco, pri fortaj metiistaj unuiĝoj de kiuj ĉiu nombras po 12,000 domojn-laborejojn, pri neimagebla lukso en kortego de granda mongola ĥano, pri modela organizita poŝto, pri la vivo en milionloĝantaraj urboj, pri "ŝtono kiu brulas", pri silko, perloj kaj diamantoj, pri miloj da vaporbanejoj kaj pri diversaj aliaj mirakloj kaj kuriozaĵoj de Oriento. Por la lo-



ĝantoj, kaj precipe por la historiistoj kaj scienculoj de tiam dormanta Eŭropo, ĉio tio ŝajnis nura babilado kaj ĉarlatanaĵo. Oni primokis kaj priridis lin, sed li kun trankvila sinregeco respondadis: “Eĉ duonon de tio, kion mi ĝisvivis kaj scias, mi ne diris.” Ĉu en Venecio oni kromnomis lin “Messer Millione” pro riĉaĵo kiun ili kunportis aŭ kun primoka nuanco “mensogulo je milionoj” mi ne scias.

La fakto estas, ke post apero de la vojaĝpriskribo de Marko Polo, komenciĝas nova epoko de grandaj geografiaj malkovroj. Sekvas plejado de pli grandaj kaj malpli grandaj esploristoj kiel A. Cadamosto, D. Gomez, D. Cam, B. Diaz, P. Coillham kaj Kolombo, poste ankaŭ da Gama, Vespucci, Cabot, Magellan k. a.

La angla verkisto H. G. Wells en sia “Mondhistorio” asertas, ke “la vojaĝpriskribo de Marko estas la plej fama libro de mondhistorio”, kaj germana scienculo A. Humboldt diris, ke

“Marko Polo estas la plej granda mondvojaĝanto de ĉiuj epokoj”. Tamen li ne estis nur mondvojaĝanto, sed ankaŭ geografo, geologo, etnografo, natursciencisto. “Mongoloj — li skribas — en militiroj kunportas pulvorigitan lakton . . .” Ili, do, konis tiutempe ion kion la nunepoka industrio denove malkovris. “Ĉie en la montaroj oni fosas nigran ŝtonon, troviĝantan en vejnoj. Kiam oni bruligas ĝin, ĝi brulas pli longe ol ligno!” Jen unua informo pri ŝtonkarbo, kiu en la Malproksima Oriento estis pli frue konata ol en Eŭropo.

Fine de la 15-a jarcento, ne longe post eltrovo de la presarto, Venecio fariĝis mondfama prescentro kaj libroeldonejo, kie “el Ĉinio permare alveturadis pezaj papersarĝoj”.

Tamen ducent jarojn post hejmenreveno de Polo el Ĉinio ĝis la vizito de Vasco da Gama al Hindujo (1497) neniam pliaj

kontaktoj ekzistis inter Eŭropo kaj la fora Oriento. En okcidenta Azio la surteraj vojoj al Eŭropo estis riskaj pro turkaj invadoj, poste ankaŭ krucmilitoj. Kiam la eŭropaj regantoj volis enporti fajnajn silkon, turkison kaj oron el la Oriento, ili devis tion fari per malrekta vojo, komercante unue kun Bizanco aŭ pere de arabaj, turkaj kaj persaj komercistoj, havintaj ekskluzivan monopolon super ĉiuj komercvojoj inter Eŭropo kaj la fora Oriento.

Por unuaj kontaktoj kun portugaliaj komercistoj komence de la 16-a jarcento en Ĉinion komencas enpenetri la eŭropa influo. Ekde tiam la kontaktado kaj interfluo inter la Oriento kaj la Okcidento pli kaj pli oftigis, kaj la interrilatoj pli kaj pli ampleksiĝis.

Resume, la verko de Marko Polo grave kontribuis al konatiĝo, interkompreniĝo kaj amikiĝo de la popoloj de la Oriento kaj la Okcidento.

## XU LIGONG:



**K**ANCERO jam fariĝis ofta malsano minacanta la saĝon kaj vivon de la homoj. Laŭ takso de la Monda Sano-Organizo, la maligna tumoroj forrabas ĉiujare la vivon de ĉ. kvin mi-

lionoj da homoj en la mondo, t.e. meznombre unu homo je ĉiu sesa sekundo. La medicinistoj opinias, ke 60-90% de la homaj kanceroj estas kaŭzitaj de la medio, kun vivmaniero kiel

grava faktoro. Ĉirkaŭ duono de la virinaj kanceroj kaj 30% de la viraj havas rektajn aŭ nerektajn rilatojn kun nutrado.

Homo bezonas, dum sia tuta vivo (se 60-jara), 60,000 kilo-

gramojn da akvo, 10,000 kilogramojn da sukero, 1,600 kilogramojn da proteino kaj 10,000 kilogramojn da graso. Vere grandega estas la kvanto de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kiuj povas enteni tiujn substancojn. Kvankam la nutraĵoj entenas tre malmulte da malutilaj elementoj, tamen ili akumuligas tagon post tago kaj povas kaŭzi kanceron.

Multflankaj estas la faktoroj de nutrado koncernantaj kanceron: la faktoroj kaŭzantaj kaj akcelantaj kanceron, la poluciaĵoj kaj aldonajoj de la manĝaĵoj, la konservado kaj prilaborado de la manĝaĵoj, la nutrokutimoj, la etkvantaj elementoj en manĝaĵoj k.a.

La dik-intesta kancero estas pli ofta en la riĉaj landoj. La dika intesto estas kanalo kiun nepre trairas la nutraĵoj, tial sciencistoj nature studis pri la influo de nutraĵoj al ĝi. La rezultato de ilia studo montris, ke en sama tempodaŭro la viandmanĝanto trafas kanceron 2-3-oble pli facile ol la dumviva vegetarano. Mi prenu Japanion, Eŭropon kaj Usonon kiel ekzemplon. Nur 12.2% de la varmokvanto el nutraĵo de la japanoj estas el graso, dum 42.8% de tiu de la eŭropanoj kaj usonanoj. Rezulte, 0.0064-0.0075% de la japanoj trafas dik-intestan kanceron, dum 0.0422% de la usonanoj trafas tiun malsanon. Dum la periodo de 1950 ĝis 1966, la procentaĵo de tiu malsano duoble kreskis en Japanio ĉefe pro la plimultigo de viando en ilia manĝaĵo. Faktoj pruvis, ke la anaerobiaj mikrokokoj normale vivantaj en la dika intesto povas turni komponantojn de galo en kancerigajn

substancojn. Kaj krome, pro enpreno de malmulte da celulozo kaj malmulteco de fekaĵo, la dik-intesto malrapide malpleniĝas, sekve ĝia muka membrano longe tuŝiĝas kun kancerigaj substancoj kaj tio facile kaŭzas kanceron.

Per studo pri epidemiologio oni konstatis, ke troviĝas 20 specoj de kemiaj substancoj, kiuj kaŭzas kanceron al la homo. Inter ili la tri ĉefaj estas benzo(3-4)pireno (angle: Pyrene), nitroamino kaj la flavaspergila toksino, kiuj strikte rilatas kun la nutromaniero de la homo.

Benzo(3-4)pireno kaŭzas al fumantoj pulman kanceron, kaj la kvanto de tiu kemia elemento varias laŭ la maniero de kuirado kaj prilaborado de manĝaĵoj. Ekzemple, kiam kafgrajnoj estas trobakitaj, tiam 20-oble kreskas benzo(3-4)pireno en ili. Tiu kemia elemento terure multiĝas, se oni prenas pin-fruktojn kaj pin-branĉojn kiel hejtajon por baki manĝaĵojn; ĝi evidente reduktiĝas, se oni anstataŭigas ilin per ordinara lignokarbo. Longtempa tuŝo de benzo(3-4)pireno kaŭzas ne nur pulman kanceron, sed ankaŭ kanceron digest-sisteman, vezikan, mamglandan, uteran kaj ovarian.

Nitroamino estas komuna nomo de ampleksa speco de kemiaj kombinaĵoj. Ĝi estas solvebla en akvo kaj graso kaj povas kaŭzi tumoron preskaŭ en ĉiuj organoj de la animaloj, kaj la digest-sistema kancero estas la plej ofta. Nitroamino estas kombinaĵo de nitrito kaj 2-amino aŭ 3-amino. Ili povas esti kombinitaj en la stomako kaj intesto de la homo, tial la homo estas forte minacata de ili. Nitrato

ekzistas ĉie en grundo, putoakvo, legomoj kaj fruktoj, plurspecaj mikrokokoj povas turni ĝin denove en nitriton, sekve la lasta povas plimultiĝi en malfreŝaj manĝaĵoj (precipe en legomoj kuiritaj kaj longe konservataj). Aminoj kaj aminestigaj substancoj ekzistas en multaj el niaj manĝaĵoj kaj ankaŭ havas intiman rilaton kun iuj el niaj perbuŝaj medikamentoj, tial ni ne devas neglekti, kiam ni prenas analgezikon kaj similajn medikamentojn.


La flavaspergila toksino, produktajo de flava aspergilo, apartenas al la kategorio de hepata toksino, unu el la plej fortaj kancerigaj toksinoj jam konataj, kaj povas kaŭzi ĉefe hepatan kanceron. En esploro pri la kaŭzoj de la hepata kancero de la homo oni konstatis, ke flava aspergilo pli facile kreskas kaj hepata kancero pli ofte okazas en varmaj kaj humidaj lokoj de la mondo. En multaj landoj oni trovis flavaspergilan toksinon en diversspecaj grenoj (precipe en maizo kaj arakido), manĝaĵoj, spicaĵoj (inkluzive de aromajoj kaj sojo) kaj eĉ marmelado, kio ja indas nian atenton.

Krome, fumantoj kaj drinkantoj facile trafas gorĝan kanceron, kaj manko de jodo al homo facile kondukas al tiroida kancero. En la lastaj jaroj oni konstatis, ke etkvantaj elementoj, kiel seleno, zinko, magnezio, mangano, kromo kaj kadmio en la homa korpo rilatas kun multaj kanceraj de la homo.

Supre mi nur parolis pri nia primara kono pri la rilato inter nutrado kaj kancero. Se ni volas preventi tiun malsanon, ni devas koni ĝin kaj apliki ĝustatempe rimedojn kontraŭ ĝi.



La Bostona Baleta Trupo de Usono prezentas "Cindrulinon" en Beijing.



La Aŭstralia Baleta Trupo prezentas "Donkiĥoton" en Beijing.



### SHANGHAI KAJ ZAGREB, TIANJIN KAJ MELBOURNE FARIĜIS AMIKAJ URBOJ

Shanghai, la plej granda industria urbo de Ĉinio, kaj Zagreb, la plej granda industria urbo de Jugoslavio, fariĝis amikaj urboj. Posttagmeze de la 18-a de junio, pli ol 1,800 diversrondaj personoj de Shanghai okazigis celebran kunvenon por varme bonvenigi la jugoslavian delegacion estratan de kamarado Ivo Latin, prezidanto de la asembleo de Zagreb.

Je la 21-a de junio, pli ol 1,000 diversrondaj personoj de Tianjin kunvenis por celebri la amikiĝon de Tianjin kaj la aŭstralia Melbourne. Chen Weida, estro de la Tianjin-a Revolucia Komitato, kaj M. Bernardi, urbestro de Melbourne, faris entuziasman parolon en la kunveno.

### ĈINIO EN LA 39-A "ĈIUDUJARA ARTO" DE ITALIO

La nomita festo estis malfermita en Venecio de Italio je la 1-a de junio. Estis eksponataj artaĵoj de 23 landoj. Ĉinio unuafoje partoprenis en ĝia aktivado kaj eksponis 66 brodaĵojn. Tiuj artaĵoj vekis ĉe spektatoroj grandan intereson kaj

laŭdon per sia karakteriza orienta stilo.

### TURNEO DE BALETAJ TRUPOJ DE AŬSTRALIO KAJ BOSTONO EN ĈINIO

Je la dua tagdeko de junio, la Aŭstralia Baleta Trupo vizitis Ĉinion kaj prezentis tradician baleton "Donkiĥoto" en Beijing. La geaktoroj kreive kaj lerte kunfandis eŭropan popolan dancon kaj klasikan baletan arton. La baletado karakteriziĝis per hispana originaleco. Ilia prezentado ricevis varman aprobon kaj laŭdon de ĉinaj spektatoroj.

La Bostona Baleta Trupo de Usono kun 60 membroj, sub la gvido de la prezidanto de ĝia direktoraro Louis W. Cabot, faris turneon de 18 tagoj en Ĉinio en la lasta junio. Ili prezentis en la urboj Beijing, Shanghai, Guangzhou baleton "Cindrulino" kaj usonajn modernajn baletojn. Ilia brila prezentado rikoltis varmajn aplaŭdojn de ĉinaj spektatoroj.

### LA GUANGZHOU-A INTERNACIA AMIKA INVITA FUTBALA KONKURSO

Finiĝis je la 21-a de junio la 1980-a Guangzhou-a Internacia Amika Invita Futbala Konkursado. La F. R. Germana junula teamo gajnis la ĉampionecon kaj la ĉina teamo gajnis la duan lokon. La gajnintoj

de la 3-a ĝis 7-a loko en tiu konkurso estis Rumana "Bacau" Sporta Klubo, la Nacia Amatora Teamo de Meksikio, la Ĉina Guangdong-a Teamo, la Japana Teamo kaj la Xianggang (Hongkong)-a Teamo. Post la konkurso, en gaja huraado de ĉ. 30,000 rigardantoj la organiza komisiono de la konkurso donis al la tri unuaj gajnintoj premiajn pokalojn kaj medalojn.

### ĈINAJ JUNAJ SPORTISTOJ GAJNIS DU ĈAMPIONECOJN EN ATLETIKA KONKURSO

Ĉ. 200 junaj sportistoj de 18 landoj kaj regionoj partoprenis en la Monda Studenta Atletika Konkursado okazigita en Torino de Italio.

En la 1-a de junio, ĉina sportisto Zou Zhenxian gajnis la ĉampionecon de vira trisaltado per 16.54 metroj, superinte la rekordon kreitan de sovetunia sportisto je 22 cm. En la vira lancojetado ĉina sportisto Shen Maomao gajnis la ĉampionecon per 75.18 metroj. Itala sportisto gajnis la subĉampionecon. En la vira longosaltado hispana sportisto gajnis la ĉampionecon per 7.85 metroj kaj ĉina sportisto Liu Yuxuan gajnis la subĉampionecon per 7.65 metroj.

En la virina altsaltado itala sportistino gajnis la ĉampionecon, F.R. Germana sportistino la subĉampionecon kaj ĉina sportistino la kvaran lokon.



## LA SUKCESO DE ĈINIO EN INDUSTRIA PRODUKTO

En la unua duonjaro de la kuranta jaro, la totala industria produktovalor de Ĉinio atingis 246,700 milionojn da juanoj, okupis 51% de la jara plano kaj kreskis je 13.6% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro.

En la unua duonjaro la totala kvanto de produktita elektro atingis 147,400 milionojn da kilovatt-horoj kaj pliiĝis je 9.9% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro, ankaŭ la produktokvantoj de nafto kaj karbo kreskis kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

La ŝtala produktokvanto en tiu periodo atingis 18,910,000 tunojn kaj okupis 57.3% de la jara plano, la cementa produktokvanto 38,620,000 tunojn kaj okupis 58.3% de la jara plano.

La produktokvantoj de ŝtalaj materialoj, sulfata acido, sodo, kaŭstika sodo kaj aliaj materialoj kreskis je pli ol 11% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro, kaj la kemia sterko je 27.5%.

La totala produktovalor de la malpeza industrio pliiĝis je 24.2% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La bicikloj, kudromaŝinoj, radiatoriceviloj, televidiloj, glaciŝrankoj, lavmaŝinoj kaj aliaj produktaĵoj rimarkinde multiĝis kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

La kapacito de la fervoja vartransporto kaj tiu de la akvovoja kargotransporto de la ĉefaj havenoj en la unua duonjaro estis ankaŭ superplenigitaj laŭ la ŝtataj planoj.

## MULTAJ PUMPSTACIOJ KONSTRUITAJ EN ĈINA KAMPARO

En la ĉina kamparo la totala povo de irigaciaj kaj drenaj pumpiloj atingis ĉ. 70 milionojn da ĉevalpovoj kaj kreskis je 183% kompare kun tiu de 1972.

La kamparanoj de suda Ĉinio konstruis grandajn retojn de pumpstacioj, ĉar tie troviĝas multaj riveroj kaj lagoj. La irigaciaj kampoj en la regiono Shanghai-Suzhou atingis 6,700,000 muojn (1 muo = 1/15 hektaro), t.e. ĉ. 95% de tiuloka totala agraro. En la delto de Perlo-rivero, la regiono de Dongting-lago, la norda Jiangsuprovinco kaj Changjiang-Hanshui-ebenajo, ĉiu tia reto kovras milionojn da muoj da agroj. En nordaj 17 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kun malmultaj riveroj, oni boris 2,100,000 motorpumpajn putojn por utiligi abundan subteran akvon kaj la totala povo de uzataj dizeloj kaj elektraj motoroj atingis 28 milionojn da ĉevalpovoj.

Krome, laŭlonge de la supra kaj meza partoj de la Flava Rivero oni konstruis akvolevaj staciojn kun levateco de 200-300 metroj por alkonduki akvon de la rivero en altajn kampojn.

## LOĜDOMA KAJ URBA KONSTRUADO DE BEIJING EN GRANDA DISVOLVIĜO

En la unua duonjaro de la kuranta jaro, la urbo Beijing akiris grandan sukceson en fundamenta konstruo. La plankareo de domoj finkonstruitaj de diversaj konstruaj unuoj atingis 1,400,000 kvadratajn metrojn kaj kreskis je 40% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La finkonstruitaj ŝoseoj atingis 908,000 kvadratajn

metrojn kaj kreskis je 62% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro. La diversaj tubolinioj kiaj akvoproviza, kloaka, gasa k.a. linioj kun totala longeco de 126.4 kilometroj estis instalitaj, kaj kreskis je 14% kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

La diversaj unuoj de fundamenta konstruo metas loĝdoman konstruon sur la ĉefan lokon. En la unua duonjaro loĝdomoj kun plankareo de 730,000 kvadrataj metroj estas finkonstruitaj kaj la plankareo kreskis je 66% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Samtempe oni ankaŭ akiris certan sukceson en eliminado de polucio, beligo de urbo kaj plibonigo de medio. Laŭ statistiko la nove plantitaj arboj nombriĝis je 690,000 kaj pli ol 400,000 kvadrataj metroj da gazono estis kulturitaj. Krome iuj parkoj, pejzaĝoj kaj vidindaj lokoj estis riparitaj aŭ rekonstruitaj.

## KONFERENCO DE ĈINAJ KATOLIKAJ REPREZENTANTOJ

La nomita konferenco malfermiĝis la 30-an de majo en Beijing (Pekino). Ĝin ĉeestis 207 reprezentantoj, inter kiuj troviĝis 33 episkopoj, 105 pastroj, 2 monaĥoj, 6 monaĥinoj kaj 61 laikoj.

La tri-taga konferenco ellaboris statuton de la Administra Komisiono de la Ĉina Katolika Eklezio, elektis gvidantaron kaj aprobis la "Mesaĝon al la Tutlandaj Episkopoj kaj Laikoj" kaj la "Mesaĝon al la Taiwan-aj Episkopoj kaj Laikoj". En la konferenco Zhang Jiashu estis elektita kiel direktoro de la Administra Komisiono de la Ĉina Katolika Eklezio kaj estro de ĝia episkopa kolegio.





## LA TIBETA EPOPEO "GESAR" SURSCENIĜIS

La pekina opero "Reĝo Gesar", adaptajo de koncernaj ĉapitroj de la nomita epopeo, ekprezentiĝis kaj vekis grandan intereson ĉe la rigardantoj.

La opero kreis artan figuron de la tibeta heroo Gesar. Ĝia intrigo estas komplika kaj kortuŝa, kaj ĝia stilo nova kaj originala. La opero rakontas, ke ŝafisto Gesar gajnis venkon en ĉeval-konkurso kaj estis nomita reĝo de Ling-regno. Gvidante sian armeon li faris sangan batalon, forpelis la fremdajn malamikojn, eliminis internajn spionojn, defendis la pacan vivon de sia regno kaj establis harmonian rilaton kun sia najbaro Huoer-regno.

La tibeta epopeo kun pli ol miliono da versoj el 15 milionoj da vortoj priskribas legendan tibetan heroon Gesar, kaj spegulas la socialan vivon, idealon kaj moralon de la popolo en la antikva Tibeto per mito pri amo kaj milito. Ĉe la komenco de la 18-a jarcento parto de la epopeo estis tradukita kaj eldonita en la mongola lingvo, kaj tio altiris la atenton de en- kaj eksterlandaj literaturistoj. Kaj poste, iuj landoj eldonis ĝin en la lingvoj

angla, franca, rusa kaj japana, kaj ĝi estas enlistigita en la trezorejon de la monda literaturo kiel "Iliado de Azio".

## 30-JARA JUBILEO DE LA CENTRA KONSERVATORIO

La 15-a de junio ĉijare estis la 30-a datreveno de la fondiĝo de la nomita konservatorio. La celebrazion ĉeestis ĉ. 1,000 instruistoj, studentoj kaj eksstudentoj de la lernejo.

Ĝin ĉeestis ankaŭ du vicministroj de la Kultura Ministerio kaj prezidanto de la Ĉina Asocio de Muzikistoj.

Inter la ĉeestantaj malnovaj diplomitoj troviĝis la unua ĉina direktistino de orkestro Zheng Xiaoying, komponisto Wu Zuqiang, pianisto Liu Shikun kaj bivo-solisto Liu Dehai. Ili okazigis koncerton por celebri la 30-jaran jubileon de la konservatorio.

## SIMPOZIO PRI LA ĈINA LITERATURO EN PARIZO

La Internacia Simpozio pri la Ĉina Literaturo de la Rezistmilita Periodo (1937-1945) daŭris kvar tagojn kaj fermiĝis je la 19-a de junio en Parizo. Pli ol 200 literaturistoj de Ĉinio, Francio, Usono, FR Germanio, Nederlando, Italio, Brazilo kaj la regiono Xianggang (Hongkong) faris varman diskutadon pri la ĉina literaturo de tiu pe-

riodo. La ĉina verkisto Liu Baiyu kaj poeto Ai Qing respektive raportis pri la naskiĝo kaj disvolviĝo de la ĉina literaturo de la rezistmilita periodo kaj ĝiaj rolo kaj kontribuo en la ĉina revolucio.

En la simpozio okazis muzika kaj filma vespero kun la ĉina rezistmilito kiel temo, en kiu estis prezentitaj famaj kantoj en la ĉina rezistmilito "Ĉe Songhua-rivero", "Hejmloko" kaj "Brodado de Ora Honora Standardo". Kaj krome, estis projekciita la ĉina filmo "Senfina Ĉagreno".

## MAJSTRO-HUMURISTO HOU BAOLIN PROFESORIĜIS


La ĉina fama aktoro de humura dialogo Hou Baolin estis invitata lastatempe kiel profesoro de la fakultato de la ĉina lingvo kaj literaturo de la Beijing-a Universitato.

Li estas vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Ĉjuji\*-artistoj. Li diris emocie: "Mi neniam pensis ke homo kiel mi, kiu estis strata artisto antaŭ la Liberiĝo, povas profesoriĝi." La humura dialogo estas arto vaste ŝatata en Ĉinio. Hou Baolin okupiĝis pri tiu arto jam 50 jarojn. Li prezentas per lingvo sprita kaj lerta gestado.

*\* Ĉjuji-o ĉina popola arto de kantado kaj rakontado, kiu ampleksas la humuran dialogon, kant-rakontadon kun klakilo, tambureto aŭ kordinstrumentoj en akompano, dupersonan opereton k.s.*

*La fama Pekin-opera artisto Zhang Junqiu gratulas geaktorojn pro ilia sukcesa prezentado.*

*Hou Baolin akceptas la invitilon por esti profesoro.*





## BLAZONO DE VARSOVIO

Blazono de Varsovio estas Sireno — duonvirino kaj duonfiŝo. Pro tio Varsovio estas nomita “sirena urbo”. La monumento de Sireno staras apud Vistulo (Wisla — la rivero, kiu trafluas Varsovion) ĉe la kajo de Kosciuszko. Por Varsovianoj, tiu ĉi monumento estas tre proksimkora. Modelo por Sireno en la jaro 1938 estis juna varsovia knabino Krystyna Krahelska, kiu mortis en Varsovia Ribelo en la jaro 1944 dum la lasta mondmilito. En Varsovio troviĝas ankaŭ la dua monumento de Sireno en la plej malnova parto de nia urbo t. n. Malnova Urbo.

## LEGENDO PRI SIRENO

Antaŭ multaj jaroj, tiam, kiam en tiu ĉi loko, kie nun troviĝas Varsovio, estis nur malgranda vilaĝo ĉirkaŭita per grandaj arbaregoj, en Vistulo — la rivero, kiu trafluas tiun ĉi lokon — vivis Sireno.

Ĝi estis belega knabino kun fiŝa vosto. Sed la plej ĉarma estis ĝia voĉo, per kiu, kiam ĝi kantis, ĝi preskaŭ sorĉis la homojn.

Iufoje kelkaj vilaĝanoj decidis kapti Sirenon por donaci ĝin al la mazovia princo loĝanta en Ĉersk. Por ke Sireno ne povu sorĉi ilin per sia belega kantado, ili ŝirmis siajn orelojn per la vakso.

Nokte ili kaptis Sirenon kaj fermis ĝin en la kabano de iu juna vilaĝano. Ili intencis alkonduki ĝin al Ĉersk matene.

Sed tiu ĉi juna vilaĝano ne ŝirmis siajn orelojn. Li estis tre scivola pri Sireno. Kiam ĉiuj dormis, li iris pririgardi ĝin. Tiam Sireno komencis kanti kaj per ĉarmega voĉo petis la vilaĝanon ellasi ĝin. La sorĉita junulo obeis Sirenon kaj sekvis post ĝi ĝis Vistulo. Sireno iris al la rivero kaj kantis. Ĉe la bordo ĝi haltis, rigardis la vilaĝon kaj diris per forta voĉo:

*Mi amis vin, vistula bordol!*

*Mi amis vin, homoj simplaj kaj bonkoraj!*

*Mi estis via kanto kaj la sorĉo de via vivo!*



*Kial vi kaptis min? Kial vi volis malliberigi min?*

*Laŭordone mi ne deziras kanti. Mi preferas kaŝi min en la akvon de la rivero kaj de nun mi parolos kaj kantos al vi nur per susuroj de la ondoj!*

*Sed kiam alvenos malfacila tempo por vi, la susuro de la vistulaj ondoj kantos por vi pri espero, pri forteco, pri venko.*

*Se tio ne sufiĉos, en la plej danĝeraj momentoj por vi, ho, homoj, mi gardos vin per la batalŝirmilo kaj defendos vin per mia glavo!*

Post tio ĝi ensaltis en la riveron.

Pasis multaj jaroj. En tiu ĉi loko estas granda urbo, kiu por la memoro de tiu ĉi stranga aventuro en sia blazono havas Sirenon tenantan batalŝirmilon kaj glavon.

(El la grupa letero n-ro 4, Esperanto-klubo de Amikeco, Varsovio)

## BOVSANGA VINO DE EGER

Hungario estas lando multe produktanta vinon, kaj bovsanga vino farita de la historia urbo Eger nordoriente de tiu lando estas aparte ŝatata de hungaroj kaj fremdlandaj turistoj.

Efektive la vino estas malhele ruĝa vino. Oni tiel nomas ĝin ne nur pro tio, ke ĝi kolore similas al bovsango, sed ankaŭ por memori la heroan batalon de la popolo kaj armeo de la urbo Eger kontraŭ eksterlandaj agresantoj en la 16-a jarcento.



En septembro de 1552, post kiam agresantoj de la Otomana Imperio okupis plejparton de Hungario, ĝi firme sieĝis la urbon Eger per 150,000 soldatoj, provante perforte konkeri la strategian lokon kaj plue aneksi la tutan landon. Tiam en Eger troviĝis nur 2,300 urbanoj kaj soldatoj, tamen ili estis sentimaj kaj ĵuris ĝisfine batali kontraŭ la malamiko. Laŭdire, en la intensa batalo, por havigi al si bravecon kaj forton la batalantoj multe trinkis la ruĝan vinon, kiu ruĝigis iliajn lipharojn kaj kaskojn. Vidinte tion, la agresantoj estis teruritaj kaj forkuris, lamentante: "La hungaroj ja trinkis bovsangon, rapidu for! Alie, ili nin tretos kiel bovoj!"

Antaŭ la deka jarcento Eger-anoj jam komencis planti vinberojn kaj produkti la faman vinon. La vino estas farita el bonkvalitaj vinberoj per aparta teknologio.

## ANTIKA MIRAKLO DE FILIPINOJ

Nordoriente de la fama someruma loko Baguio de Filipinoj, troviĝas ŝtupaj kampoj kun areo de 10 kvadrataj kilometroj. Ŝtona kanalo kun murmuranta akvo pendas de la montsupro ĝis la montpiedo, kvazaŭ arĝenta ĉenero. Ĝi akvumas plantaĵojn ambaŭbordajn. Jen estas de-antikve famkonata ŝtupara rizkamparo. Ĝi estis konstruita de ifugao-anoj de Filipinoj antaŭ 3,000 jaroj, kaj situas meznombro je pli ol 1,300 metroj super la marnivelo. La filipina popolo fiere nomas ĝin la oka antikva miraklo de la mondo. La kampoj sur deklivoj estis fortikigitaj per ŝtonaj muroj altaj je du metroj. La totala longeco de la muroj egalas al duoncirklo ĉirkaŭvolvanta la terglobon, la kvanto de uzitaj ŝtonoj superis tiun por la antikva

piramido kaj tempo de konstruado daŭris kelkajn jarcentojn.

Ifugao-anoj estas bravaj en milito. Ilia staturo estas nealta kaj la haŭto helbruna. La viroj ofte nudigas sian bruston kaj talie surportas desegnoŝtofan kaj T-forman tukon; la virinoj surportas brilkoloran jupsimilan veston. Tiuj vestaĵoj estas teksitaj de ili mem. Krome ili lernas en lignogravurado. La viroj kaj virinoj havas labordividon tradicie. La viroj konstruas ŝtupajn kampojn, riparas kanalojn kaj rezervas grenon, dum la virinoj kulturas kaj rikoltas. La kampo de ĉiu familio havas siajn limŝtonojn kaj ĝia posedanteco estas heredita generacio post generacio. La plejaĝa filo ricevas pli grandan porcion. La akvo por irigacio kaj trinko fontas el la profundejo de la arbaro, kie pluvadas ofte en la tuta jaro.

## FIANĈIĜO PER GLASO DA KAFO

En la meza parto de Jugoslavio cirkulas interesa moro pri interfianĉiĝo. Se fraŭlo enamiĝis en iun fraŭlinon, do li povas viziti ŝian familion por peti ties manon. Tie estas permesite al li gastigi kelkajn horojn por sate manĝi kaj trinki, senĝene paroli pri sia amo kaj adoro al la junulino, pri la plano por geedziĝo kaj feliĉa vivo post la geedziĝo. . . Tiam li ne bezonas zorgi sintenon de ŝia familio. Nur tiam, kiam la mastro prezentas antaŭ li glason da kafo por ke li gustumu ĝin, la sekreto malkaŝiĝas.

Se la kafo estas dolĉa, tio signifas, ke la tuta familio de la fraŭlino konsentas lian manopetadon; se ĝi estas amara, li devas trovi por si alian knabinon.

---

(Daŭrigo de p. 26)

la reĝisoro opinios, ke ŝi estos taŭga por iu rolulino, kaj postulos ŝin plenumi ĝin.

Juna aktorino Liu Xiaoqing gajnis la premion de la plej bona neĉefa rolulino. En la komedia filmo "Tia Estas la Familio" ŝi ludis la rolon de junulino kiu estas malbone influata en la socio. Ŝi modlis junulinon kaj

brile prezentis ŝian facilanimon, vantamon kaj vulgarecon per hiperbolaj esprimoj.

Ŝi estis ludantino de ĉinaj muzikinstrumentoj. Ŝi komencis filmudi nur en 1975. Sed la ses filmoj luditaj de ŝi montris ŝian talenton. Ŝi povas ludi diversajn rolojn kun malsamaj karakteroj kaj profesioj. En la pasinta jaro ŝi samtempe ludis en tri filmoj: Antaŭtagmeze ŝi

ludis en la filmo "Xiaohua", posttagmeze en la tragedia filmo "Nupto" kaj nokte en la komedia filmo "Tia estas la Familio". En la filmludado ŝi kuraĝas venki malfacilaĵojn por ludi la rolon kun kompleksa karaktero. Ŝi ĉiam memoras faman diron de Stanislavskij: "Amu la arton en la koro, sed ne sin en la arto." Ŝi volas dediĉi ĉion, se nur la arto tion bezonos.



## Abon-kampanjo por Ĉinaj Periodaĵoj

(De la 1-a de oktobro 1980 ĝis la  
31-a de januaro 1981)

Ĉiuj, kiuj abonos ĉinajn periodaĵojn en tiu  
limtempo, povas ĝui avantaĝan abon-prezon.

**“BEIJING-A REVUO”** Semajna gazeto  
pri politiko kaj sociologia teorio, eldonata  
en la angla, franca, germana, hispana,  
japana kaj araba lingvoj kaj distribuata  
aerpoŝte al diversaj lokoj de la mondo.

**“ĈINIO”** Monata bildgazeto kun granda  
formato kaj konciza teksto, eldonata en la  
ĉina, angla, franca, germana, japana, rusa,  
hispana, araba, hindia, indonezia, itala,  
sveda, korea, svahila, urdua, vjetnama kaj  
rumana lingvoj.

**“ĈINIO EN KONSTRUADO”** Sintez-  
monata ilustrita gazeto, eldonata en la  
ĉina, angla, franca, hispana, araba, ger-  
mana kaj portugala lingvoj.

**“ĈINA LITERATURO”** Monata literatura kaj arta revuo, eldonata en la angla kaj franca lingvoj.

**“POPOLA ĈINIO”** Sinteza monata gazeto en la japana lingvo.

**“EL POPOLA ĈINIO”** Sinteza monata gazeto en Esperanto.

**“SOCIOLOGIO DE ĈINIO”** (Social Sciences in China) Trimestra revuo en la angla lingvo.

**“ĈINA SCIENCO”** (Scientia Sinica) Monata gazeto ĉefe en la angla lingvo.

**“KEXUE TONGBAO”** Monata scienca bulteno en la angla lingvo.

**“ĈINA MEDICINA GAZETO”** (Chinese Medical Journal) Monata revuo en la angla lingvo.

**“ĈINA KOMERCO KUN EKSTERLANDO”** Dumonata revuo kun relative multaj bildoj, eldonata en la ĉina, angla, franca kaj hispana lingvoj.

**“VIRINOJ DE ĈINIO”** (Women of China) Monata revuo en la angla lingvo.

**“SPORTOJ DE ĈINIO”** (China's Sports) Monata revuo en la angla lingvo.

**“ĈINA EKRANO”** (China's Screen) Trimestra revuo en la ĉina kaj angla lingvoj.


Abonu kaj abonigu la ĉinajn gazetojn!

Ĝenerala Distribuanto: Guoji Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe peranto vialoka, aŭ rekte ĉe Guoji Shudian, P.O. Kesto 399, Beijing, Ĉinio

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Jinan
2. Chongqing
3. Jiuzhaigou
4. Shanghai
5. Nanning (Yongcheng)
6. La Qinghai-Tibeta Altebenajo





En la lastaj tri monatoj ni ricevis ĉ. 300 enketilojn kaj multajn leterojn de niaj legantoj, en kiuj ili alte taksis laborojn de nia redakcio kaj samtempe prezentis niajn mankojn kaj nemalmultajn bonajn proponojn, kaj pro tio ni esprimas al ili koran dankon. Ni certe ne vankigos la esperon de niaj legantoj per plibonigo de nia revuo. Ĉisube ni publikigas parton de iliaj opinioj pri la revuo.

— La Red.

Unuvorte, mi volas fari “El Popola Ĉinio” vere Esperanta revuo de esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. En pli ĝusta diro, ĝi devas fariĝi vere nia gazeto por diverslandaj esperantistoj.

**Osaki Kazuo**, Japanio

Via belega gazeto El Popola Ĉinio, ekde la jaro 1977, kiam mi ekabonis ĝin, pli kaj pli boniĝis, kvankam mi tute ne povas kompreni kiamaniere oni povas ĝin plibonigi. Mi tre ŝatas, se iam vi povus trovi lokon en la gazeto, ke vi rakontu ankaŭ iom pri El Popola Ĉinio mem, pri la presejo kaj pri tio, kiamaniere oni laboras kaj kiamaniere oni forsendas ilin en la mondon ktp.

**J. H. Eriksen**, Danlando

Profundan impreson mi ricevis de la delikateco de sentoj esprimitaj. Mi opinias ke pureco, simpleco, delikateco estas perloj, kies perdo signifas mankon de espero.

Tre bonaj la centraj elpreneblaj koloraj bildoj, kaj ankaŭ la fotojn de la eksterlandaj esperantistoj vi tre bone elektas.

**Luigi Tadolini**, Italio

En la sveda gazeto Skanska Dagbladet . . . mi skribas pri la uzado de la metangaso en Ĉinio laŭ la gazeto EPĈ. Mi ankaŭ rekomendas la svedajn terkulturistojn fari laŭ la ĉinoj.

**N. A. Nilsson**, Svedujo

“EPĈ” estas tre disvastigata, interŝanĝata kaj konata en mia ŝtato (gubernio). Ĉiuj konas “EPĈ”. En nia rondo de esperantistoj, ĝi estas kvazaŭ nia oficiala organo. Ĉiuj laŭdas ĝian bonegan stilon, vere imitindan. La enhavo de “EPĈ” estas agrabla, interesa, ja legenda.

**Lenio Marobin**, Brazilo

Estas bone ke “Vidindaj Lokoj” estas rubriko. Tiel oni ricevas pecon por peco pli intiman impreson de ĉina geografio. Vi povus desegni etan mapon por montri kian regionon vi aktuale pritraktas. Tiele kompletigus scio kaj ĝuo.

**Wilfried Hinrichs**, FR Germanio

Inter la proponitaj rubrikoj, elekte mi preferas “Tra Ĉinio” (kvankam tro politikema) kaj “Vidindaj Lokoj”. Mi ne ricevis apartajn impresojn de la unuopaj artikoloj.

**Norberto Saletti**, Italio

Mi legas atente “Tra la Mondo”, “Por Interkompreniĝo” ktp. Dank’ al tiuj rubrikoj oni multe scias mondajn novaĵojn.

**Irene Duverdiere**, Francio

“Tra la Mondo” interesas jen pro amuzo jen pro scivolemo.

**Belin Christian**, Francio

EPĈ estas mia plej riĉa fonto de informo pri la monda esperanta movado. Mi alte taksas ĝin.

**F. R. Griffin**, Britio

Sciigite pri lastatempa E-movado, 18 el 22 membroj de nia klubo nun abonas EPĈ.

Mi havas malfacilaĵojn por legi. Tio estas pri ĉinaj propraj nomoj, personaj kaj lokaj. Eĉ simplaj klarigoj aŭ geografia skizo pri ili helpos min.

**Sooin Mori**, Japanio

Vi sufiĉe raportas pri la movado. Multe da Esp-aj gazetoj raportas tro pri la movado kaj ne sufiĉe pri la homaro.

**John Cooke**, Irlando

Mi opinias, ke revuo en Esperanto estas pli interesa ol revuo pri Esperanto.

**W. J. Franke**, Usono

Mi esperus ke la rubriko “Korespondi Deziras” estus pli granda kaj en ĉiu numero.

**Emil Hanhiniemi**, Aŭstralio

Estas unu fonto el kiu mi povas koni ekonomion de Ĉinio. Mi pensas, ke povas esti pli multe da artikoloj pri ekonomio, precipe pri ĉinaj homoj en industrio.

**Buczowski Waldemar**, Pollando

Kompreneble ĉar mi mem estas laboristo, metiisto, ĉiuj novaĵoj pri metioj de ĉinoj estas bonvenaj.

**Masson Rierre**, Francio



# Raportu la aŭdeblecon al Radio Pekino

**K**IAM vi ricevis la 5-an numeron de la gazeto, vi certe ricevis ankaŭ la raportilon de Radio Pekino pri aŭskulto de Esperanta elsendo. La raportilo-karto celas pliigi la kontaktojn kaj kunlaborojn inter la Esperanto-sekcio de Radio Pekino kaj diverslandaj aŭskultantoj. Lastatempe revenis al ni multe da raportiloj, kiuj ne nur kunportis al ni salutojn kaj bondezirojn de niaj aŭskultantoj, sed pli grave vigligis niajn pensojn kaj larĝigis niajn horizontojn.

En la lastaj jaroj niaj malnovaj aŭskultantoj, ekz. s-ro Leopold Pattek el Vieno de Aŭstrio, d-ro J. Kondor el Nerwied kaj s-ro Hervey Tauton el Wiesbaden de FR Germanio kaj aliaj regule sendis al ni detalajn raportojn pri aŭdebleco kaj siaj opinioj kaj proponoj pri niaj programoj. Per tio ili multe helpis nin kaj bone kunlaboris kun ni. En la nomo de la Japana Esperanto-Instituto s-ro Muramacu Jukijosi petis de ni 500 ekzemplerojn da raportiloj por disdono.

Dank' al plimultiĝo de elsendohoroj, grandiĝas senĉese la nombro de niaj aŭskultantoj. Ankaŭ niaj novaj aŭskultantoj fervore subtenas nin en nia laboro. Lastatempe s-ro

Jean Louis Claudel el Bruyeres de Francio skribis al ni: "Nun mi povas regule aŭdi vin ĉiutage kaj eĉ surbendigi kelkajn el viaj programoj, kiuj estas klare aŭdeblaj ĉe la frekvencoj de 11600 kaj 9380 kilohercoj. Nur fado kelkfoje ĝenas min, kaj tiam mi devas malŝalti la aŭtomatan fadokompensilon de mia ricevilo, por ke la sonoj ne tro ŝanĝiĝu." D-ro Gabor Lazar el Covasna de Rumanio skribis: "Mi informas vin, ke mi povas aŭskulti viajn disaŭdigojn GMT inter 20:00 — 20:30 sur 31.9m. 9380 kHz kelkfoje, sed ne regule en Rumanio, tamen viaj programoj ĉiuj ĝojigas min. Mi instigis ankaŭ miajn amikojn aŭskulti vin." S-ro Josef Ballo el Mulheim-Broich de FR Germanio raportis: "Via Esperanto-Disaŭdigo estas bone aŭdebla." S-ro Mihelic Lucijan el Rovinj de Jugoslavio diris en sia letero: "Mi volas sciigi al vi, ke mi estas aŭskultanto de viaj esperantlingvaj elsendoj jam dekon da jaroj. Eble vi interesiĝas pri la aŭdebleco. Mi povas diri, ke ĝi ĉefe kontentiga, kvankam ĝi varias de elsendo al elsendo kaj eĉ dum unuopa elsendo." S-ro Stig Kinnander el Tibro de Svedio raportis: "La aŭskultebleco estas ofte bona eĉ se kelkfoje estas

multe da perturboj." S-ro Svetislav Kanaĉiki el Melburno de Aŭstralio skribis al ni: "Ĉi tiun fojon mi nur volas sciigi vin, ke mi estas regula aŭskultanto de via programo, kaj ke mi surbendigas ĉiun programon kaj donas al miaj geesperantistoj por aŭskulti ĝin."

La supre menciitaj leteroj montras, kiel entuziasme niaj aŭskultantoj subtenas nin en nia laboro! Tiuj leteroj aŭ poŝtkartoj kun longaj aŭ mallongaj linioj, eĉ kelkaj vortoj, nin kuraĝigis kaj helpis. Ni kore dankas ĉiujn tiujn, kiuj aŭskultas nian elsendon, raportas al ni la aŭdeblecon kaj prezentas siajn rimarkojn kaj proponojn pri la elsendo. La konstanta kontaktiĝo kaj opinio-interŝanĝo inter ni kaj niaj aŭskultantoj sendube multe kontribuos al plibonigo de niaj programoj.

Post kiam nia elsendo fariĝis ĉiutage, ĝia povo plifortiĝis, tiel ke niaj aŭskultantoj povas pli klare kapti nian programon. Aparte ĝojinda estas tio, ke ankaŭ niaj brazilaj samideanoj povas bone kapti nian elsendon. S-ro Lenio Marobin el Lajeado de Brazilo informis nin: "Viaj disaŭdigoj ĉi tie estas facile aŭdeblaj. Kiam mi havas okazon



*Domego de Radio Pekino*

preni mian tri-ondosekcian radio-aparaton, tiam mi tuj sintonizas ĝin sur la ĝustan frekvencon, kaj jen interesa aŭdado.”

Ĉiutage, kiam ni legas leterojn, poŝtkartojn aŭ raportojn de niaj aŭskultantoj, ni ĉiam estas inspirataj. Ni kredas, ke subtenate kaj helpate de niaj aŭskultantoj, ni certe povos fari niajn programerojn pli interesaj.

Ni esperas, karaj gesamideanoj, ke vi provos aŭskulti la Esperantan elsendon de Radio Pekino, sciigos al ni la aŭdeblecon kaj kunlaboros kun ni.

## RESPONDO AL AŬSKULTANTOJ

Antaŭ nelonge nia japana samideano Takenami Hitoŝi skribis al ni: “Mi aĉetis poŝ-radoricevilon por mallonga ondo kaj tuj komencis aŭdi vian programon. Mia aparato estas tre malgranda, sed mi ĝuas sufiĉe vian programon je ĉirkaŭ 31 m.” Post kiam li ricevis de ni la raportilon, li ne scias kiel plenumi kolonojn de “SINPO” kaj petis de ni detalajn klarigojn. Similajn demandojn elmetis ankaŭ aliaj aŭskultantoj. Nun ni klarigas jene:

S = forto de signalo;

I = interferoj de aliaj stacioj;

N = atmosfera bruoj;

P = fado/variado de aŭdebleco;

O = komprenebleco de la elsendo-enhavo.

Bonvolu pritaksi la elementojn S kaj O en la skalo de 5 ĝis 1: 5 = tre bona; 4 = bona; 3 = kontentiga; 2 = malbona; 1 = tre malbona.

Bonvolu pritaksi la elementojn I, N kaj P en la skalo de 5 ĝis 1: 5 = nula; 4 = malgranda; 3 = meza; 2 = forta; 1 = tre forta.

ESPERANTO-SEKCIO DE  
RADIO PEKINO

## Pri “Maŭ Zedong: Poemoj”

Relative maloftaj estas ŝtatestroj, kiuj praktikas arton. Prezidanto Maŭ tamen estis konsiderinda poeto, kaj nun ni havas belan volumon de la poemoj en esperanta traduko. Ili estis verkitaj inter 1925 kaj 1965, do kovras la aktivan vivon de tiu granda revoluciulo. Kaj kompreneble ili estas firme plantitaj en la historio de tiuj eventoplenaj jaroj. Ankaŭ en la tuta ĉina kulturo, kio, pli ol normale, starigas malfacilaĵojn por la okcidenta leganto; feliĉe la poemoj estas detale prinotitaj. Sed mi konstatis kun honto, kiel abisme senscia mi estas pri la geografio de Ĉinujo: la sonoraj loknomoj, ekz-e Ting-gjang, Long’jan, Sanghang, vekas svagajn impresojn — kaj la deziron studi landkarton de tiu malproksima regiono.

La tradukoj, kiel kutime ĉe niaj ĉinaj samideanoj, estas verkitaj en tre bela kaj tre esprimiva Esperanto.

W. Auld  
— *La Brita*  
*Esperantisto*

**Maŭ Zedong: Poemoj**  
1-Es-964S

128 × 208 mm. 76 paĝoj  
bind.



Prezo: £0.66 US\$0.90

Eldoninto:

Fremdlingva Eldonejo,  
Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:  
Esperanta Sekcio de GUOJI  
SHUDIAN P.O. Kesto 313,  
Beijing, Ĉinio

Mendu ĉe la loka peranto aŭ  
ĉe la ĝenerala distribuanto





# FOTOJ PRI NATU- RAJ BELAĴOJ FA- RITAJ DE E-ISTOJ

Du modernaj specioj de barbo-irisoj kultivataj en la ĝardeno de nia jugoslava leganto Izi-dor Golob. En lia ĝarde-no kreskas pli ol 150 jam registritaj specioj kaj ĉirkaŭ dumil hibri-doj en observado kaj multobligado.



Paŝtistaj domoj kaj monto Sagro

Farita de ALBERTO C. STAGI (Italio)



815N

美云  
汪藻  
画

